اسفندیاری، کاظم، ۴۲۳
اسکیزوفرنی، ۱۲۰
اسمیلز، ریچارد جی، ۴۱۲
اشتیمتس، اسپومنکا، ۴۲۲
اصول آموزش انشا، ۱۹، ۳۸
اعتصام‌الملک، ۳۷
اعتصامی، پروین، ۳۷، ۷۶، ۷۷، ۳۴۳
اعتصامی، یوسف، ۳۴۳
افشار، رضا، ۴۰، ۳۶۵، ۳۹۹، ۴۲۶
افلاطون، ۱۴۰، ۳۲۷
اکسپرس، ۱۵
اکو، اومبرتو، ۴۲۳، ۴۲۴
امین‌زاده، ابراهیم، ۴۲۴
انتشارات پدیده، ۱۷، ۳۵۴
انصاری، خواجه عبدالله، ۳۱۱
انصاری، قاسم، ۳۵۰
اوتادالعجم، عباس، ۳۵۱
اولد، ویلیام، ۱۷
اوید، ۳۰۴، ۳۰۵، ۳۰۶، ۳۰۷
ایجادی، نیّره، ۳۴۹
اینترنت، ۱۸، ۲۰، ۲۷۳، ۳۴۰، ۳۴۱، ۳۵۵، ۳۵۶، ۳۵۷
آوالی، صادق، ۳۸۴
بقال‌زاده، ۴۲۳
بکر، میشل، ۳۷
پارلمان اروپا، ۱۶، ۳۳۶، ۳۳۷، ۳۳۹، ۳۴۰

پایدار، محمد، ۴۲۳
پرنیان‌پور، مرجان، ۳۵۱
پریوات، ادموند، ۳۶۹
پیراینده، محمد، ۳۴۸
پیشداد، مرتضی، ۴۱۷، ۴۲۲
پیکاسو، ۲۶۷، ۲۷۰
تاجران، مریم، ۳۷۱
تایم، ۱۵، ۲۸۴
تجلیل، جلیل، ۳۵۳
ترابی، محمد، ۳۵۳
تصوف، ۱۴۰، ۱۴۱، ۲۹۵، ۲۹۶، ۳۰۰، ۳۰۹، ۴۰۴
تقوی، مهدی، ۳۵۴، ۳۵۵
تولستوی، ۱۰، ۳۸، ۴۰۰، ۴۰۱، ۴۰۲، ۴۰۵، ۴۰۹، ۴۱۰
تونکین، همفری، ۱۶، ۲۰
تیمسار اوتاد، ۳۵۲
تیمسار پوستی، ۳۴۷
تیموری رودباری، محمد، ۳۸۶
تیموری، سیدفاضل، ۳۴۷، ۳۴۸، ۳۸۵، ۳۸۶، ۳۸۷
ثروتیان، بهروز، ۳۴۸، ۳۵۳
جامعه‌ی اتفاق ملل، ۳۴۲
جاوید، حبیب‌الله خان، ۳۷
جاوید، هدایت‌الله خان، ۳۷
جزی‌زاده، همایون، ۳۷۷
جمالی، ۴۱۷
جوکی، ۱۴۰
جیمز، ویلیام، ۹
چی‌ئوسی، ایتالو، ۴۱۶، ۴۱۷، ۴۱۸
حافظ، ۱۷، ۲۲۴، ۲۵۴، ۲۷۶، ۳۴۱، ۳۴۴، ۳۵۴، ۳۶۱، ۴۰۳
حسین (ع)، ۲۵
حلاج، ۳۰۸، ۳۰۹، ۳۱۰
حیدروند، بایرم، ۳۷۸
خادمیان، ۳۷۷
خالصی گلپایگانی، منوچهر، ۴۲۵، ۴۲۶
خیام، ۱۷، ۲۲۱، ۲۲۲، ۲۲۴، ۲۵۴، ۳۵۴
خیرخواه، رضا، ۴۰۹
خیرخواه، مجتبی، ۲۰، ۴۱۰، ۴۲۳، ۴۲۴
دائرةالمعارف ادبیات و شعر، ۱۶
دائرةالمعارف اسپرانتو، ۱۶، ۴۰۸، ۴۰۹
دائرةالمعارف ایرانیکا، ۱۶
دانشگاه هارتفورد، ۱۶
داوری، فرزین، ۲۰
دبیری، زهرا، ۴۱۲
درخشان، دیبا، ۳۵۲
دولت‌آبادی، یحیی، ۴۰۶
دهگان، ۱۵، ۳۴
دیالکتیک، ۷۵، ۷۶، ۷۷، ۸۴، ۸۸
ذبیحیان، اسکندر، ۳۸
ذکاء، یحیی، ۳۷، ۴۰۶، ۴۰۸
ذوالفقاری، جواد، ۴۱۱، ۴۲۰
رازی، شمس قیس، ۳۲۳
رشیدی، حیدر، ۳۹۴، ۳۹۵، ۳۹۹، ۴۰۰، ۴۰۱، ۴۰۲
رضاخان، ۱۹
رضا شاه، ۳۴۴
رضایی، صدیقه، ۳۷۷
رمضانی، محسن، ۱۷
روحانی رامکوهی، محمدتقی، ۳۵۱
زئوس، ۳۰۵
زامنهوف، ۱۹، ۳۳، ۱۱۶، ۱۷۸، ۱۸۳، ۲۱۸، ۲۲۱، ۲۲۷، ۳۳۱، ۳۸۳، ۴۰۰
زرتشت، ۳۸۹
زرگرپور، مهدی، ۳۴۷، ۳۶۶
زمان، مهدی، ۴۲۵
زنده‌دل، محمد، ۴۱۳
ژوپیتر، ۳۰۵، ۳۰۶
ساروخانی، ۳۴۴، ۳۴۵، ۴۱۹

سازمان بهداشت جهانی، ۳۳۷، ۳۸۴
سازمان جهانی اسپرانتو، ۱۰، ۱۶، ۲۱، ۳۸، ۲۳۱، ۲۳۳، ۲۳۶، ۲۳۷، ۳۶۶، ۳۹۴، ۴۲۷
سازمان ملل متحد، ۱۶، ۲۳، ۲۳۶، ۳۳۷، ۴۱۲، ۴۱۵
سامانی‌پور، محمدابراهیم، ۱۵، ۳۴۹
سرخی، ستار، ۴۲۵
سجادیان، اصغر، ۴۱۱، ۴۲۱، ۴۲۲
سجادیان، رضا، ۲۰، ۴۲۴
سرکیسیان، ۴۰۸
سزار، ژولیوس، ۳۰۵
سعد، مسعود، ۳۰۴
سلطان‌زاده، رضا، ۳۷۷
سه‌تالا، ویلهو، ۳۷۰
سهرابی‌فرد، علیرضا، ۴۲۰
سیلاجی، ۳۶۶، ۳۶۸، ۳۶۹
شاهورانی، ۳۵۲
شبستری، محمود، ۳۰۳، ۳۱۱
شهر سالم، ۳۵۰، ۳۸۴، ۳۸۵
شیخ‌الملوکی، منصور، ۳۷۵
شیدانی، بهمن، ۳۷، ۳۶۵
صاحب‌الزمانی، ناصرالدین، ۳۹، ۳۹۴
صدیقی، ژیلا، ۲۰، ۳۴۵، ۳۴۶، ۳۶۶، ۳۸۵، ۴۱۵
صمیمی، بدیع، ۳۶۶، ۳۷۰، ۳۹۰
صوفی، ۱۴۰
عباسپور، هومن، ۱۹، ۴۱۱، ۴۱۲، ۴۲۱، ۴۲۳
عراقی، حمیدرضا، ۳۵۱
عسکری، نادر، ۳۷۷
عطائی، ۲۰، ۲۱، ۴۰، ۳۵۲، ۳۶۶، ۳۶۸، ۳۷۰، ۳۷۱، ۴۱۰، ۴۱۳
عطایی، بهروز، ۲۰
علمی، ارم‌السادات، ۳۷۷
عندلیبی، پدرام، ۳۸۳
غضنفریان، رزاق، ۳۶۸، ۳۶۹
فارابی، ۳۰۸
فاشیسم، ۱۲۰، ۱۴۰
فاطمی، ابوالقاسم، ۳۴۹
فان ویل‌گن، گراد، ۳۴۰
فرجی، فاطمه، ۳۷۰
فردوسی، ۳۷، ۴۸، ۹۶، ۲۴۹، ۳۰۶، ۳۴۶، ۳۵۲، ۳۵۳، ۳۶۱
فروتنی، مسعود، ۳۷۶
فروید، ۱۵۹، ۳۰۵
فرهنگستان اسپرانتو، ۳۹۲
فکری، اکبر، ۳۸۵، ۴۲۴
فکوری، ۳۴۷
فولادوند، ۳۵۰
قائم‌مقامی، محمد، ۳۶۶
قندی، محسن، ۳۴۶، ۳۷۱
کارا، م.س، ۳۸۲، ۳۸۳
کاظم‌زاده ایرانشهر، حسین، ۴۰۸، ۴۰۹
کاظمی، سیدمحسن، ۴۰۱
کافکا، فرانتس، ۳۰۴
کانون پرورش فکری کودکان و نوجوانان، ۱۵
کرام‌الدینی، محمد، ۴۱۱، ۴۲۱، ۴۲۲
کسروی، احمد، ۱۹، ۳۷، ۳۸، ۳۷۹، ۳۸۰، ۳۸۲، ۳۸۳، ۴۰۰، ۴۰۱، ۴۰۲، ۴۰۶، ۴۰۸، ۴۱۰
کمالی، محمدجواد، ۳۵۲، ۴۱۳
کوهستانی، یارمحمد، ۳۷۷
کیانی ایران‌پور، معصومه، ۳۵۲
گریزیون، ۳۸۷
گفتگوی تمدن‌ها، ۲۳، ۳۸، ۱۴۳، ۲۲۲، ۲۲۳، ۲۷۴، ۲۹۰، ۳۶۸، ۳۸۷، ۳۹۳، ۳۹۹، ۴۰۲، ۴۰۳، ۴۰۸، ۴۱۶، ۴۱۸
گودهیر، آلبرت، ۴۱۴
لیلی (مجنون)، ۳۰۹
لینس، ئول‌ریش، ۱۶
ستافیزیک، ۱۳۹، ۲۸۵، ۳۰۲، ۳۰۴، ۳۰۵، ۳۰۶، ۳۲۴
متین، غلامحسین، ۳۹

مجنون، ۳۰۹
مدرسی، یحیی، ۴۱۱، ۴۲۱
مرکز بین‌المللی اسپرانتو مارلیک، ۳۸۷
مسیح، ۷۸، ۱۴۰، ۲۴۳، ۲۴۴، ۲۵۸، ۲۸۳، ۲۸۴، ۳۰۵، ۳۰۹، ۳۳۱
مُشکری، ۳۶۶، ۳۷۰، ۳۷۱
مشکور، محمدجواد، ۴۱۰، ۴۱۱
مشیری، محمد، ۴۱۳
مشیری، مخاطب‌السلطان، ۳۷
مظفری، نواب، ۳۵۳
مظلومی، رجبعلی، ۴۰
معافی، محمد، ۳۴۶
مقدسی، ۱۹
مکارم شیرازی، ۴۱۰
مکتب، ۱۲۰، ۱۴۰، ۱۴۱، ۲۶۳، ۲۶۶، ۲۷۰، ۲۸۲، ۲۹۵، ۲۹۶، ۲۹۷، ۳۰۲، ۳۱۹، ۳۲۶، ۳۸۴، ۳۸۸، ۴۰۴
ملت‌خواه، عطیّه، ۳۴۵، ۳۴۶
ملکی، صدرالدین، ۴۲۱
منصوری‌نسب، سیدمحمدرضا، ۳۷۷
من و خارپشت و عروسکم، ۱۵، ۱۶
موبد، میرمهدی، ۳۹
موپن، گروژان، ۳۷
موسوی، سیدکاظم، ۳۷۲، ۴۱۷
مولانا، ۳۰۹
مولوی، ۱۸۷، ۲۷۳، ۳۱۱، ۴۰۳، ۴۰۴
موناتو، ۱۵، ۴۱۰، ۴۲۲، ۴۲۳، ۴۲۴
مهدوی، احمد، ۴۱۳، ۴۱۹
مهدوی کرمانی، سیدمحمد، ۴۰۹، ۴۲۳
میبدی، رشیدالدین، ۳۱۱
میرکنی، سیدعلی‌اصغر، ۳۷۷
میریان، علی، ۳۵۴
نئولوگیسم، ۱۲۰
نامداری، قاسم، ۳۷۷
نجفی، صفی‌الدین، ۳۱۳
نجفی، طریح، ۳۱۳
ندیمی، هادی، ۳۴۹
نصیراحمدی، احمد، ۳۴۸
نعیمی، هادی، ۳۴۸، ۳۵۲
نمازدوست، ۳۵۲
نمازی، ۳۴۸، ۳۴۹، ۳۵۲
نِمِر، ایشتوان، ۴۱۳
نمسه‌چی، داریوش، ۳۸، ۴۰۸، ۴۰۹
نوروزی، خلیل، ۴۲۳
نوروزی خیابانی، مهدی، ۳۵۰
نیازی ساعی، عبدالرحیم، ۳۷۷
نیوزویک، ۱۵، ۳۷۸
وارینگ‌هی‌ئن، گاستون، ۱۷، ۳۶۹، ۴۱۲
والتر، ۳۶۳، ۳۶۴
وب‌سایت، ۱۲، ۳۳۶، ۳۵۶، ۳۵۷
وحیدی، ۳۶۸، ۳۷۰
هاجری، ضیاءالدین، ۳۸۱
هاکوپیان، امیل، ۴۰۸
هدایت، مخبرالسلطنه، ۳۷
هنر قمی، محمدعلی، ۳۷۷
هه‌سوئید، ۲۹۳
هیتلر، ۳۹، ۱۴۰، ۱۴۲، ۳۴۳، ۳۴۴، ۳۵۳، ۳۹۷
یاتسن، سون، ۳۴۲
یامادا، تمپو، ۴۱۲
یونسکو، ۱۰، ۱۶، ۱۷، ۲۱، ۲۳۱، ۲۳۶، ۳۳۷، ۳۴۴، ۳۵۴، ۳۷۱، ۳۷۸، ۴۰۲، ۴۰۷، ۴۱۱، ۴۱۴، ۴۱۶، ۴۱۸، ۴۲۰، ۴۲۱، ۴۲۲
PIV، ۳۶۹، ۳۷۰، ۳۷۱، ۴۱۲
Privat، ۳۶۹
Setälä، ۳۷۰
UEA، ۱۰، ۱۶، ۲۱، ۳۹، ۵۲، ۲۳۱، ۲۳۳، ۲۳۶، ۲۳۸، ۳۸۵، ۳۹۴، ۳۹۵، ۳۹۹، ۴۲۷
Waringhien، ۱۷، ۳۶۹
Zamenhof، ۱۷۸، ۲۱۸، ۳۳۱

"En la ekspozicio oni nekredeble bonvenigis la eldonon de Kajjamo, kaj oni jam parolas pri ĝia baldaŭa elĉerpiĝo -kvankam, Iran-norme, ĝi estas- tre multekosta... Dum la lastaj ĝis nun, neniu rajtis eldoni aŭ vendi la Robajojn de Kajjamo. Ankaŭ Esperanto, per si mem, havas problemojn en nia medio. Tamen Kajjamo, Esperanto kaj la Centjara Juabielo ensemble ekfarĝis subite la krono de la libro-publikigado..."

"Cetere, la nura kompostado, presado, bindado kaj publikigado, dum malpli ol tri samajnoj, en iu tre revoluci-batita lando post okjara milito kaj neimagebla inflacio, manko de papero kaj malabundeco de multaj aliaj necesaĴoj, estas pruvo de senlima, kaŝa, forega, potencialo malantaŭ la fasado de la Tria Mondo, pri kiu mi ade atentigis mian kolegaron en Oriento, en Okcidento!"

La 1-an de decembro la tutlanda kanalo de irana televido dediĉis parton de la programo "30-Demanda konurso" al tiu libro, emfazante precipe la Esperantan sekcion.

Esperanto Revuo / Februaro 1988/ p. 32

Tiel amasiĝis la raportoj pri notindaj okazaĵoj de post decembro, ke ni ne povis dediĉi al ĉiu el ili la laŭmeritan paĝamplekson. Jen tamen la ĉefaj detaloj pri la plej elstaraj.

Eksterordinara eldono en Irano

La jena raporto estas ĉerpita el letero de M.H. Saheb Zamani al G. Waringhien.

"Okaze de la Semajno de la Unua Internacia Libro Ekspozicio en Teherano, 6-13a de novembro 1987, la Ministerio de Informado urĝe proponis al s-ro M. Ramezani, eldonisto kaj mia bona konato, tujan eldonon de [la Robajoj de Omar] Kajjamo, multlingve, por la ekspozicio. La tempo por li disponebla estis tre streĉa - nur tri semajnojn- ĝis la malfermo de la ekspozicio. Kvin tagojn antaŭ la malfermo, s-ro Ramezani sciigis min pri la afero. Mi proponis, ke li enmetu ankaŭ la Esperantan version de la robajoj. Fine, kvazaŭ mirakle, la libro eldoniĝis ĝustatempe, en 712 paĝoj kaj 30 lingvoj, kun sepkoloraj ornamaĵaj ĉe la marĝenoj, en 10 000 ekzempleroj! Normale la procezo eldoni tian verkon daŭras du jarojn en nuntempa Irano."

"En la libro troviĝas 210 el viaj belaj robajoj, inkluzive de parto de via enkonduko. Fliĉe, ni povis eldonigi ankaŭ la emblemon de la Centjara Jubileo de Esperanto ... kaj vian foton [la sola krom tiu de Fitzgerald, la angla tradukinto] ... Vi iam esprimis la deziron, ke viaj robajoj havu miniaturojn. Inter la Esperantaj robajoj troviĝas du koloraj kaj ses nigroblankaj miniaturoj, el entute 86 ... La enkondukaj vortoj de la eldonisto aperas kvarlingve: perse, arabe, Esperante kaj angle."

Letero de Behesˆti- Universitato

(La Nacia Universitato de Irano)
Oficejo de la Prezidanto
Je la nomo de Dio
La 4-an de julio 1992 (13.4.1371)
Tre kara frato,
Via Eminenteco d-ro Sahab-Zamani,
Dankegojn pro viaj tre gravaj kaj utilo-plenaj paroloj pri Esperanto en diversaj kunvenoj de profesoroj kaj studentoj. Tiu ĉi universitato decidis se Via Moŝto akceptos respondecon, starigi Esperanto-kurson ekde la nova studjaro, kaj por profesoroj kaj por studentoj.

La prepar-laboron kaj programadon por la kursoj certe plenumos via respektinda kontakto kun la instruo-plana vicprezidanto de la universitato.

Dezirante benoplenan sukceson per Dia graco al vi,
Via

La Universitat-Prezidanto

Esperanto Revuo / n-ro 1039 (7-8)/ p.125

magra malplimulto, okupas sin pri Esperanto, la t.n. "artefarita lingvo", el pure lingvistika scivolemo.

7. **Diversaj minoritatoj**: Ili serĉas identecon, akcecon, akceptiĝon, legitmecon, eventuale tutmondan disvastiĝon; ekz. adeptoj de certaj religioj aŭ de politikaj konvinkoj, samseksemuloj ktp.

8. Homoj, kiuj deziras havi komunikadon kun aliaj, kie ajn en la mondo, pro scivolemo, aŭ batale kontraŭ sia izoleco, ekz. korespondante.

9. Tiuj, kiuj deziras **edukiĝ^i internacie**: potenciale internaciuloj kaj mond-civitanoj.

10. Tiuj, kies intereso pri Esperanto motiviĝas politike, ekz. la homoj en orienta Eŭropo antaŭ la falo de la Berlina muro, kaj multaj aliaj en la tria mondo - ekzemple, dum la milito inter Irako kaj Irano kelkaj iranaj militkaptitoj en iraka malliberejo serĉis internacian helpon pere de Esperanto. Por ili ĉiuj Esperanto fariĝis kvazaŭ tre eta fenestreto al la libera mondo en la izola ĉelo de ilia malliberejo.

por ĉiuj priparolitaj sufiĉas scii Esperanton por si mem, ĉar ili deziras ie trovi geamikojn. Esperanto por ili estas ia kluba lingvo. La scivolemo de la "klubanoj" estas limigita kaj privata, ne publike mond-vasta. La limigiteco de Esperanto ŝajnas al ili pli avantaĝo, kaj ĝia populariĝo malavantaĝo. Ili do pli-mapli emas monopoligi Esperanton. Pro tio ĉi tiuj grupoj ne tiom aktive agadas por la monda Esperanto-movado. Nur la anoj de la 11-a kategorio vere volas disvastigi Esperanton pere de komunaj elsendiloj, aŭ en komercado, kaj aparte en scienco kaj teknologio.

Tiuj, kiuj jam spertis la ĉagrenajn rezultojn de milito rigardas Esperanton kiel la lingvon de paco kaj frateco. Ĉi tiuj homoj kutime apartenas al malĵusaj epokoj. Sed meze de la 70-aj jaroj, speciale en Irano, aŭdiĝis kvazaŭ jena plendo: "Ankaŭ ni estas tre for de la monda paco tiel sopirata!" Por paco ne sufiĉas nura reklamado pri Esperanto. Anstataŭ tia pura idealismo ni bezonas ke Esperanto estu elektita kiel monda komprenilo por la disvatigo kaj transdono de la plej ĝenerale akceptitaj sciencaj kaj ke ĝi praktike aplikiĝu por teknologio.

Por ke la tria mondo povu kompensi sian postrestadon, oni ankaŭ devas, kiel eble plej baldaŭ, eldoni bazajn sciencajn kaj teknologiajn manlibrojn en la vere internacia facila lingvo Esperanto.

Landa agado:

Historia decido en Irano: D-ro Hadi Naimi

En Irano la Esperanto-movado ekflorinta grandparte dank' al la lertaj agado kaj gvido de d-ro M.H. Sahab-Zamani, honora membro de UEA, spertis diversajn sorto-turniĝojn dum la sufiĉe tumulta historio lastatmpa de tiu lando. La gravega decido de la plej signifa irana universitato starigi E-kursojn por studentoj KAJ por profesoroj kronas 17-jaran penoplenan klopodon kaj rezolutan batalon de Saheb-Zamani. Jen, gratule, parto el intervjuo kiun faris kun li Anĝelina Taremi en decembro pasintjara, en Teherano.

Kiel kaj kial oni interesiĝas pri nia lingvo?

Aparte en tiu ĉi parto de la mondo, la interesatoj troviĝas en, eble, 11 kategorioj:

1. Homoj, kiuj serĉas ion por plenigi sian vivo-vakuon per ia terapia okupo.

2. **Hobiistoj**: Por ili Esperanto povas esti tre malmultekosta hobio.

3. **Vojaĝemuloj**: Ankaŭ ili serĉas malmultekostecon, plifaciligon de vojaĝoj, aparte eksterlanden. Pasporta Servo aŭ la eblo pli facile ricevi vizon aŭ invitilon allogas ilin.

4. **Avaruloj**: Ankaŭ ili volas okupi sin per Esperanto hobiece, sed male al la dua kategorio, ili ŝparas ne pro monomanko. La malmultekosta amuzilo Esperanto taŭgas por ilia karaktero.

5. Interesiĝantoj pri komputiloj kaj tradukaj maŝinoj.

6. **Lingvistoj**: La plimulto pro sia fakula fiero ne volas scii pri Esperanto kaj eĉ antaŭjuĝe atakas ĝin; la alia grupo, kompreneble tre

artikoloj en gravaj gazetoj.

UL: Ĝis nun vi parolis precipe pri la kvanta disvastigo de Esperanto. Kion vi opinias pri ĝia kvalita evoluo?

MHSZ: Por mi unu el la modeloj por tiu evoluo estas Aventuroj de Pioniro de Privat. Antaŭ deko da jaroj mi uzis tiun libron por instrui en mezgradaj lernejoj, ankaŭ en kursoj de la aerarmeo. El la multaj demandoj de la studentoj mi rimarkis, ke ĝi havas grandan kulturhistorian valoron por kompreni la kialojn de la unua mondmilito kaj ĝian patologiajn postsekvojn en Eŭropo. Pli ol per legado de multaj libroj aŭ romanoj, la prelegoj de Privat komprenigas Eŭropon al niaj studentoj. Tial mi jam delonge sopiris pri suplementa volumo pri la dua mondmlilto. Siatempe mi eĉ korespondis kun Ivo Lapenna pri tio, antaŭ lia bedaŭrinda forpaso. Poste dum korespondado kun Gaston Waringhien mi ŝanĝis la planon tiel, ke homoj el multaj landoj, inter siaj 60-a kaj 70-a jaroj, verku po 3-5 paĝoj pri la kultura kaj politika evoluo sialande, ankaŭ rilate al la E-movado. Per tio mi esperas kompili ian kulturhistorion de la mondo de la dua mondmilito ĝis nun.

Ni volas instrui la mondan kulturon per la monda lingvo, ne nacian kulturon per naciaj. Tio signifas krei mondcivitanojn. Se vi scivolas pri mia fantazia modelo de esperantiso: Esperantisto devus esti kiel cirklo, kun unu piedo obstine lokita hejme, la alia moviĝanta tra tuta mondo.

* Interesatoj povas legi detale pri tio en la revuo Esperanto 1977/202-207 kaj 1978/4-8.

** **Hafez en 30 lingvoj** kaj la pli frue aperinta, same luksa volumo Robajoj de Omar Kajjam en 30 lingvoj estas haveblaj ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ 126,00 resp. 198,00 gld.

*** **Serta gratulatoria in honorem Juan Regulo. Vol II: Esperantismo.** 120,00 gld. ĉe Libroservo de UEA.

Esperanto Revuo /Januaro 1991/ P.4-5.

Fine, nia celo estas enirigi Esperanton en la lernejan programon. Ĉu oni havas por ĉiu instrufako apartan asocin, ekz. por algebro, botaniko, geografio? Kial do por Esperanto? Ni devas krei publikan demandon kaj premon por Esperanto, ĝis la regantoj pozitive respondos. Pri tia kampanjo mi jam havas 16 jarojn da sperto sur alia kampo, la fako de mensa higieno. Per amasa publika edukado, bona eluzo de la radio kaj televido, ni atingis, ke en Irano de pli ol 25 jaroj oni oficiale instruas pri mensa higieno en ĉiuj flegistaj institutoj kaj medicinaj fakultatoj, en fakoj de normala psikologio kaj eĉ en mezlernejaj lernolibroj pri higieno. Kaj por tio ni ne bezonis asocion.

Oficialigo estas revo de Esperanto movadoj ĉie, sed ĝi dependas de multaj faktoroj, ne nur enlande sed ankaŭ ekstere.

UL: Viaj kontaktoj kun UEA ekzistas jam de la komenco. Kion ĝi donis al vi, kaj vi atendas de viaj ligoj kun la monda movado?

MHSZ: Ni ne atendas ion speciale por ni persone aŭ por nia lando, sed ke UEA helpu disvastigi Esperanton en la tuta Tria Mondo. Unue, ni havas grandan bezonon de bonaj, fakaj artikoloj pri Esperanto. Ekzemple, dum la Jubilea Jaro aperis multaj bonaj artikoloj en famaj ĵurnaloj kiel Time, US News World Report, Le Monde. UEA per sia revuo - ne en iuj limigitaj bultenoj, sed en sia ĉefa organo - devus reprodukti tiajn artikolojn en la originala lingvo kun bona Esperanta traduko. Se ĉiujare UEA kompilus ĉ. 30 paĝojn da unuarangaj pri Esperanto, tio estus tre impona reklamilo, pli efika, ol kiam ni parolas pri ni mem. Per tio ni povus senarmigi niajn kontraŭulojn, dum per disputoj inter Ŝulco kaj Golden ni ne povas ion atingi ekstermovade.

Plue, ni apenaŭ havas kopiojn de la du Unesko-rezolucioj: UEA devus aperigi ilin en ĉiuj oficialaj lingvoj de Unesko kune kun E-traduko. Cirkuligo de ili inter Esperantistoj havus multe pli da efiko ol la rezolucioj mem havis en la koncerna konferenco. Aliaj bezonoj: "Esperanto" de UEA devus revui la revuojn de Esperantujo, simile kiel faras **Humgara vivo**. Oni devus ankaŭ pli bone dokumenti la evoluon de Esperanto. Ekzemple Germain Pirlot bonege sekvas la evoluon de la instruado; per kurboj oni pavas vidi la laŭgradan disvolviĝon kaj vere esperigan kreskon. Ankaŭ la kalendaro estas tre bona tradicio.

Ni volas krei mondcivitanojn

La Jarlibro devus aperi nur ĉiun trian jaron. Tiel oni ŝparus multe kaj povus plifortigi anstataŭe la revuon, ekz. per pli da atento al

televido ktp. Per tio ni eĉ povus facile atingi la prisopiratan ekvilibron inter t.n. nordaj kaj sudaj landoj. Vere, pere de neniu alia propono mi povus iam imagi la solvon.

Sed necesas kompreni ankaŭ jenon:
Eĉ por distribui tiujn librojn necesus oferemo de okcidentaj eldonistoj. Oni jam kritikis nin, ĉar en Irano ni ofsete represis vortarojn kaj aliajn verkojn. Ĉu oni atendas, ke en iu lando frapita per milito dum 10 jaroj, sen fremda valuto, la movado povas simple dependi de la bonfaro kaj almozoj de eksterlandanoj? Ni konsilis al Pakistano sekvi la saman vojon. Estas tasko de UEA persvadi la eldonistojn en okcidento eldoni en la landoj de la Tria Mondo, kaj ankaŭ krei eblojn de interŝanĝo por ke ni ricevu aliajn librojn, revuojn ktp. Mi aldonu, ke al ni mankas pli da libroj por komencantoj.

UL: La irana movado estas verŝajne la plej granda en la mondo, kiu ne havas propran landan asocion. Ĉu iam ni povos esperi pri Irana Esperanto Asocio?

MHSZ: En la hodiaŭaj cirkonstancoj estas malfacile krei oficialan organizon. Ni devus havi konatan personecon kiel gvidanton aŭ respondeculon, kaj peti konsenton de la registaro. Sed jen diabla cirklo, ĉar konataj personoj ne scias Esperanton. Do, aŭ ni devus provi funkciigi asocion sen protektanto en la pli altaj tavoloj, aŭ ligi nin al homoj kiuj havus la nomon, eble vojaĝus je la nomo de Esperanto, krokodilus hejme kaj parolus angle kaj france en eksterlando, dum la studentoj, kiuj lernas zorge Esperanton, ne havus ŝancon profiti de la minimumaj avantaĝoj de la movado.

Oficialigo estas revo ĉie

Alia problemo: Se ni listigus 10 aŭ 15 nomojn por havi la permeson establi la asocion, por ĉiu nomo oni devus batali kaj longe atendi, ĝis politika aŭ alia respondeculo donus rajtigon. Tio povus multjare daŭri kaj post multaj atendoj tamen rezultigi rifuzon.

Trie, asocion oni emas rigardi grupdinamike kiel minoritatan partion, suspekti kiel hejmon de stranguloj, politikaj opoziciuloj, religiaj deviantoj k.S. Rezulte, ekde la oficialigo de la nomo vi estas en defenda pozicio. Multe da energio vi devas konsumi nur por defendi vin kaj pruvi vian normalecon. Kaj kvare, se ŝanĝiĝas la humoro de la registaro, oni povas ordoni al jam oficialigitaj asocioj, ke ili fermu sin. Se ne ekzistas asocio, estas multe pli malfacile diri al multaj diversaj personoj, ke ili ĉesigu sian agadon.

entuziasme parolis pri la amikeco inter Esperantistoj, pri kontaktoj kun siaj korespondantoj. Multaj trovis, ke invito de Esperantisto faciligis ilian vojaĝon al eksterlandon. Do ni ne plu estas la solaj propagandistoj, feliĉe. Multaj homoj tra la lando defendas Esperanton.

Ni ne volas vivi izolite

Sendube kontribuos en la estonteco ankaŭ plia trejnado en Eŭrpo de homfortoj el la Tria Mondo. Ekzemple, la irana Ĵurnalisto Reza Ĥejr-Ĥah pasigis la lastan jaron tie. Tiu restado ne nur konvinkis lin pli efike ol cent kursoj, sed ankaŭ tute ŝanĝis la aprezon de Esperanto inter liaj amikoj kaj kolegoj en la eldonejo. Unu el liaj amikoj, la ĉefredaktoro de **Mondo de sporto**, kiel unua iranano estis ĵus elektita kiel ĉefo de la Monda Asocio de sport. Ĵurnalistoj. Li estas ankaŭ mia studento de Esperanto. Nun li promesis malfermi kursojn pri fremdaj lingvoj, ankaŭ pri Esperanto, kaj ni povas atendi lian daŭran subtenon.

UL: kiuj povus esti la kaŭzoj, ke Esperanto vekis tiom da entuziasmo en Irano?

MHSZ: Entute irananoj pro pluraj kialoj, interalie la sufismo, havas pli mondvastan rigardon. Ili ne volas resti ŝoviniste en sia izolita lando. Unue, dum 500 jaroj post la islamiĝo de Irano ili unuarange kontribuis per lernita dua lingvo, la araba, al la mezepoka mondliteraturo. Pri tio mi verkis en la festlibro de Regulo.*** Nuntempe de 100 jaroj ili okupis sin per la franca, germana, rusa kaj angla, sad la rezulto ne estas menciinda. En mezlernejoj ĉ. 6 jarojn oni lernas fremdajn lingvojn, precipe la anglan, kun rezulto iomete super nulo. Do, la irananoj instinkte konscias, ke per sia mema lingvo ili ne povas partopreni la arenon de la mondliteraturo, ili entuziasme volas lerni aliajn lingvojn, sed la plimulto senesperiĝas. Esperanto donas al ili la ŝlosilon, solvas la t.n. minuskomplekson.

Sed Esperanto povus havi ankoraŭ multe pli grandan signifon por ili. Praktike oni devas lerni unu-du fremdajn lingvojn por praktiki iun ajn sciencan-teknikan profesion. Permesu al mi ree resumi mian proponon, ke se oni verkus aŭ tradukus po 10 el la plej bazaj lernolibroj en 200 branĉoj de la scienca literaturo, ni havas 2000 librojn. Verdire pli ol 95% de la hodiaŭa scienco oni povus meti en tiun amaseton da libroj, kaj tiel ni povus vere revoluciigi transmetadon de scio de la unua kaj dua mondoj al la tria mondo. Tio estus unika, senprecedenca evento, eĉ ne komparebla kun la presmaŝino aŭ aliaj komunikiloj kiel radio,

Ni instruis eĉ sub bomboj

Fakte la irana gazetaro nun laboras por ni. En ĉ. 80% de la gravaj revuoj en Irano aperis kelkfoje io pri Esperanto, aŭ tradukita el Esperanto kun indiko de la fonto. Ekzemple, estas kutimo de ĉiuj Ĵurnaloj publikigi specialajn artikolojn pri iu temo okaze de la nova jaro, Naŭruzo, kiu en Irano komenciĝas je la 21-a de marto. Ĉi-jare kvar tre gravaj Ĵurnaloj, plus unu Ĵus aperinta, havis intervjuojn, artikolojn kaj tradukojn de Esperanto. Ofte aperas tradukoj el sciencaj E-revuoj en la irana gazetaro. Do, mi fieras diri, ke preskaŭ ĉiuj el niaj Ĵurnalistoj estas rektaj aŭ nerektaj disĉiploj de la afero.

UL: Kiom da kursoj vi nun gvidas?

MHSZ: La nombro varias ĉiujare, ĉar tion influis la milito, la fermo de la universitato, ktp. Sed neniam mi ĉesis instrui, eĉ sub terura bombardado de bomboj kaj misiloj. Jam antaŭ du jaroj ni devis forlasi teheranon kaj iri al Sario, urbo en la nordo ĉe Kaspia maro. Tamen tie mi sukcesis labori por eldoni la Esperantan kaj anglan partojn de Hafez en 30 lingvoj; koresponde helpis min William Auld.** En Sario ni ankaŭ okazigis kursojn. En Tehrano en la komenco de la revolucio, dum nur du jaroj ni havis 62 kursojn por komencantoj, multajn en moskeoj.

Estis ankaŭ aliaj malfacilaĵoj. Iuj adeptoj propagandis Esperanton kiel atingon de la islama revolucio kaj ion revolucian mem. Tia troa entuziamo estis bedaŭrinde la kaŭzo de la t.n. Esperanto-ŝoko kaj kontraŭŝoko, ĉar preskaŭ ĉiu instruisto de fremdaj lingvoj, precipe de la angla, unuiĝis tutlande kontraŭ ni por protekti sian klasan intereson. Multaj klopodis ataki Esperanton el ĉiu angulo, disvastigi la onidiron ke ĝi estas bahaana aŭ okcidentisma propagandilo, nova konspiro de la neokoloniismo. Tio kaŭzis konfuzon ankaŭ inter ŝtataj respondeculoj. La ŝtato ne kontraŭis Esperanton oficiale, sed ankaŭ ne subtenis; kaj tio kuraĝigis niajn kontraŭulojn por pli forte ataki.

Sed ili ne sukcesis detrui nin aŭ nian ideon. Dum la lastaj 15 jaroj pli ol 900 000 homoj lernis Esperanton je baza nivelo. Eble 10 000 atingis la mezan gradon, 200-300 progresis ĝis vere brila lingvorego.

UL: Ĉu vi sukcesis teni la nivelon de entuziasmo tra pasintaj jaroj?

MHSZ: Jes, ĉiam kaj ankaŭ nun mi vidas multe da entuziasmo en miaj kursoj. Nun oni kredas, ke Esperanto estas vivanta lingva, oni scias pri libroj, gazetoj, pri la Universalaj Kongresoj. Preskaŭ ĉiujare, eĉ dum la milita krizo, ĉ. 20 personoj partoprenis en la UK. Reveninte ili

Intervjuo kun: M.H.Saheb- Zamani:
En Irano - obstino, espero kaj pacienco

§ E-378:
Vicprezidanto de UEA Ulrich Lins ofte profesie vojaĝas en diveraj landoj de Azio. Lastatempe li estis en Irano, kie li kaptis la okazon por paroli kun la legenda fondinto kaj inspiranto de la irana movado, M.H. Saheb-Zamani. Dek kvin malfacilegaj jaroj ne detruis lian vizion kaj lian persistemon.

ULRICH LINS: Pasis nun 15 jaroj ekde kiam vi "lanĉis" la iranan movadon*.
Kiel vi resume vidas la atingojn?

MHSZ: Malgraŭ multaj malhelpoj, mi pozitive rigardas la evoluon de Esperanto ne nur nialande sed ankaŭ en la regiono. Kompreneble, se ni ne havus militon inter Irano kaj Irako, kaj se ni ne havus la situacion en Libano, nia progreso kaj nia influo en najbaraj landoj estus ankoraŭ pli grandaj. Tamen, kompare kun aliaj kulturaj aferoj, Esperanto ne restis malantaŭe, sed ĉiam puŝis sin antaŭen. Mi donu konkretan ekzemplon: Antaŭ 16 jaroj, kiel preparan paŝon por komenci la instruadon de Esperanto, mi faris enketon inter pli ol 10 000 studentoj, ekde mezlernejo ĝis universitato, en malsamaj partoj de Teherano kaj en aliaj urboj de Irano. Mia demando estis: Kio estas Esperanto? Surbaze de tiu statistika specimeno, mi taksis ke inter 100 000 edukitaj homoj, nur 4 personoj iom ĝuste scias pri Esperanto. Nun mi ne havis ŝancon ripeti la eksperimenton, sed mi fidas, ke estus tute inverse: eble nur 4 personoj inter 100 000 edukitaj homoj ne scias pri Esperanto. Tio montras grandan ŝanĝon de absoluta malscio al relative bona informiteco.

spertoj atingitaj sekve de vivo-mortaj bataloj en ege brutalaj milit-kampoj de antagonismaj fortoj.

Tiel, dum 1983, ni rearanĝis Iran-Esperanto-domon, niajn kursojn ktp., pli emfaze sur la kvalito ol la kvanto. Eĉ, ekde vintro de 1982, ni komencis eldoni la bultenon IER (Iran-Esperanto-Raportas).

En la jarlibro de UEA de 1984, unuafoje, Iran-Esperanto-Movado prezentis al la mondo siajn aprobitajn, zorgeme elektitajn ĉef-delegiton, fak-delegitojn, kaj delegiton, entute 6, (vd. IER/30, 5.11.84). Tio efektiviĝis post la movada decido pri la tasko-divido inter la aktivaj iranaj movadanoj. La irana movado surbaze de sia nova strategio, klopodas laŭeble ĉiujare prezenti al la mondo grupon da novaj delegitoj, ĉiu-rilate taŭgaj, kaj fidindaj. Laŭ ni, la jarlibro de UEA devus esti kvazaŭ sankta libro de Esperantujo. Ĝi devus prezenti al la mondo la plej respektindajn ekzemplojn de sia kredantaro. Kvankam, la sanktaj libroj de la religioj, ne kapablas samtempe garantii la sincerecon de siaj kredantoj, tamen Jarlibro devus garantii la humanan karakteron de siaj delegitoj, kaj ilian seriozecon pri Esperanto. Tion la irana movado zorgadas fari sia-flanke, kaj respekto-plene atendas la saman rigardon de ali-landaj movadoj.

Iomete pozitive, tria-faze, nia ŝtato lastatempe jam donis la eldon-permeson al multaj esperantaj libroj.

Resume, kio okazis al Esperanto en Irano, povus tre facile okazi aliloke en la vasta Tria Mondo. Ĉi-tie, en la Tria Mondo, la amase soifanta junularo por progreso serĉas pli facilan ilon por sia celo. Se Esperanto ne povus kontentigi ilin, kaj restos kiel la kluba lingvo, tiel, do, oni ja nek povus riproĉi la akuzantojn, nek kondamni la kabeiĝantajn amasojn.

rekonsideri la movadan strategion. Ĝi devus, pli malpli, ŝanĝiĝi al: "Anstataŭ la kvanton, oni prizorgu plie la kvaliton. La agadoj jam plu ne estu okul-frapaj, sed funde konstruaj! oni zorgeme selektu volontulajn homfortojn por Esperanto. Edukadu ilin resti esperantlingve kreaj, esti movaduloj, per si mem, defendokapablaj, i.a. fake, universitat-nivele akcepteblaj, religio-politike ne tro maldiskrete avangardaj. Ĉar, ni ankoraŭ trovas nin en krizoplena periodo de viva evoluo en la Tria Mondo. Kaj, la cirkostancoj montris klare ke, laŭ la proverbo irana, en tia tempo, "Unu-nura vere lerta batalulo, pli valoras ol cent-miloj da birdo-timigulecaj ŝajn-herooj".

Scienco estas la plej neŭtrala, kaj universale akceptebla atingaĵo homara. Do, oni kunigu la universalan lingvon kun la plej-neŭtrale, kaj universale akcetebla atingaĵo homara. Oni serĉu pli-komunan ol mal-komunan homan atribuon, krean produkton, kaj heredaĵon transmisii internacie, kiel la enhavon de Esperanto!

Baza scienco-teknika literaturo faras Esperanton pli enhavoriĉan, pli serioze konsiderindan, kaj mal-pli skeptike akcepteblan. Reciproke, ankaŭ Esperanto faras la bazan scienco-teknikan literaturon pli amplekse legeblan, vere pli universalan, kaj pli, sia cele, efektiviĝeblan. Kaj, ĉio- ĉi, mem-evidente, kontribuas al pli sincera inter-komprenemo, al pli ekvilibriĝado de la mondo, kaj al pli trankviliĝado de la internaciaj tensioj.

La eldonado de unu baza scienco-teknika teksto-libro Esperant-lingva - kiel pridemandis nin ofte la irananj revoluciaj instancoj, dum la argumentado por, kaj kontraŭ-Esperanto - pli valorus 1000 foje ol cent-miloj da favoraj cirkuleroj, leteraj komplimentoj de iuj ŝtat-estroj, ĉef-ministroj, parti-est-roj, aŭ eĉ solena rekomendo de UN, UNESKO, ktp. Esperanto bezonas verkojn pli palpeblajn, pli praktikajn, kaj ĉiutage uzeblajn, kiel man-librojn pri diversfakaj enciklopedioj, scienco-teknikaj temoj por la junularoj de la Tria Mondo ol la rekomendoj de karmemoraj famuloj dum jarcentoj. Se ni havus la aluditan scienco-teknikan literaturon Esperantlingvan, dum la febra revolucia tempo, malgraŭ ĉio, ni havus la bon-ŝancan okazon facile, kaj arde instali la unuan Universalan Universitaton Esperantlingvan. Tial, la irana Esperanto-movado ek-klopodis reorganizi sin, dum la lastaj monatoj de 1983 - kaj ankoraŭ eĉ pli forte klopodas - laŭ la lecionoj akiritaj, ne pere de super-luksaj, brak-seĝaj filozofiumadoj spekulativaj, sed pere de vere amaraj, ĝisoste senteblaj

inkub-sonĝo por multaj personoj. Fakte, eĉ nura esprimo de simpatio al Esperanto fariĝis vivo-danĝera. Sekve, miloj da komencantoj forlasis la kursojn, kaj ĉiuloke, speciale en moskeoj, kaj lernejoj oni, per si mem, fermis la kursojn. La movadaj aktivadoj ĉesis kaj limiĝis al hejmaj rondoj.

Danke al la senĉesa persisto, batalo, agmaniero, trafaj kaj pravigaj reagoj de MHSZ, finfine la movado transpasis la gravan krizon, se ne-tute la malfavoran atmosferon. Konsiderante la kondiĉojn, saviĝo el ne-direblaj danĝeroj, estis kvazaŭ miraklo, ankoraŭ ne kontentige klarigebla afero, eĉ laŭ MHSZ mem; ekzemple, ege mirinde, ne longe post la atakoj ek-aperis en iu tre radikale dekstra revolucia ĵurnalo (*Sobhe-Azadegan*, 18.8.82), iu absolute por-Esperanta artikolo, kun la bildo de Zamenhof! la verkinto, simile al tiuj tra-mallumaj atakintaj fantomoj, restis - kaj ankoraŭ restas - mistere en nebulo. Tiun-ĉi ne-atenditan subtenon al Esperanto, oni nur povus konsideri - laŭ la nuntempa irana religia ardo, kaj dir-maniero - kiel dian favoron, aŭ eble gracon senditan el nevideblaj helpoj de Imamoj - la islamaj sanktuloj.

Konklude, oni, eble provizore, povus diri, ke en revolucia Irano, unuaonde ek-trakuris iu Esperanto-Ŝoko tro favora, kaj tuj poste, reage frapis ege malfavoran Esperantan Kontraŭ-Ŝokon: Esperanto unuavice renkontis supermezuran bonvenon, kaj ankaŭ ne-antaŭvideblan antagonismon. Tia delira stato, kompreneble mallong-tempe, por la evoluo de ĉiu kultura afero ŝajnas tute ne sana. Sed, ĉu longtempe, probable tio, kiel iu dialektika proceso, povus iam esti utila al Esperanto? Ĉiuokaze, en Irano, antaŭ 1975, el ĉiu 100,000 edukitaj irananoj, apenaŭ troviĝis 10 personoj, kiuj iam aŭdis simple eĉ nur la nomon de la Internacia Lingvo (IL). Sed, sekve de tiuj agoniplene tajfuneskaj epizodoj - por, kaj knotraŭ Esperanto - nuntempe jam ne troviĝas eĉ eble 10 personoj el tiuj 100,000 irananoj, kiuj ne aŭdis, aŭ plej eble, ne scias, minimume, iom pri "la lingvo supernacia - Esperanto"! Tio estas, la evidenta, la trans-iro de la absoluta ne-sciado al la relativa sciado!?

(c) **Tria fazo: Ne favora, kaj ne tre antagonisma:** Iom-post-iom, dum la lastaj monatoj de 1983, la Esperanto-movado de Irano spertis la 3-an fazon - ne favoran, kaj ankaŭ ne akute malfavoran sintenon de la oficialaj instancoj. Tamen, restas ankoraŭ pli ol iom da tiu nigra nubaro de tiama suspekto malhelpa.

Travivante la teruron de la dua fazo, urĝis la fortoj de cirkonstancoj

MHSZ, sukcese organizis, kaj gvidis la sep-monatan Esperanto-kurson kun la fin-ekzameno por oficiroj de la Irana Aer-armeo - plej eble unika en la tuta historio de Esperanto en la mondo (E-o, majo 1981, 97).

Somere de 1981 oni instalis la Iran-Esperanto-Domon por pli koncentri la disajn agadojn, pli interkunigi la Esperantistojn en Irano, kaj pli faciligi la internaciajn kunlaborojn. La Iran-Esperanto-Domo jam funkciis, kiel vigla centro de la movado. Tie, okazis Esperanto-kursoj, aranĝoj, paroladoj, festoj, kunvenoj, kaj movadaj kunsidoj. Aldonendas, ke la Esperanto-Domo subteniĝas de helpoj, kaj kotizoj de siaj instruantoj, lernantoj, kaj aliaj simpatiantoj de Esperanto-movado.

(b) **Dua, tre malfavora fazo:** La komenciĝo de la milito inter Irano kaj Irako (sept. 1980), i.a. kaŭzis ankaŭ suspektoplenan atmosferon en la lando kiel okazas ne malofte en la revoluciaj landoj. Reakciuloj ekis oportuniste kontraŭ-stari ĉian revolucian atingaĵon kaj, avangardaĵon. Tutvee, Esperanto ne estis escepto. Baldaŭ, formiĝis dise kontraŭ-atakoj kaj mis-propagandoj kontraŭ Esperanto. Intertempe, rolis grave ankaŭ la kontraŭ-agadoj de instruistoj pri fremdaj lingvoj, kiel la angla kaj franca, cele subteni siajn postenojn. Ja, Esperanto kun tia subita kaj ĉiu-flanka populariĝo montris sin forta konkuranto de tiuj lingvoj. Estus kompreneble, kvankam ne prave, se estiĝus vole ne-vole subbataloj, akuzoj, kaj eĉ intrigoj kontraŭ E-o, flanke de tiuj, kiuj finance vivtenas sin danke al regado de la angla kaj franca. Kiel jam dirite, oni ankaŭ re-aktualigis la malnovan fi-celan onidiron, kiu atribuis Esperanton al iu kontraŭ islama religia sekto ĝenerale malŝatata, por kondamni, kaj saboti la movadon (v.supren II, p.1).

Vintre de 1982, en kelkaj gazetoj, aperis artikoloj kun severaj akuzoj kaj atakoj al la Esperanto-movado, kiujn karakterizis la manko de la nomoj de verkintoj. En la oficiala organo de la t.n. "Revolucia Gardistaro" (ŝtata instanco), dum la atakoj, oni eĉ nomis la Esperanto-movadon la rimedo de la Internacia Cionismo, kaj nomis la pionirojn de la movado kontraŭ- revoluciaj agantoj en Irano (je 6.3.82). Endas rimarkigi aparte, ke en tiamaj cirkonstancoj de la lando, eĉ malpli severaj akuzoj, povus kaŭzi tro simple persekutadon kaj ekzekutadon.

Dum multaj monatoj Esperanto, kaj ŝajne esperantisto, efektive iĝis

ĉiutage, sed vespere dum unu horo, ili venos al ni diskuti la problemojn, spertojn de ĉiutaga instruado, kaj la morgaŭan programon. Tiele, dum alia monat-trio, ni povus disponigi al la Ministerio ĉ. 10'000 Esperanto-geinstruistojn. Poste, ni povus elekti inter ili 500 aliajn, kaj denove ĉiu el ĉi-lastaj gvidos aliajn 100-personajn kursojn. Do, post alia tri-monata periodo ni disponus pri 60'000 Esperanto-geinstruistoj..." (El la letero de MHSZ al ĈEL, Ĉinio, je 3.3.1983).

La propono volonte akceptiĝis. La Ministerio pri Edukado dissendis cirkuleron (je 22.4.1980) al la mezlernejoj tutlanden kaj invitis la instruistojn pri fremdaj lingvoj, kaj sociaj studoj partopreni E- kursojn. La intensaj kursoj sub la gvidado MHSZ, kaj kolegoj, okazis en la iama klubo de usonanoj en Tehrano, somere de 1980. Entute 675 geinstruistoj lernis instrui E-on (E-o, okt. 1980, 161-163/ HdE, 1.1981,1). Bedaŭrinde, tiu plano ĉesis pro la milito inter Irano kaj Irako, kaj aliaj ne-antaŭviditaj dum-revoluciaj malfacilaĵoj en la lando (kiel super menciita alsendo de la fotokopio de bahaana propagandilo al ministro pri edukado).

Ĉi-faze, Esperanto ankaŭ en Irana gazetaro, jen kaj jen prezentiĝis glore kaj atento-kapte, kiel iu grandioza kultura fenomeno, harmonia al la plej respektindaj ideoj de la ĵus liberiĝinta Irano. Apenaŭ troviĝis ĵurnalo, aŭ revuo, en kiu, oni ne pri-laŭdis Esperanton, dum ampleksaj kaj ilustritaj artikoloj.

Inter la plej sukcesa gazetara agado, ĉi- periode, menciindas tiu de la populara semajna revuo "Ĝavanan" (Junularo). Dum ĉ.1,5 da jaro la revuo sinsekve publikigis Esperanto-paĝon, nome "Lernejo de Esperanto". Sur ĉ-paĝo, krom la regulaj lecionoj de E-o, aperis diversaj sciindaĵoj, kaj informoj pri la landa kaj monda Esperanto-movadoj. La revuo ankaŭ rolis, kiel la bona ponto inter la disaj simpatiantoj kaj lernantoj de Esperanto, kaj la centro de la movado en la ĉefurbo. Iu-sence, per tia servigo de tiu populara naci-lingva revuo, la irana Esperanto-movado ŝparis la superbezonajn elspezojn, mem eldoni apartan periodaĵon kun limigita legantaro (E-o, dec. 1981, 209).

Somere de 1980, okazis i.a. la t.n. kultura Revolucio en Irano. Por ĉ.3 jaroj ĉiuj universitatoj de Irano fermiĝis. Sekve, la Esperanto-agadoj ankaŭ tiu-teritorie, devis ĉesi. La kursoj limigis sin je la lernejoj kaj moskeoj.

Malgraŭ la ek-komenco de milito Iran-Iraka, septembre de 1980,

IV - 1979-1984 : Dum la Islama revolucio

Ĉi-periode, Esperanto-movado spertis tri fazojn rilate al la t.n. revoluciaj instancoj de la lando:

(a) Tra, aŭ eble eĉ tro favora revolucia sinteno al Esperanto: En 1979 ekflamis la fajro de la islama revolucio. La juna Esperanto-movado, kune kun la irana popolo travivis la krizo-plenajn tagojn de la reĝimo-ŝanĝiĝo en la lando. Post la fondiĝo de la Islama Respubliko en Irano (11. feb. 1979), kaŭze de la revolucia furoro, kvazaŭ eksplode, kaj haste, ankaŭ la Esperanto-movado denove ek-prosperis en Irano. La soci-politika neŭtraleco, kaj la kontraŭ-diskriminacia karaktero de la lingvo Esperanto, estis mem favoraj faktoroj fari ĝin des pli bonvena, kaj alloga al la revoluciema Irano. La Esperanto-movado tiu-tempe konservis sian malnovan komenc-paŝan strategion: disdonigi, kaj dislernigi Esperanton, kiel eble plej vaste, t.e. konsideri ĉefe la amas-kvanton. Denove, organiziĝis E-kursoj, kaj aranĝoj, ĉi-foje ne nur kadre de la fakultatoj kaj lernejoj, sed ankaŭ en multaj moskeoj (EPĈ, 7. 1982, p.16/HdE, 5, 1982, p.2).

En 1979, en la sociologiaj lernolibroj de la iranaj gimnazioj, aperis ĉapitroj, entute 25 paĝoj, subtitole "Kulturo kaj Lingvo" pri Esperanto, verkitaj de MHSZ. La librojn legis pli of 1,5 miliono da gelernantoj, kaj konatiĝis kun E-o (E-o, dec. 1979, p. 202/ marto 1980, p.56). Sekve, dekmiloj (entute ĉ.80,000) da pet-leteroj, skrib-rulaĵoj, eĉ telegramoj, alfluis al la Ministerio pri Edukado tra la tuta lando. Resume, ili petis, ke post tia revolucia paŝo pri prezentado de Esperanto en la lernejoj, oni faru la duan paŝon: "Oficialigu Esperanton en Irano, kaj dissendu instruistojn por ĝia instruado"!

Tiu land-vasta postulo, en la tre malfacila komenca tempo de la revolucio, fariĝis granda kultura ŝoko por la plimulto de la funkciuloj. La lerno-petoj multis, sed la eblecoj mankis. Oni petis konsilon de MHSZ. Tiam li prezentis sian planon solvi la problemon jene:

"...Dum la somero, la Ministerio disponigu al ni 300, aŭ 500 geinstruistojn el diversaj partoj de la lando. Ili povus partopreni intensajn kursojn de E-o dum tri monatoj ... Post tri monatoj, ni elektos 100 el ili, la plej sukcesajn. La alia 400 lernigos E-on en la lernejoj ekde la nova lernojaro. Ĉiuj el tiuj 100 elektitaj, kunlabore kun ni, ek-instruos la lingvon al 100 aliaj geinstruistoj. Ili lernigos 4-hore,

III - 1975-1979 : Antaŭ la Islama revolucio

La tria ondo de la irana Esperanto-Movado komenciĝis en 1975-denove per publikado de iu 33-paĝa, pri-Esperanta artikolo en la revuo de la Tehrana Universitato - "La Disfalo de la Babela Turo" Homo, kaj Lingva Revolucio (Daneŝkadeh, n-ro 2, p.115-148, printempo, 1354 H./1975).

La aŭtoro de la artikolo estis la aŭtoro M.H. Saheb-Zamani, universitata profesoro, membro de la fakula komitato pri mensa higieno de Monda Organizaĵo de Sano de UN, verkisto, kaj radio-preleganto pri junulara problemaro, dum 6 jaroj, po 3 programoj ĉiusemajne. Kaj tiel, Esperanto renaskiĝis denove en Irano (E-o, okt. 1975, P. 174).

La aŭtoro komencis sian agadon, unuapaŝe, diskonigi Esperanton tut-nacie: "Kiel eble plej multaj homoj havu iom da scio pri, kaj de Esperanto." (Esperanto-Revuo, dec. 1977, p.207). La strategion priservis sufiĉe bone la jenaj taktikoj:

1) Publika klerigado per amas-komunikiloj, kaj ankaŭ per paroladoj, plej eble divers-loke, en la ĉefurbo, kaj en aliaj urboj.

2) Eldonado de libroj pri E-o perslingvaj, kiuj reeldoniĝis kelkfoje.

3) Eldonado de lerno-materialoj. En 1975 ankoraŭ neniu Esperanta lernilo ekzistis en Irano (E-o, nov. 1975, p.197). La baza lerno-libro de MHSZ, dum 8 jaroj ĝis nun, jam 7-foje reeldoniĝis (entute en 52'000 ekz-eroj).

4) Instruado de la amasaj kursoj de E-o divers-nivelaj, al diversaĝaj, kaj divers-profesiaj partoprenantoj. Okaze de la senprecedenta interesiĝo pri E-o kursoj, en Universitato de Tehrano oni eĉ oficiale deĵorigis du oficistinojn por administri la kursojn por miloj da studemuloj (E-o, dec. 1977, p.205).

Dum nekredeble mallonga tempo, E-o jam fariĝis dise konata en Irano, kiel la plej dezirinda dua lingvo. La Universitato de Tehrano, ne-antaŭ videble, funkciis, kiel la centro de la gvidado kaj organizado de la landa movado. Dum la furoro de E-o land-skale, komenciĝis sinsekvaj petoj kaj invitoj pri Esperanto-instruado. Responde al tiu arda bezono MHSZ komisiis al siaj kompetentaj lernantoj aranĝi divers-loke E-kursojn. La E-o agado etendiĝis al multajn universitatojn, fakultatojn, kolegiojn, lernejojn, kaj klubojn tra la tuta lando.

kaj tradukoj. Tiel, la frua movado daŭris dum 23 jaroj ĝis 1933.

En sia unua ondo, Esperanto en Irano ek-burĝonis, sed, bedaŭrinde, ne fruktodonis. La antaŭ mond-milita atmosfero mal-helpis ankaŭ la evoluon de Esperanto en nia lando.

II- 1933-1975 : La mal- hela periodo por Esperanto

Grand-parte, kun la leviĝo de Nazi-reĝimo en Germanio, ankaŭ tiama por-nazia eks-reĝo, Reza Pahlavi (1875-1942), malpermesis Esperanton kun diversaj stigmatoj kaj akuzoj - interalie, ke la lingvo estas la propagandilo de Bahaanoj, do, anti-islama! Ĉar, ankaŭ kelke da tro entuziasmaj Bahaanoj - kompreneble, ne ĉiuj - mal-atente al (a) tut-enda Neŭtraleco de Esperanto, aparte en la Tria Mondo, kaj (b) la ĝisfunde religia sinteno de la plejmulto de iranaj islamanoj, faris - kaj ankoraŭ faras - tion! Vole-ne-vole, ili disponigis al la diktatora, por nazia, kaj ŝajn-islamo-subtena registaro tiama, ĉia-ajn pretekston por kondamni Esperanton. La nigra ombro de tiaj venenaj antaŭjuĝoj, ankoraŭ sufokante, restas kaj forte malhelpas nin; ekzemple, en 1982, dum ĉio ĝuste ŝajnadis favora al Esperanto, kaj eĉ la Ministerio pri Edukado jam dissendis rekomend-cirkuleron pri la lernado de IL (Internacia Lingvo), subite iu nekonata fantomo malfermis malice sian konspiran dosieron delonge jam forgesitan, kaj alsendis fotokopion de iu bahaana propagandilo, kun pri-Esperanta rubriko de 1916 al la Ministro de Edukado demandante lin: "Ĉu vi estas la Ministro de Islama Revolucio, aŭ Bahaisma subtenanto?" La fotokopio, kvazaŭ eksplode, funkciis, ek-ellasis ĉen-reagan kontraŭ-ŝokon kontraŭ Esperanto! Neantaŭ-pensebla bremsego de antaŭ 65 jaroj, agis kun revolucia febro denove anti-movade. Tranokte Esperanto ŝajnis io tabua, kontraŭ-revolucia, komploto cionisma kaj bahaisma. Eĉ, nura simpatio al Esperanto fariĝis vivo-danĝera!

Tial, la mis-utiligado de Esperanto, kiel propagandilo en la manoj de kelkaj maldiskretaj ekstremistoj inter la anoj de iu religia kredo, kontraŭ la kredo de plimulto de islamanoj, ege bedaŭrinde, aŭtunigis la verdan printempon de Esperanto en sia dua ondo en Irano.

Aliflanke, la konsekvencoj de la ĝenerala krizo de la Dua Mond-milito mem kontribuis baldaŭ, ankaŭ en Irano, al stagnado ekonomia, soci-politika, kaj kultura. Plene regis mal-ordoj, kaj mal-esperigaj kondiĉoj en la milit-okupita lando pere de la aliancitaj povoj. La movado ĉesis komplete dum 42 jaroj!

Esperanto - Ŝoko, kaj Kontraŭ- Ŝoko: M. H. Sabeb-Zamani (MHSZ)

Historia Skizo pri la Esperanto-Movado en Irano: 1910-1984

§ E-379:

La raporto kovras ĉefajn liniojn de du prelegoj, post-diskutoj, demandoj, kaj respondoj en Iran-Esperanto-kunsido (15.11.84), en resuma formo.

La historion de la Esperanto-movado en Irano oni povus dividi en kvar partoj:

I- 1910-1933 : Post la konstitucia revolucio en Irano

La unua ondo de la irana Esperanto-movado ekkomenciĝis per iu du-paĝa artikolo, nome "La Nova Lingvo-Esperanto", kiu aperis somere de 1910 en monata revuo Bahar (*Printempo*, 2-a eld., 1321 H./1942, p.428-429). La revuo mem estis unu elstara frukto de la Irana Konstitucia Revolucio (1285/1906). La verkinto de la artikolo, Jusof Etesam-ol- Molk (1874-1937), hazarde estis la patro de la tre respektinda poetino irana, Parvin Etesami (1916-1941). La iniciato de Esperanto pere de tiu avangarda intelektulo, kaj la revuo mem, grandparte impresis, kaj influis la mensojn de la tiamaj iranaj kleruloj tre favore al Esperanto.

La unua lernolibr-eto pers-lingva aperis en 1915. Iom-post-iom, formiĝis la unuaj klopodoj de irananoj vigligi la iranan movadon de Esperanto. Organiziĝis Esperanto-kursoj, fondiĝis ligoj de Esperanto en Tehrano, Tabrizo, Raŝto kaj Arako, aperis novaj lerno-libretoj, vortaretoj,

La uzo de Esperanto eble atingis sian ponton en la 20aj jaroj, kiam idealistoj alpropriĝis ĝin kiel unu etan paŝon al paco. Kelkaj intelektuloj rigardis ĝin kiel solvon al tiu lingva problemo kiu, laŭ ili, kontribuas al politikaj miskomprenoj, en kelkaj britaj lernejoj, gejunuloj povis studi Esperanton. Sed la intereso malfortiĝis post la dua mondmilito parte ĉar registaroj ne subtenis la lingvon kaj ankaŭ parte ĉar la angla rapide fariĝis la komuna lingvo de komerco kaj vojaĝado. Esperantistoj instigis Unuiĝintajn Naciojn adopti ilian lingvon, sed la organizaĵo jam havas plenajn manojn pro ses oficialaj lingvoj (angla, franca, hispana, araba, ĉina kaj rusa).

Humphrey Tonkin, prezidanto de la Universala Esperanto Asocio en Roterdamo, diras, ke la Lingvo Internacia estas populara en landoj kies lingvoj ne bone vojaĝas, Ekzemple: Irano, Brazilo, Nederlando, kaj la skandinavaj landoj. Konsiderinda koncentriĝo de Esperantistoj ankaŭ troveblas en Japanio, kie la lingvo estis foje uzata por diskutoj inter scientistoj, kiuj parolas malsamajn naciajn lingvojn. Ĉinio uzas Esperanton por faciligi komunikadon inter parolantoj de siaj nordaj kaj sudaj dialektoj kaj subtenas aktivan eldonprogramon. Multajn literaturajn ĉefverkojn oni tradukis en Esperanton, inkluzive la Koranon kaj kelkajn teatraĵojn de Ŝekspiro. Sed Mary Davies, Esperantistino kiu estras hotelon en Heysham, Anglio, plendas, "Ni ne havas ian leĝeran legaĵon".

Kiam ili vojaĝas, multaj Esperantistoj portas insignojn en formo de verdaj steloj por indiki sian esperantistecon, esperante renkonti samlingvanojn. Ili ankaŭ telefonas al kunkonversaciantoj kaj interŝanĝas kasedojn perpoŝte. Diras skoto William Auld: "Mi ebriiĝis en ĉiu lando de Eŭropo kun Esperanto- parolantoj". En ĉiu ajn lingvo, avida konversacianto povas elfabriki imponan soifon je eta guteto de viskio.

Reported by Edward M. Gomez/New York and Paul Hoffeliz/ London
Time, August 3,1987, p.72

Disvastiĝado de la vorto en Ĉinio: J.D. Reed
Kreita lingvo festas sian centjariĝon

§ E-380:

En 1887 Ludviko Zamenhof, multlingva pola okulisto, publikigis libron prezentantan novan lingvon sub la kaŝnomo Doktoro Esperanto. Zamenhof arde deziris ke lia inventita lingvo fariĝu la dua lingvo de la mondo. Kvankam tiu espero estas ankoraŭ ne-realigita, preskaŭ sesmil fervoraj esperantistoj historie la plej granda renkontiĝo- tiel foraj lokoj kiel Japanio kaj Brazilo-- estas ĉi- semajne en Varsovio por honori Zamenhof je la okazo de la centa datreveno de lia lingvo. Ili celebras per diversaj aranĝoj, ĉiuj en Esperanto, plus vizito al la hejmurbo de Zamenhof, Bjalistoko.

Multaj homoj supozas, ke Esperanto estas unu mortanta lingvo, vorta eksperimento kiu simple ne elsukcesis. Fakte, Esperantistoj estas troveblaj tra la tuta mondo. Taksoj pri ilia Marjorie Duncan, 64- jara, emerita instruistino el Sidneo, Aŭstralio, kredas, ke la movado bezonas pli da gejunuloj. Sed, ŝi diras, ili preferus "veturigi aŭtojn aŭ iri surfumi".

Je unua rigardo, Esperanto ŝajnas sufiĉe simpla. La lingvo havas nur 16 facile memoreblajn gramatikajn regulojn-- sen iuj ajn esceptoj-- kaj bazan vortaron konstruitan el plejparte hindeŭropaj radikoj. Fakuloj pretendas, ke preskaŭ iu ajn persono povas lerni Esperanton en cent horoj aŭ malpli. Sed ĉe kelkaj homoj, multnombraj sufiksoj kaj prefiksoj eble komplikos aferojn. La senornama sistemo ankaŭ kapablas trakti multajn idiotismajn frazerojn el aliaj lingvoj kaj ja havas siajn proprajn sukoplenajn sakraĵojn, kiel ekzemple diablo kaj merdo.

syllable of a word. (j sounds like y, ĉ like ch, ĝ like j, ŝ like sh and u like oo0. The no-frills system can handle many idiomatic phrases from other languages, and even has its own earthy expletives, such as diable for hell and merdo for excrement.

The use of Esperanto probable reached its peak in the 1920s, when idealists embraced it as viewed it as a solution to the language problem, which they felt contributed to political misunderstandings;in some Britiwsh schools young sters could study Esperanto. But interest died down after World War II, partly beacouse governments did not support the language, partly because English was fast becoming the lingua franca of business and travel. Esperantists have urged the United Nations to adopt their language, but the organization has its hands full with six official ones (English, French, Spanish, Arabic, Chinese and Russian).

Humphrey Tonkin, president of Rotterdam- based Universal Esperanto Association, says the *Lingvo Internacia* is popular in lands whose languages do not travel wll. Examples: Iran, Brazil, the Netherlands and the Scandinavian countries. A sizable concentration of Esperantists in found in Japan, where the language has sometimes been used for discussions by scientists who speak different languages. China uses Esperanto to facilitate communication between speakers of its northern and southern dialects and supports an active publishing program. Many masterpieces of literature have been translated into Esperanto, including the Koran and some of Shakespeare's plays. But Mary Davies, an Esperantist who runs a hotel in Heysham, England, complains, "We don't have any light reading".

When they travel, many Esperantists wear lapel pins shaped like green stars that signal them as Esperanto speakers, in the hope of meeting fellow speakers. They also call up comrades in conversation and exchange cassette tapes by mail. Says Scotsman William Auld: "I've gotten drunk in every country in Europe with Esperanto speakers". In any language, an avid conversationalist can work up quite a thirst for a wee drop of viskio.

Reported by Edward M. Gomez/New York and Paul Hoffeliz/ London

Time, August 3,1987, p.72

Spreading The Word in China ??: By J.D. Reed
A Made-up tongue celebrates its centenary

§ E-381:

In 1887 Ludovic Zamenhof, a multilingual Polish oculist, published a book introducing a new language under the pseudonym Dr. Esperanto, meaning "one who hopes". Zamenhof fervently whished that his invented tongue would become the world's second language. Although that hope is still unrealized, nearly 6,000 zealous Esperantists-- the largest gathering ever from as far away as Japan and Brazil are in Warsaw this week to honor Zamenhofe on the occasion of the 100th birthday of his language. They are doing so with a variety of events, all in Esperanto, plus a visit to Zamenhof's hometonwn of Bialystok.

Many people assume that Esperanto is a dying language, a verbal experiment that has simply not worked out. In fact, Esperantists can be found all around the world. Estimates of their total number vary widely, form 1 million to 8 million or more. Marjorie Duncan, 65, a retired Sydney, Australia, schoolteacher, believes the movement needs more young people. But, she says, they would "rather drive cars or go surfing".

At a glance, Esperanto seems simple enough. It has only 16 easily memorized rules of grammar-- no exceptions-- and a basic vocabulary built from mostly Indo-European roots. Experts claim that virtually anyone can learn Esperanto in 100 hours or less. But for some, numerous suffixes an prefixes may complicate matters. Accents always fall on the next-to-last

Laŭ la prelego prezentita en Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj,

Grezijono en Julio 1978

EL "Kulturaj Kajeroj (Trimonata Informada Kaj Kultura Revuo), 1986 4, p. 7-8"

la instruado de lingvoj. Lia fako estis psikologio kaj lingvo. La rezulto montris ke, Esperanto estas dekoble pli facile lernebla ol ĉiuj aliaj lingvoj. Li pruvis, ke Esperanto-lernantoj ne suferas, ne kadukiĝas pro la lernado, kion kaŭzas la lernado de aliaj lingvoj; kaj ke psike ili eĉ ĝojas, ĉar ili samtempe vidas ke, ĉiuj aliaj homoj, pli malpli, uzas egalan energion por lerni ĝin, pro tio ke ĝi apartenas al neniu nacio. Do, Esperanto, por la unua fojo, donas la eblecon al psikologoj esplori la diferencon de la personeco de tiuj, kiuj denaske estas Esperantistoj, kaj kreas siajn pensaojn pere de iu logika lingvo, kaj tiuj de alilingvanoj. De Freud ni scias tutcerte, ke 9%10 de la mensaktiveco estas senkonscia kaj ankaŭ nelogika. Kaj de Aristotelo ni scias ke, la interrilato inter parolo kaj penso estas senduba! Sed oni ankoraŭ tute ne scias ĉu estas la menso, kiu kaŭzas la mallogikecon de la lingvo aŭ ĉu estas la lingvo, kiu helpas tiun proceson!

ĉiukaze, Esperanto donas al ni la eblecon malkovri tion, kaj eble multaj konsentas kun mi por diri, ke la homa socio bezonas pli multajn homojn, kiuj pensus kaj agus logike.

lia psika demando estas, ĉu entute, kiam temas pri la plej supraj mensaktiveco, oni povas pensi libere, senhelpe de lingvo? Tiun ĉi demandon eble komprenus homoj, kiuj scipovas pli ol unu lingvon. Sed respondi tion, eble neniu ankoraŭ povas. En tiuj mensostatoj oni vere ne scias ĉu estas la penso, kiu venas antaŭ la vortoj, aŭ ĉu estas la vortoj, kiuj sinsekve venigas la pensojn.

Krom la aspektoj de la lingvaj diskriminacioj, kiujn ĉiu bone konas, ekzistas alia psike, ekonomie kaj ĉiurilate malbona aspekto, kio estas la kaŭzo de multaj aliaj problemoj: la studentoj de la tiel nomataj tria-mondaj landoj, bezonas lerni aliajn lingvojn. Ili memkompreneble elpezaspli da energio kaj mono por elstariĝi en siaj fakoj. Tio malkovas la gravan problemon de la nesufiĉe rapida transiro de la scienco en la Trian Mondon. Ili pro tio restas ĉiam minimume 6 ĝis 10 jaroj malantaŭ la samkvalitaj studentoj de aliaj landoj. Kaj oni ne forgesu la sekvajn psikajn efikojn kaj malegalecojn.

Por solvi la problemojn de maljusteco, malriĉeco, nescio, kaj malsano: lakvar talismanoj de mizero ,oni bezonas la tutan homforton. Sed oni plie devas elspezi nekredeblajn sumojn kaj valoregan tempon, nur por lerni la lingvojn. Espereble, la sperto de Irano kaj aliaj evolu-landoj pri Esperanto povus pripensigi la funkciulojn. Tiom da entuziasmo pri Esperanto en nia lando kaj espereble, post nelonge ankaŭ en multaj aliaj landoj, tutcerte utilus por aranĝi la cirkonstancojn rilate de Esperanto.

malkovro estas unu el la plej gravaj en la historio de la scienco, kies multnombraj dimensioj restas ankoraŭ ne-pristuditaj. Kaj ĝuste de ĉi tie komenciĝas la rilato de Esperanto-komputeroj kaj la teknologio de la tradukmaŝinoj. Oni ja povas trovi multon ĉirilate en ComputerWeekly kaj en la esploroj de Prof. Bruce, usona samideano de la universitato de Illinois. Do, se vi jam aŭdis, aŭ aŭdos, ke Esperanto estas la plej amata lingvo de la komputeroj, vi ne tro miru!

Alia interrilato de psikologio kaj Esperanto estas la korektada periodo en infanaĝoj. ĉiuj infanoj, sen escepte, kiam komencas paroli, havas tre malfacilan, eĉ dolorigan, periodon, kiun oni povas nomi la periodon de netiel, sed tiel ĉi .Tio signifas ke, kiam infano aŭdas kaj lernas orele la gepatran lingvon, ĝi kutime, post nelonge faras kaj eldiras vortojn, kaj konstruas frazojn, kiuj, kvankam tute logikaj kaj kompreneblaj, tamen ne estas akcepteblaj, ĉar ili ne estas tiel, kiel la plenkreskuloj uzas ilin, nelogike kaj ofte tute senracie. Do, infanoj devas atendi dum jaroj, lerni kaj aŭskulti, kiel la aliaj uzas la lingvon, por ke ili povu parkere utiligi ĝin. Tiel la korektadaperiodo por la simpla kaj logikema menso de infano estas ĝuste la batalperiodo de kontraŭlogiko kontraŭ logiko. Kaj ĉiuj bone scias, ke ĝi restas fine, la vivdaŭra interbatalo, kie la venkinto ĉiam estas la kontraŭlogiko. ĉar, ĉiuj neartefaritaj lingvoj estas la plej belaj simboloj de kontraŭlogiko. Malfeliĉe, tiu interbatalo neniam ĉesos kaj ĝi restas ĝis la morto, kiu feliĉe liberigos nin de tiu eterna problemo de la lingvoj.

Tial la vidpunkto de psikologio, la korektadaperiodo ĉesas nur tiam, kiam la menso de la homo estas je la dispono de kontraŭlogiko. Alidire, post la venko de imito super kreiveco, la rego de aŭdaoj super mens-kreaoj, ja, nur por akordiĝi kun la kutima eraro de la respektivaj socioj. Kiom perdiĝas de la homa personeco, kiu tiel restas kaŝita? Kaj la kialo de tiu ĉi manko kaj perdo estas memevidenta: ĝis nun ekzistis neniu socio kun logika lingvo. Sed poste, kiam oni dolorige akceptis kontraŭlogikon, oni klopodas denove dolorige lerni logikon kaj logikan pensmanieron, ĉar oni devas lerni kaj matematikon kaj logikon! ĉu ne ridinde?

ĉu oni iam pensus kaj serioze studus, kian negativan efikon havas tiu fundamenta instruo de kontraŭeco, en la komenco de la vivo kaj mensevoluo, sur la ekfloro de la personeco? Laŭ mi, tia instruado certe multobligas la neracian pensmanieron ĉe la homo, kiun ni ĉiumomente konstatas dum nia vivo.

harndike, la fama usona psikologo malkovris en 1922 ion novan pri

Psikologio, kaj Esperanto: J^. A. Sadigi

§ E-382:

La unua demando tiurilate estas: ĉu Esperanto havas pozitivan influon aŭ efikon sur la personeco de ĝiaj parolantoj, speciale sur la infanoj, kiuj denaske lernas ĝin? La respondo, laŭ psika vidpunkto, estas definitive jes . Kial?

ĉilate Esperanton kaj psikologion oni malkovras ion grandiozan pri psikologio, pri kiu, ĝis nun, nek psikologoj nek fizikistoj trovis kontentigan respondon. Kiam oni parolas, aŭ pli bone, kiam oni diras siajn pensojn per vortoj, oni transformas ian psikan kaj neparolan energion al ia parola aŭ buœa energio. Tiu ĉi konstanta transformado de energio estas la komuna temo inter psikologio, fiziko kaj lingvistiko.

ĉu, oni pensu kiom da funkcioj aŭ œlosiloj bezonas la cerbo por elfari tiun transformon. Do, tiam, oni tuœas la interrilaton de la menskapablo kaj la nombro de la gramatikaj reguloj de la lingvoj. En iuj tiel nomataj ne-artefaritaj lingvoj, ĉiuj reguloj estas funkci-butonoj de tiu transformiga aparato de la cerbo: transformi ne-parolan energion al verba energio. Kaj ĉi tie venas la grava demando: la regulojn de kiuj lingvoj oni povas modeligi, kiel la plej bonaj, por tiu komputero, la homa cerbo? ĉu tiujn de la sanskrita, kiuj estas 4000, ĉu tiuj de multaj aliaj, kiuj pli malpli estas 2500?

Esperanto, efektive, donas al ni la modelon aŭ la matricon de la minimuma nombro de la respektivaj butonoj por tiu ĉi transformado. Laŭ Esperanto-fundamento, la homa menso bezonas nur 16 principajn kaj 100 ne-principajn regulojn aŭ butonojn por fari tiun transformadon. Tiu ĉi

vendi la Robajojn de Kajjamo. Ankaŭ Esperanto, per si mem, havas problemojn en nia medio. Tamen Kajjamo, Esperanto kaj la centjara jubileo ensemble ekfariĝis subite la krono de la libro-publikigado ...

"Cetere, la nura kompostado, presado, bindado kaj publikigado, dum malpi ol tri semajnoj, en iu tre revolucibatita lando post okjara milito kaj neimagebla inflacio, manko de papero kaj malabundeco de multaj aliaj necesaĵoj, estas pruvo de senlima, kaŝa, fortega, potencialo malantaŭ la fasado de la Tria Mondo, pri kiu mi ade atentigis mian kolegaron en Oriento, en Okcidento!"

La 1-an de decembro la tutlanda kandalo de la irana televido dediĉis parton de la programo "30-Demanda Konkurso" al tiu libro, emfazante precipe la Esperantan sekcion.

Esperanto Revuo, 1988. februaro/p.32

Eksterordinara eldono en Irano

§ E-383:

La jena raporto estas ĉerpita el letero de M.H. Saheb-Zamani al G. Waringhien.

"Okaze de la Semajno de la Unua Internacia Libro-Ekspozicio en Tehrano, 6-13a de novembro 1987, la Ministerio de Informado urĝe proponis al s-ro M. Ramezani, eldonisto kaj mia bona konato, tujan eldonon de [la Robajoj de Omar] Kajjamo, multlingve, por la ekspozicio. La tempo por li disponebla estis tre streĉa - nur tri semajnojn ĝis la malfermo de la ekspozicio. Kvin tagojn antaŭ la malfermo, s-ro Ramezani sciigis min pri la afero. Mi proponis, ke li enmetu ankaŭ la Esperantan version de la robajoj. Fine, kvazaŭ mirakle, la libro eldoniĝis ĝustatempe, en 712 paĝoj kaj 30 lingvoj, kun sepkoloraj iraneskaj ornamaĵoj ĉe la marĝenoj, en 10 000 ekzempleroj. Normale la procezo eldoni tian verkon daŭras du jarojn en nuntempa Irano.

"En la libro troviĝas 210 el viaj belaj robajoj, inkluzive de parto de via enkonduko. Feliĉe, ni povis eldonigi ankaŭ la emblemon de la Centjara Jubileo de Esperanto... kaj vian foton [la sola krom tiu de Fitzgerald, la angla tradukinto] ... Vi iam esperimis la deziron, ke robajoj havu miniaturojn. Inter la Esperantaj robajoj troviĝas du koloraj kaj ses nigroblankaj miniaturoj, el entute 86 ... La enkondukaj vortoj de la eldonisto aperas kvarlingve: perse, arabe, Esperante kaj angle.

"En la ekspozicio oni nekredeble bonvenigis la eldonon de kajjamo, kaj oni jam priparolas ĝian baldaŭan elĉerpiĝon - kvankam, Iran-norme, ĝi estas - tre multekosta ... Dum la lastaj jaroj ĝis nun, neniu rajtis eldoni aŭ

Per enigmo la ĉef-magon
Lastvespere mi alfrontis,
Kaj la solvon de l enigmolia povo vidis klare.
L in ridantan, gajan, kun pokal
En mano mi observis,
Dum cent specoj de vidaĵo
Speguliĝis enpokale.
Diris li: L amiko,kiu honorkronis pendumilon,
Kriis ĉar ĉielsekreton li malkovris malavare.
Mi: ĉi tason mondreflektan,
Kiam donis la saĝega?
Li: La tagon, kiam blukupolon
Kreis li memstare.
Se favoro de l' Spirito Sankta
Ree donus helpon,
Tion, kion Kristo faris, povus aliul egale.
Oh, Hafez ,la mago diris,
Plendas via kor jam kare!
EGU
La Robaioj: 2a eld. 5,45 EUR; 3a: 15,00 EUR,
Poemoj de Omar Kajjam, Trad. G. Waringhien, 1994, 2,40 EUR.
Rubaiyat of Omar Khayyam in 30 languages, Padideh, 1987.84,00

Kontakto/ n-ro 182 (2001:2)/ PP. 8-9

tombo troviĝos en loko, kie en la printempo la norda vento ŝutos florojn sur min.

Kajjam estas plej konata ne pro siaj longaj laboroj super sciencaĵoj, sed pro siaj poemetoj, nomataj Robaioj. Tiujn li senzorge semis tra sia vivo, laŭ la hazardo, dum solecaj inspiro-momentoj kaj konversacioj kun fidindaj amikoj. La kolektantoj kaj eldonantoj de la poemetoj ankaŭ estis tiuj amikoj, ne li mem. 211 Robaiojn de Kajjam tradukis rekte el la persa en Esperanton profesoro Gaston Waringhien kunlabore kun profsoro M.H. Saheb-Zamani.

Mistikulo Hafezo

Hafezo, alia mondfama poeto persa, naskiĝis ĉirkaŭ 1320 en la historia urbo Ŝiraz. Li estis granda mistikulo. Li forpasis en 1388 kaj entombiĝis en sia naskiĝurbo.

Hafezo estis lia pseŭdonimo, kiu signifas homon, kiu parkeris la tutan Noblan Koranon. La angla orientalisto A.J. Arbery {Arberi} skribis pri li: Laŭuniversala interkonsento, Hafezo estas la sublima majstro de la arto gazalo poezia formo, iom simila al liriko .

Hafezo estas ĉie rekonata kaj citata. Germana verkisto J.W. Goethe {Gote}, unu el la multnombraj admirantoj de Hafezo, en sia Okcident-Orienta divano skribas en la poemo Al Hafez:

Ĉion ĉiu volas, ci scias,
Kaj kion jam ci komprenas,
Pardonon, Majstro kiel ci scias,
Vin ofte mi trotaksas.

(el West--stlicher Divan,
Insel Taschenbuch 1974, p. 25-26)

Okaze de la 600-jara datreveno de la forpaso de Hafezo, la plej brila stelo en la persa poezio, UNESKO solene jubileis en Ŝiraz (19-24 Septembro 1988). Je tiu okazo la eldonejo Padideh, pro la instigo kaj persisto de profesoro Saheb-Zamani decidis piublikigi tre luksan volumon de la gazaloj kun abundaj miniaturoj en 30 lingvoj. Profesoro Saheb-Zamani invitis sinjoron William Auld {Viljam Old}, renoma poeto brita-Esperanta, kunlabore traduki por la unua fojo la gazalojn en Esperanton. La gazaloj estis zorge elektitaj de hafezologoj, muzikistoj kaj poetoj el entute 495 gazaloj. La anglaj kaj Esperantaj gazaloj tradukitaj de Auld vers-verse, kvalite, enhave kaj kvante ĝis 90% proksimas al la persaj originaloj. Ni fine gustumu fragmenton el ili:

Kajjamo & Hafezo

§ E-384:

La norda vento ŝutos florojn sur min

en Irano floris mistikismo kaj poezio apud majstra scienco. Ofte eĉ unu kaj sama persono povis esti kaj sciencisto kaj mistikulo

Ĵila Sedighi, Irano

Sufismo estas islama skolo, kiu serĉas rektan kontakton kun Dio. Ankaŭ en Irano floras sufismo, kiu dum jarcentoj inspiris multajn aŭtorojn al majstraj verkoj.

sciencisto Kajjam

Omar Kajjam, la mondfama poeto, naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1040 en la nordorienta parto de Persio, apud Niŝabur. En la universitato de tiu urbo li studis filozofion, juron kaj historion, sed distingiĝis inter la studentoj precipe en matematiko kaj astronomio/astrologio. ŭi-lastaj sciencoj ofte rilatis al naturismo. Kajjam poste publikigis diversajn verkojn en la araba kaj persa, inter ili natursciencan verkon, en kiu li donis partan solvon al la kubaj ekvacioj, atingante, laŭ moderna fakulo, eblela plej altan pinton de la mezepoka matematiko .

En la sama jaro, 1074, kiam aperis tiu verko, Kajjam fariĝis direktoro de fama observatorio en Merv. Kune kun sep kolegoj li estis komisiita reformi la persan kalendaron. El ilia laboro rezultis nova kalendaro, kiu postulis korekton de po unu tago post ĉiu 3770a jaro iom pli perfekta ol nia nuna kalendaro, kiun oni devas korekti post ĉiu 3300a jaro. Omar Kajjam mortis ĉirkaŭ 1123 kaj estis enterigita apud sia naskiĝurbo, sub branĉoj de persikarbo kaj pirarbo, kaj estis plenumita lia profetaĵo: Mia

ek-manifestas resume la komunan estetikan aprezon de zorge elektitaj fakuloj, beletre altkultivitaj gustoj de Hafez-samlingvanoj samtempaj en Irano.

La vers-tradukaĵoj de Auld precizas- pli malpli, vers-verse, kaj kvante, ĉirkaû ĝis 95 elcentoj, proksimumiĝas al la persaj originaloj. Kvalite, kaj enhave, preskaû ĝis 90 elcentoj, ili reflektas la delikatan etoson de persaj gazaloj.

Pro specialaj karakterizaĵoj kulturaj, vort-kunsignifaj, malsamaj kampoj de idearaj asocioj, ktp, de iran-islama medio, atingado al ĉirkaû 10 elcentoj restaj, traduke tute maleblas.

Tial, certagrade, oni povus aserti, ke la Gazaloj de Hafezo, ne nur en Esperanto, kiuj ankoraû ne havas komparan eblecon - sed, eĉ en la angla, en kiu dum lastaj du jarcentoj, multaj poem-tradukistoj jam klopode vers-tradukis ilin, la poem-tradukaĵoj de Auld inter ĉiuj aliaj, forme kaj enhave, estas la plej fidelaj al la originalo. Tiel, William Auld, iros por ĉiame aparteni - sam tempe, kaj ĝuste - al la tri kulturaj alt-sferoj de persa, angla, kaj Esperanta. Li akompane kun Hafezo, kaj siaj Gazaloj, aliĝis jam al la regno de eternuloj. Al li la iniciato al tiu pint-monto de parnasulaj - la Dioj de poezio - estu beata. Dankon sinceran, gratulon ĝisfundan de ni al li, bene sekvu lin.

Tehrano, 1.11. 1988

30 - Lingva Hafezo: M.H. Saheb-Zamani

§ E-385:Antaŭ-Parolo - II

La dulingva - Esperanta-angla - vers-traduko de Hafezaj Gazaloj fare de William Auld, la renoma skota poeto, aparte por ĉi eldono, sen ia ajn flatado, estas verko unika - unika multe- aspekte:

Ĉi verko estas aparte respondo al la alvoko de UNESKO por Solena 600-jara Jubilea Datreveno de la morto de Hafezo - la majstro de perslingva Gazalo - mondskale.

Estas unuafoje, ke la Gazaloj verse prezentiĝas, enkondukiĝas en Esperanto-literaturon. Estas unuafoje, ke peoto, samtempe dulingven - Esperanten kaj anglen - tradukas la gazalojn verse el tria lingvo - el la persa. Estas unuafojo, ke Esperanto, kiel pontolingvo, peras la verstradukon de la gazaloj elperse anglen. Tial, ankaŭ unuafoje estas, ke la komparado de sublima esprim potencialo de la Internacia Lingvo inter persa, Esperanta kaj angla ekebliĝas.

La gazaloj estas zorge elektitaj el 495 gazalaro de Hafezo (Gazvini eldono, Tehrano). Tamen, la elektado ne estas - kiel ordinare - laŭ iu individua, unupersona, propra gusto. Sed pro tio, aparte por ĉi jubilea eldono, kaj unuafoje, ni pri-demandis de cent poetoj, muzikistoj, kaj Hafezologoj de nuntempa Irano pri siaj opinioj. La koncerna enketo, i. a., vortis jene: "Kiuj estas la kvin, laŭ vi, plej belaj gazaloj de Hafezo?". De la rezulto - el ĉirkaŭ 50 iam unue elektitaj - 17 Gazalojn ni selektis denove por ĉi eldono.

Tiele, la anglaj, kaj la Esperantaj gazaloj tradukitaj fare de William Auld, i.a., estas la frukto de la unuafoja mini-referendumo pri Hafezo. Ili

Hafez ne altiris mian fidon. La poemojn de Hafezo mi tiam ne konis; sed mi ja konis la poemformon gazalon, kun ĝiaj apartaj ecoj. Kaj preskâu nenie inter la anglaj tradukoj montriĝis emo reprodukti aû eĉ sugesti tiun malfacilan formon. Kaj nenie sentigis al mi aparta voĉo de unika poeto, kia nepre devis esti Hafezo.

Sekve mi proponis al Prof. Saheb - Zamani , ke ni apliku metodon , kiun jam pli frue mi sukcese uzis en similaj cirkonstancoj .Mi proponis , ke li havigu al mi por ĉiu tradukota poemo la originilan tekston (sed transliterita per esperantaj literoj); por ĉiu aparta vorto, eventuale frazo, laûvortan, kaj kuntekstan klarigon en Eseranto pri ĝia signifo; noton pri la ritmoj uzitaj kaj prio ajn ne per si mem evidenta. Mia kolego konsentis, kaj krom la postulitaj informoj li sendis al mi por ĉiu poemo ankaû prozan anglalingvan tradukon fare de Wilberforce Clarke.

Pere de tiu materialo mi komencis mian laboron kaj liveris kvinon da tradukoj. Sed en printempo 1988 mia sanstato degeneris kaj sekve de tio mi devis interrompi la laboron pro fizika malforteco kaj konsekvenca mensa laciĝo. Nur somere mi povis repreni la taskon, kun la donita limdato jam treege proksima.

Pro mia malsaniĝo la nombro de miaj tradukoj, do, draste reduktiĝis; mi tamen liveris tradukojn de 17 gazaloj. Lâu mia kutimo, mi tradukis per la sama nombro da versoj kiel en la originalo. Mi provis almenâu imiti, se ne ĉiam tute ekzakte, la originalajn ritmojn. Kaj en 11 tradukoj mi sukcesis imiti la rim-skemon, kiu en gazalo ripetas la samajn rimsonojn tra la tuta poemo. Pri la entuta sukceso de miaj tradukoj juĝos la afablaj legantoj: Ili estu indulgemaj.

Kiam mi liveris la unuajn tradukojn en Esperanto, Prof. Saheb-Zamani proponis, ke mi traduku la poemojn ankâu en la anglan. Denove lia propono tre plaĉis al mi, ankaû pro tio, ke laû mia scio ne aperis jam de pli ol 50 jaroj nova traduko el Hafezo. Mi do plenumis la taskon, kaj sciiĝis, ke oni aperigos ankaû miajn versojn en tiu ĉi volumo.

Mi ne povas sufiĉe esprimi mian dankemon al s-ro Saheb-Zamani pro tio, ke danke al lia propono kaj skrupula kunlaboro mi povis iom intime ekkoni la verkon de ankorâu unu el la grandaj poetoj de tiu ĉi mondo, kies ombron mi salutas admire kaj simpatie.

Dollar, Skotlando
5 okt 1988

30 - Lingva Hafezo: W. Auld

§ E-386:

Antaŭ-Parolo - I

Dum la lastaj tagoj de 1987, post eldonigo de belega kaj mirinda volumo de la poemoj de Omar Kajjamo en 30 lingvoj, skribis al mi mia kolego Prof. M.H. Saheb-Zamani pri propono de la Nacia Komisiono de UNESKO en Irano kaj la irana Ministerio de Informado, ke la eldonejo Padideh transprenu la respondecon eldoni la Gazalojn de Hafezo, kun ties plej bonaj tradukoj en 20-30 lingvoj. En 1988 oni memoras la 600an datrevenon de la forpaso de tiu elstara poeto, kaj la volumo devos formi parton de la koncernaj ceremonioj. Memkompreneble Prof. Saheb-Zamani forte deziris, ke ankaŭ tradukoj en Esperanto aperu en tiu grava volumo.

En la kazo de Kajjamo oni feliĉe jam disponis pri la belaj tradukoj de Prof. G. Waringhien; sed gazaloj de Hafezo ankoraŭ ne troviĝis en Esperanto. Pro tio Prof. Saheb-Zamani invitis min traduki 20-40 gazalojn por enmeto en la volumon. Tiucele ĉar mi ne scipovas la persan lingvon - li sendis al mi amason da materialo en angla kaj germana lingvoj, inkluzive de anglalingvaj tradukoj de Hafezaj peomoj fare de Gertrude Bell (1897). Tiun materialon mi tralegis kun kreskanta entuziasmo. Entrepreni la traduktaskon mi tuj tre volis.

Sed traduki ne el la originalo, sed al alilingvaj verstradukoj ŝajnis al mi tute nekonvena, kaj estus kontrâua al grava principo de mia 40-jara sperto sur la traduka kampo, nome: neniam traduki lâu traduko, sed ĉiam, iel, lău originalaj tekstoj. Krom tio, la ekzistantaj verstradukoj anglaj el

mondskalajn scienc-teknikajn kaj, literaturajn sciojn pere de tiu facile lernebla lingvo; oni plie montris diversajn E-kunsidojn kaj kongresojn. Poste, la portreto de L.L. Zamenhof venis sur la ekranon, kun la indiko, ke tiu pola kuracisto kreis, antaŭ 110 jaroj, lingvon, kiu certe povus solvi unu el la plej gravajn problemojn de nia jarcento, kaj ke espereble en la jaro 2000 helpe de Eo ni havos pli interkompreniĝeman mondon. Mi mem bedaŭrinde ne spektis la elsendon, sed mi enketis multajn, kiuj atente rigardis ĝin. Ĉi tie, en Irano, la elsendo konvinkis plurajn skeptikulojn.

Ĉar oni opinias, ke CNN elsendas nur, kiam ĝi estas certa pri la plano.

Heroldo de Esperanto / 20 Feb. 1998

Esperanto en CNN: Ĵila Sedighi (Saheb- Zamani)

§ E-387:

Vendredon, la 30an de januaro 1998, je la 9-9.30 GM (12.30-13 en Tehrano), la fama usona novaĵ -agentejo CNN , en sia Eŭropa- Azia programo, havis ege bonan, tute pozitivan elsendon pri Eo.

Dum tiu duonhora programo oni argumentis ke Eŭropaj landanoj faris sian plejeblan klopodon por fondi Eŭropan Union, kaj unuforman ekonomian modelon. En tiu ĉi gravega movado, la plej grava elemento devus esti, tamen, pli bona interkompreniĝo.

Nun, post kelkaj monatoj, kiam grandajn problemojn oni preskaŭ solvis sur la vojo de tiu unuiĝo, alia pli grava problemo baras la vojon al tiu interkompreniĝo. Inter 15 membrolandoj 11 ankoraŭ atendas la solvon de lingvo-problemo de EU. Pli bona interkompreniĝio estis la unua faktoro por la fondo kaj stabiligo de EU, sed nun, verŝajne, pro lingvo-baroj, tiu interkompreniĝo devige donas sian lokon al miskompreno kaj eĉ malamikiĝo (pro la akcepto de unu lingvo kaj rifuzo de alia). Estas ridinde - daŭrigas la elsendo - ke en tiu interkompreniĝa unio, dum nur kelkaj unuaj monatoj, oni eluzis 800 milionojn da paperfolioj de tradukaĵoj por interkomprenigi la membrojn pri la diskutitaj aferoj de EU.Ĉu ene de EU, ĉu ekstere, la nura sola respondo al tiu ĉi granda malhelpo estas la supernacia lingvo Esperanto.

Poste oni montris gesinjorojn en E-kursoj, kiuj facile lernis la lingvon, oni parolis en Eo pri la gramatiko, oni montris grandajn bibliotekojn kun E-sekcioj, E-lingvajn librovendejojn en preskaŭ ĉiuj eŭropaj ĉefurboj kun la emfazo, ke ordinaraj homoj povas akiri

SINGAPURO: s-ro M. David Saul Marshall, ambasadoro, kaj f-ino Then Chen Chao, komisiito pri Unesko-aferoj: "En Singapuro ni havas grandan lingvan problemon, kaj parte la angla, parte la ĉina provas ĝin solvi. Tamen ni rekonas la lingvajn malfacilaĵojn en la internaciaj organizaĵoj, kaj ni sekvas kun atento la evoluon de diversaj ideoj tiurilataj.

TUNIZIO: s-ro Mustafa Masmoudi, ambasadoro: "Kvankam la multiĝo de lingvoj, kiuj altrudiĝas en la internaciaj organizaĵoj, kaj la malfacilaĵoj konstante kreskas, mi havas la impreson, ke oni persiste evitadis tuŝi tiun temon. Por lerni unu fremdan lingvon oni devas al ĝi dediĉi multe da tempo kaj energio. Estas evidente tial, unu komuna lingvo estas la solvo de la problemo. Mi ne sufiĉe konas Esperanton por povi pledi por ĝi. Tiurilate mi estas sen antaŭjuĝoj."

* * *

Jen nia unua rikolto. Ĉu ni haltu ĉe tio? Neniukaze, ĝi estas ja nur la komenco de io, kio povas malfermi novajn perspektivojn al nia Movado. Sed por tio ni bezonas pli da homoj kapablaj kaj sindediĉaj, pli da mona helpo. Pri aferoj tiurilataj bv. skribi al:

(B. Kidriĉa 15, YU-24000 Subotica, Jugoslavio.)

Esperanto Revuo / 1982 Februaro/ p. 25-28

Esperanton en ĉiujn kontinentojn, ĉar ĝia celo estas kunligi ĉiujn homojn per reciproka interkompreniĝo."

HINDA UNIO: s-ro L. Rahman, ambasadoro: "En internaciaj institucioj ekzistas konstanta rivaleco inter la grandaj lingvoj, kiu forprenas multe da tempo kaj mono. La apero de Esperanto en tiu areno povus fini tiun staton, ĉar multon oni povus diri favore al Esperanto kiel neŭtrala laborlingvo en internaciaj rilatoj."

INDONEZIO: s-ro Achjani Atmakusuma, ambasadoro: "Ni devas rekoni, ke la adopto de komuna neŭtrala lingvo kiel Esperanto alportus profundajn ŝanĝojn ne nur en la sistemo de kunvenoj, sed ankaŭ en la homaj rilatoj inter la diverslandaj ... Per la adopto de unusola lingvo grandaj monsumoj liberiĝus kaj estus uzeblaj por solvado de aliaj pli gravaj problemoj.

JAMAIKO: s-ino Elaine Melbourne, anstataŭa konstanta delegito: "Ĉiu protesto kontraŭ la angla kaj franca lingva ŝovinismo ŝajnas krio de eta knabo en la dezerto. Tamen nun, kiam la grandaj internaciaj organizĵoj ekstudis serioze ĉiujn aspektojn de internacia komunikado, ni esperu, ke ili memoros pri la ekzisto de Esperanto kaj ĝiaj vastaj ebloj por ĉesigi la tension en la interhomaj rilatoj kreitan de lingvaj baroj."

KUBO: s-ino Rita Solis Ferreiro, ŝarĝito pri Uneskoaferoj: "La ideo de Esperanto estas bona ... Ĉiuokaze plej urĝe bezonas ĝin la movado de nealiancitaj landoj, kaj eble ĝi estos ankaŭ la unua por adopti ĝin, ĉar ĝi estas libera de profundaj antaŭjuĝoj pri lingva supereco. Post ĝi verŝajne sekvos Unesko kaj UN."

NIGERIO: s-ro M.M. Musa konsilanto: " La konkurenco inter la grandaj lingvoj en la internaciaj organizaĵoj alvenis al la punkto kiam lingva kaoso minacas.

Tial la ideo pri enkonduko de Esperanto venas en la ĝusta momento."

PERUO: s-ro Luis Felipe Alanco, ambasdoro: "La ideo de Esperanto estas tiel perfekta, ke al multaj ĝi ŝajnas utopio. Tamen ĝi estas la sola lingvo kiu povas kontraŭstari al lingva imperiismo de la grandaj lingvoj."

RESPUBLIKO JEMENO: s-ro Abdul Rahman Al-Haddad, ministro:"La adopto de tiu internacia lingvo flanke de la movado de nealiancitaj landoj estas tre oportuna, des pli ke tiu movado sin dediĉas al la kontraŭstaro al ĉiuspeca, do ankaŭ kultura, superrego de kelkaj potencaj nacioj, kaj luktas por ke la mondo ne konsistu el grandaj kaj malgrandaj, sed el egalrajtaj partneroj."

Reprezentantoj c^e Unesko:

AFGANIO: s-ro Rafi Samizay, ŝarĝito pri Uneskoaferoj: "Nun, sciante iom pli pri Esperanto, mi havos la eblon defendi tiun interesan kaj utilan ideon, kiam venos la okazo. Ĉar ni devas esti konsciaj, ke la uzo de iu nacia lingvo en internaciaj rilatoj alportas kun si ankaŭ la ideojn, antaŭjuĝojn kaj miskonceptojn ligitajn al la koncerna lingva. La uzo de iu nacia lingva signifas diskriminacion: avantaĝojn por iuj, malavantaĝojn por aliaj."

ALĜERIO: s-ro Abdelatif Rahal, ambasadoro: "La nuna kaosa stato pri la lingva problemo en la internaciaj organizaĵoj ŝuldiĝas al la konkurenco inter la plej potencaj nacioj por altrudi sian lingvon kaj tiel akiri plian avantaĝon. Esperanto, kontraŭe, ne altrudas sin sufiĉe forte, ĉar ĝi ne havas ian kaŝitan intencon.

Tamen ĝiaj avantaĝoj estas evidentaj. Ĝia enkonduko helpus la malgrandajn naciojn kaj etnajn grupojn konservi sian kulturan identecon. Tio signifus por ni duan liberiĝon, la kulturan senkoloniiĝon."

CENTRAFRIKA RESPUBLIKO: s-ro Gaston Azibolo, ŝarĝito pri Unesko-aferoj: "En Esperanto mi vidas ĝian pli vastan, tutmondan projekcion, sen limoj kaj sen rivalecoj. La iniciato enkonduki ĝin en la movadon de nealiancitaj ŝtatoj estas bonega, kvankam la afero ne devas halti tie."

EBURA BORDO: s-ro Anouma R. Pierre, konsilanto de la ambasado: "La granda avantaĝo de Esperanto estas, laŭ mia opinio, ke ĝi ne altrudas al siaj uzantoj iun eksteran kulturon, sed permesas al ĉiuj evoluigi libere siajn proprajn lingvon kaj kulturon, kaj uzi Esperanton kiel praktikan komunan laborilon. Sen ia dubo valorus enkonduki ĝin en la internacian uzon, eĉ se komence nur eksperimente."

EGIPTIO: d-ro Chams El-Dine El-Wakil, ambasadoro: "pro ĝia universaleco mi estimas Esperanton. Mi deziras kuraĝigi kaj helpi vin, kiuj laboras por tiu nobla ideo. Eble vi trovos iom da rezisto ĉe la araboj, kiuj tre fieras pri sia lingvo. Sed tiu rezisto malaperos kiam ili konsciiĝos, ke Esperanto celas kunligi la parolantojn de la araba kun la tuta homaro."

GABONO: s-ro Agustin Ze Mezui, konsilanto. "Esperanto jam pruvis sain vivokapablon en multaj formoj. Pro tio valorus elprovi ĝin ankaŭ kiel interkomprenilon en la grandaj internaciaj organizaĵoj kiel UN, Unesko kaj tiu de la nealiancitaj landoj."

GANAO: s-ro Josef Adusei, konstanta vicreprezentanto: "Kompare kun provo de afrika lingvo mi multe pli estimas la ideon enkonduki

NEPALO: s-ro M. Bhat, konsilanto: "Mi certe subtenos la enkondukon de Esperanto, ĉar nun ni uzas alies lingvojn per kio ni libervole akceptas malavantaĝon en ĉiu diskuto. Sed alternativon ĝis nun ni ne havis."

PAKISTANO: s-ro Ibnul Hasan, ĉefredaktoro, membro de delegacio: «Lingvo estas tre grava faktoro en la identeco de iu popolo. Tial Esperanto povas havi estontecon kiel universala interkomoprenilo kaj komunikilo, tamen ne kiel alternativo por nacia esprimilo."

SIERALEONO: s-ro Abdul G.Koroma, ambasadoro: "Eatas ekster dubo, ke ni bezonas komunan interkomprenilon, kiu egaligos la homojn. Nur interparolo sen interpretistoj povas krei atmosferon de intima amikeco inter diversnaciaj homoj. Ni ĉiuj, sed precipe la malgrandaj nacioj, davas kontribui al la enkonduko de Esperanto."

EKVATORA GVINEO: s-ro Camelo Nvono, ambasadoro: "La grandaj monsumoj uzataj de la internaciaj institucioj por interpretado kaj tradukado kreas konstantajn miskomprenojn kaj tiu mono povus esti utiligata pli konvene por la bono de la homaro. Tial la enkonduko de unusola oficiala lingvo, neŭtrala kaj facile lernebla, kiel Esperanto, havus grandan signifon."

SUDANO: s-ro A. Elfaki, ambasadoro:" Neniu povus kontraŭi tiel mirindan ideon, ke la homoj de la mondo povu interkompreniĝi per unusola lingvo, sur egalrajta, tuthoma nivelo. Jam estas tempo, ke ni ekparolu pri la lingva diskriminacio al kiu la plejmulto el ni estas submetita. Kalkulu kun ni!"

ZAMBIO: s-ro M. Kaunda, konsilanto: "La granda avantaĝo de Esperanto estas ke ĝi ne altrudas al la malgrandaj popoloj alies kulturon, sed permesas liberan evoluon de ĉies lingvo kaj kulturo. Ĝia kontribuo al la unuigo de la homaro povas superi ĉiujn niajn revojn."

BANGLADEŜO: s-ro E. Sobhan, ambasadoro: "La angla lingvo estas vaste uzata ne nur en Unuiĝintaj Nacioj sed ankaŭ aliloke, kaj tio absolute sufoĉas. Vojaĝante tra la mondo mi konstatis, ke gejunuloj dudekjaraj ĉie en la mondo scipovas la anglan. Do, se vi volas kontribui al la internacia interkompreniĝo, propagandu la anglan lingvon."

ZIMBABVO: s-ro E.k. Mashigaidze, ambasadoro:" Mia lando estas malfermita al interhoma komperniĝo, kaj ĝi certe subtenos klopodon favore al Esperanto. Eble tiu aŭ alia kontraŭos la ideon, sed tio estas natura. Ni ne estas ĉiuj samtempe pretaj por akcepti iun novaĴon aŭ reformon, eĉ se ĝiaj utileco kaj bezono estas tute evidentaj.

kontinentoj? Plej bone estus sendube diskuti la problemon kun ĉiu landa aŭtoritato mem, surloke. Sed por tio mankas tempo, mono, homoj ... Ni decidis do, ekagi en la du plej grandaj kunvenejoj de iliaj reprezentantoj: en Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko. Tiel mi pasigis po unu monaton en Nov-Jorko kaj Parizo, inter la 14a de novembro kaj la 22a de decembro 1981.

En tiu tempo mi sukcesis intervjui tridekon da reprezentantoj el la sama nombro de landoj, klarigi al ĉiu el ili tion, kion li aŭ ŝi ne sciis pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj avantaĝoj por la nealiancitaj landoj, por la mondo ĝenerale, kaj ankaŭ ekhavi de ĉiu el ili reagon al tiuj ideoj. Tiuj reagoj, kompreneble, malofte estas defintivaj starpunktoj de tiu aŭ jena lando aŭ ĝia registaro, sed estas nur persona opinio de la intervjuito. Por ekhavi pli firmajn opiniojn de registaroj, pli vasta informa agado mondskala, direktita al la ĝustaj insitucioj kaj personoj, estas necesa.

Interese estas noti, ke el la 28 opinioj nur unu estas negativa, dum ĉiuj aliaj, pro diversaj motivoj, entuziasme aliĝas al niaj celoj kiel ĝiaj apogantoj kaj favorantoj.

Cetere, ni transdonu la parolon al niaj intervjuitoj mem, reproduktante almenaŭ karakterizan parton de iliaj eldiroj.

Reprezentantoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

IRANO: d-ro Said Rajaie, ambasadoro: "kun granda intereso mi atendas la enkondukon de Esperanto en Unuiĝintajn Naciojn. Tio signifos grandan paŝon antaŭen, ne la komunikado sed aparte sur la kultura kaj psikologia terenoj; ĝi signifos la egalecon de ĉiuj membroj."

JUGOSLAVIO: s-ro Ignac Golob, speciala sendito: "La enkonduko de Esperanto signifus progreson sur kultura kaj politika kampo. Sed por tion, atingi, pli intensa informado estas necesa. Ankaŭ la popularigo de Esperanto en la nealiancitaj landoj estus grava helpo."

KUBO: s-ro Lopez del Amo, ministro: "Estus mirinde, se ni ĉiuj povus interkompreniĝi en unusola lingvo, apartenanta al ĉiuj egale. La tradicio kaj la inercio estas la plej grandaj obstakloj, sed oni povas venki ilin per energia agado kaj pacienco. Jose Marti, la granda kubano, diris : ´Patrujo estas la homaro´. Ni povas nur varme bonvenigi ĉion, kio kontribuas al la unueco."

MAŬRITANIO: s-ro Rasim Ba, konsilanto: "kvankam mi ne multon scias pri Esperanto, mi estas certa ke ĝi povus multe kontribui al la internaciigo de nia laboro kaj niaj rilatoj. Ĉiuj reprezentantoj devus tuj komenci lerni ĝin. Mi mem volonte eklernus ĝin tuj."

Kion opinias ambasadoroj!?: Mag. Tibor Sekelj

§ E-388:

JAM ANTAŬ JAROJ mi komencis paroli kaj skribi pri tio, ke la movado de nealiancitaj landoj povus esti fruktodona kampo por la disvastigo de Esperanto. Fakte, ne tiom por semado de densa herbaro kaj multkoloraj floroj, kiom por ekplanto de fortikaj arboj, kies branĉoj povus etendiĝi mondvasten, trans ĉiujn limojn.

Fine, kiam la komitato de UEA en Brazilio nomis min komisiito pri nealiancitaj, mi eksentis, ke alvenis la momento por malpli paroli kaj ekagi pli konkrete. Sed kie komenci ataki la centkapan drakon? Kiel aliri la movadon, kiu grupigas landojn, sed ne havas komunan sidejon nek konstantan estraron?

Mi konsciis pri du gravegaj faktoroj, unu negativa, alia pozitiva. La negativa estas, ke en la cent landoj - ĉiuj triamondaj - preskaŭ nenie ekzistas Esperanto-movado bone organizita. Esceptoj estas Jugoslavio, Kubo, Irano, Hinda Unio, Madagaskaro, Malto kaj Peruo, en kiuj oni pli aŭ malpli organizite laboras. La alia faktoro, la pozitiva, estas, ke ŝtatestroj kaj aliaj funkciuloj kaj fakuloj el tiuj landoj kunvenadas kun la emo interkompreniĝi, kaj faras tion plej ofte en la angla kaj la franca, lingvoj al ĉiuj ili ne nur fremdaj, sed eĉ malŝatataj kiel lingvoj de iliaj koloniaj mastroj. Ekzistis tria faktoro, ankaŭ pozitiva: kiel jugoslavo, ŝtatano de la sola eŭropa nealiancita lando, konanta lingvon, landon kaj eminetulojn de multaj el tiuj ŝtatoj, mi estis avantaĝe kvalifikita por la tasko. Sed kun kiu paroli? Kie trovi la kompetentajn reprezentantojn de la cent landoj el kvin

kia dulingva mikstitolo ŝajne aperas ĉi tie unuafoje.

Tiu studa artikolo, verkita de Deborah Cole, diskute konsideris interkomunan lingvon kaj prezentinte Eon komparus ĝin al aliaj eŭropaj ĉeflingvoj; aldoniĝis resumaj infomoj pri UK en Berlino, Zamenhof, vort-prononcoj kaj gramatiko. Kompreneble nun grupo da iranaj E-istoj estas preparantaj tradukon kaj analizon de tiu artikolo en la persa kaj Eo.

Mojtaba Kheir-Khah

Heroldo De Esperanto / Septembro 30, 1999 / p.2

Iranaj Ĵurnaloj laŭdas nian lingvon

§ E-389:

Plian fojon du Ĵurnaloj en Irano publikigis favore al Eo kiel plej deca rimedo por la monda homara interkompreno.

La persa matenĵurnalo Abrar (Bonemuloj) 1 aŭg 1999 sur sepa paĝo aperigis detalan artikolon kun grandega titolo "Eo, plej unika atingo de homaro en lingva teritorio." Tiu artikolo, mallonge priskribinte lingvaĵojn diversflanke kaj nombrinte la avantaĝojn de iu scienca lingvo vorte, gramatike, forme kaj logike, ekprezentas Eon kiel idealan lingvon responde al homara bezono en interkomunikada kampo. La temon elektis la juna E-ĵurnalisto Akbar Fekri, kiu prenis la titolon kaj la plejparton de la tekstojn el la analiza antaŭparolo de la lernolibro por aŭtodidaktoj "Eo Dua Lingvo" verkita de Prof. M. H. Saheb-Zamani. Gratulinde tiu verko, eldonita antaŭ 23 jaroj, konservadis sian lingvistikan valoron kiel aŭtenta E-referenco en Persio.

Alia ĉiutaga gazeto, Iran News (Iran-Novaĵoj) sur la kultura paĝo de 10 aŭg 1999 aperigis fremdan artikolon el novaĵagentejo Reuters. Tiu ĵurnalo publikigas angle, ne nur por anglalingvanoj loĝantaj en Irano sed samtempe por alilandanoj, ĉefe eŭropaj kaj usonaj. Interese, la titolo de tiu artikolo estas kontrastege skribita Esperante kaj angle, jene: Atentu! Esperanto estas lingvo with a Future (atentu! Eo estas lingvo kun futuro),

chap. 8, pp. 550-625).

15. Pri la hinda kontribuo al la persa lingvo kaj literaturo, vd.: Aziz Ahmad: *Studies in Islamic Culture,* Oxford, 1965, pp. 234-244.

16. *El Popola C^inio (=EPC^)*, n-ro 1, 1983, p.12.

17. *Oomoto*, Jul. dec, 1982, p.69.

18. Jean- Jacques Servan- Schreiber: *Le défi mondial,* Paris, Librairie Artheme Fayaard, 1981, (Pri Japanio, vd. parto 3, ĉap. 1-12).

19. Usona kolego Donald J. Harlow, leginte la netan manuskripton de tiu- ĉi artikolo, rimarkigas letere (10-an de maro, 1984) al nia komuna samideanino Ŝirin Ahmad-Nia (iranano) i.a. ke:

... Pri la stato, kaj estonteco de la angla lingvo, ŝajne mi, kaj la... profesoro tute interkonsentas. Cetere... laŭ haveblaj statistikoj, la procentaĵo de la monda loĝantaro uzanta la anglan, ne multe kreskis depost la komenco de la nuna jarcento. La distribuo ja ŝanĝiĝis, pro malalta... naskofteco en la anglalingvanaj landoj- pli granda procentaĵo uzas la anglan kiel duan lingvon, sed malpli granda uzas ĝin kiel unuan, denaskan lingvon - sed la tuta procentaĵo restas je prods. 10% [...] efektive, en la sudokcidento (de Usono, kie mi loĝas) kaj en Florido la nuntempa premo de la hispana lingvo povas esti multe grava ol ni anglalingvanoj povas (aŭ volas) agnoski. Kiam Prof. S-Z skribas pri "... ĉiujara enmigrado de cent-miloj da hispanlingvanoj en Usonon..." ŝajnas ke li subtaksas la aferon. Eble 10 milionoj da kontraŭleĝaj hispanlingvaj enmigrintoj nun kaŝas sin en la laborejoj kaj *barrios* (kvartaloj, hispanlingve) de kelkaj urbegoj kiel Los Angeles. Kaj eĉ inter la laŭleĝaj hispanlingvaj enmigrantoj, oni (ekzemple miaj bogepatroj) ofte ne povas, aŭ nur minimume povas, paroli la anglan lingvon...

20. *EPC^*, 11, 1982, p.21.

21. *Heroldo de Esperanto*, n-ro 3, 10 mart. 1983, p.3.

22. *Heroldo de Esperanto*, 16 apr. 1983, laŭ Franca gazetaro kaj *AGULF*, febr. 1983.

23. *EPC^*, 1, 1982, pp. 17-18.

24. Zhang Qicheng: *EPC^*, 1982, p.17.

London, Harper- Brown/ HR 1750, (1974), chap.9, pp. 199-208.

XII. *The Life and Works of Jahiz* , translated by D.M. Hawke, London, Routledge- Kegan Paul, 1969, (pri ŝuubianoj), pp. 85-86.

XIII. Ibn Abd Rabbih: "Al-Igd al-Farid" (pri ŝuubi-movado), ĉe *Ghahira,* vol.3, 1372/1953, pp. 317-328.

Por la angla traduko de samaj paĝoj, vd.:

XIV. *Islam*, translated by B. Lewis, bol2, New York- London, Harper, 1974, pp. 201-206.

13. Pri svahilo kaj ĝiaj interrilatoj kun la araba, Esperanta, kaj koloniistaj lingvoj, vd.:

I. Trimingham, J.S.: *The Influence of Islam upon Africa,* London, Longmans, 1968, pp. 10-106.

II. Hofer- Gut, Béatrice (k. aliaj): "Früheste Dokumente des Swahili, ĉe *Neue Zürcher Zeitung*, 19 Dezember, 1980.

III. Manfred Krifka: "Kigeugeu: Das ostafrikanische Swahili als Prüfstein der Sprachveränderung- theorien", ĉe *Zeit* (german-lingva Ĵurnalo), 9 Januar, 1981.

IV. Vessella, Nino: *Esperanto- Svahila Lernolibro*, Rotterdam UEA, 1983.

V. Knappert, Jan: *Vortaro de Esperanto kaj Svahila*, Rotterdam, UEA, 1983, Vd. ĉirilate *Esperanto- Revuo*, n-ro 6, 1983, p.102.

14. S.M. Stern eĉ ŝatas paroli pri la unika sociolingvistika fenomeno de turk- monogolaj regnoj en Anatolio kaj Hindio, kiel "Koloniaj Teritorioj de Pers-irana kulturo" (*Iran and Islam*, edited by Bosworth, Edinburgh, 1971, p. 539).

Plue pri la akceptado de la persa lingvo pere de la turkoj, kaj mongoloj kaj ĝia disvastiĝo en Hindio vd.:

I. Mujeeb, M.: *The Indian Muslims*, London, Allen- Unwin, 1967, p. 169+.

II. Hottinger, A.: *The Arabs,* London, Hudson, 1963, chap. 17, p. 109+. Germana originalo, *Die Araber*, Zürich, Atlantis- Verlag, 1960.

III. *The Legacy of India*, edited by G.T. Garratt, Oxord, 1951, p. 288+.

IV. *The Legacy of Persia*, edited by A.J. Arberry, 3rd ed., 1968, p. 191+.

V. Bosworth, C.E.: *The Ghaznavid, Their Empire in Afganistan and Eastern Iran*, Edinburgh, 1963, chap. 4 (aparte vd. p.130).

VI. *The Cambridge History of Iran*, vol.5, 1968 (the Saljug and mongol periods,

kultura katastrofo, iu tute fintempa - eskatologia- "Ek- renverso de ĉiuj valoroj", kiel, plej verŝajne, Niĉeo (Nietzsche, 1844- 1900), ne mal-ĝuste eldirus!

Tial, la psiko-sociologiaj antaŭ-kondiĉoj de asimiliĝado de irananoj en la araban medion, kaj ĝenerala cirkonstanco por akceptado de la araba lingvo en Irano jam tute ne ekzistis.

Sen elkompreno de tiu subita, kaj unika grand-ŝoko interkultura por irananoj, neniu el mult-dekoj da iranaj reagoj, kaj kontraŭ -movadoj, post-islame en Irano, povus esti plenperfektee komprenotaj! Ja, tial ekburĝonis ŝijaismo - kaj tial ne okazis la ĝenerala akcepto de la araba lingvo en Irano ktp, dum mirinde iranaj kleruloj mem, siatempe, majstre uzadis la araban lingvon, kiel internacian komunikilon tiaman, por aŭdigi sin plej akut-veĉe, kaj mondvaste, por liberigi sin de tro dontraŭ- vola, altruda izoleco paraliziga!

Pri diversaj aspektoj de supre menciitaj faktoj, vd.:

I. Brown, E. G.: *A Literature- History of Persia*, vol. 1, pp.265-269 (Ŝuubi-movado).

II. Goldziher, I.: *Muslim Studies*, vol. 1, chap. 4, pp. 147-163.

III. Barthold, W.: "Die Persische Šuubija und die moderne Wissenschaft", ĉe *Zeitschrift für Assyrilogie*, XXVI, 1912 (250+).

IV. Gibb, H.A.R.: *Studies on the Civilization of Islam*, London, 1962, pp. 62-73.

V. Spuler, B.: "Die Selbstbehauptung des iranischen Volkstums im fruehen Islam", ĉe *Die Welt als Geschichte,* 10, 1950, p.189.

VI. Frye, R. N.: *The Heritage of Persia*, London, Cardinal, 1976, chap. 7, pp. 268-292.

VII. Büchner, V.F.: *Madjus (Mag^us),Hand- Wörterbuch des Islam*, Leiden, Brill, 1941, pp. 378-382. La sama artikolo, sed mallonge kaj anglalingve, ankaŭ, vid.:

VIII. *Shorter Encyclopaedia of Islam,* London, 1961, pp.298-300.

IX. Vid. Lazard, G., ankaŭ pri la duobla rolo de irananoj samtempe pri la persa kaj la araba lingvoj, ĉe *Cambridge History of Iran*, vol. 1, pp. 603-604.

X. Stern, S.M.: *Yaqub the Coppersmith and Persian National Sentiment, Iran and Islam,* Edimbourgh, Bosworth, 1971, pp. 535-555.

XI. *Islam, Religion and Society*, vol. 2, edited by Bernard Lewis, New York-

neniam estis menciita, aŭ eĉ klare aludita en Korano. Oni ne konis ilian religion, kiel fustan, monotestan religion. Oni kredis ilin praktiki dualismon, ne monoteismon!

Irananoj ŝajnis al la araboj esti fagro-adorantaj magoj. Oni mokis ilin sarkasme. Alivorte, araboj pleje rigardis irananojn kiel malpurajn paganojn, kun fajro-temploj, kiuj eĉ praktikis inceston! La moknomo por ili estis maĝusoj 'fi-magoj', kun tre insulta, malpura, incestopraktikema, politeista asocio, t.e., kun ĉiuflanke aĉa fi-kun-signifo!

La insultega frap-vorto maĝuso jam havis - kaj bedaŭrinde ankoraŭ havas- tre gravajn historiajn mis-konsekvencojn reciprode inter araboj kaj irananoj. En septembro 1980, Iraka Armeo ek-komencis militan atakon kontraŭ Irano, kiu ankoraŭ daŭras (aprilo, 1986). Por prepari sufiĉe malamikan , psikan milit-atmosferon kontraŭ Irano, resali/ malbalzami la malnovajn vundojn, kaj rvigligi jarcentajn antaŭjuĝojn, Saddam-Husajno, la ŝtatesto de Irako, simbole kaj ideo-asocie deklaris sian kampanjon kontraŭ Irano, la Sanktan Militon kontraŭ la maĝusoj, "La 2-an Gadesijja" - la 1-a estis en novembro 635 p. K/14 H., kiel kaj dum kiu la araboj invade vendis tiaman iranan lim-provincon en Gadesijja, nuntempe en Irako.

Resume, la araboj mal-akceptis la legitimecon de la irana kultur-religio - kvankam ne laŭleĝe, tamen konstante reage, kaj ĉiumaniere!

Tial, la miskomprena breĉo inter gentoj- irananoj kaj araboj- estis ege profunda, antaŭjuĝoj kronike venenaj, sarkasmaj ofendoj reciprode barigaj, kaj la angoroj de irananoj pri la absoluta kultur-alineo nostalgie ne-tolereblaj. La timego ekperdi tute la naci-religian identecon agonie estis senprecedentaj- eĉ, dum la invado de Aleksandro la Granda (356-323 a.K). La grekoj neniam rifuzis la kultur- religiajn valorojn de la irananoj. Male, la grekoj, iom-iele, eĉ adoris, kaj alproprigis ilin. Aliflanke, la araboj ne nur insulte humiligis la dulturajn heredaĵojn de Irano, sed insiste klopodis elradikigi ilin!

Por paroli ne rasiste, sed pli etnologie, kaj kulturfilozofie, la konfrontado de irananoj kun araboj estis la konfrontado de du malsamaj, reciproke forpelantaj raso-gentoj- arja kaj semida raso-gento! La konfrontado estis iu ek-konfrontado senprecedenta de du kontraŭbatalaj, totalismaj religiaj sistemoj, por irananoj. Tial, la konfrontado ek-ŝajnis iu

(c) ETNO-FOBIO. Egal-nivela kun-ekzistado kun la araboj pro longa enmigrado antaŭislama, kiel en Sirio kaj Egiptio, por irananoj ne estis kutima, sed tute maldutima, eĉ io iom malaminda.

(d) LINGVISTIKA FREMDECO. Tuta malsimileco de araba, kiel semida lingvo, al la iranaj lingvoj, kiel hindo-eŭropaj lingvoj, kontribuis ankaŭ grandparte al la mal-kompreno inter du fremdaj gentoj.

(e) KOLONIISTA AROGANCO. Irananoj eĉ parte superregadis arabojn antaŭislame, rigardis sin alte civiliza=itaj, kaj la arabojn duon-sovaĝaj.

(f) BALDAŬA EKONOMI-SOCIA KOMPENSADO. Tre baldaŭ irananoj atingis soci-ekonomiajn altajn rangojn, eĉ kulturajn, kaj politikajn postenojn ĉe kalifoj de Abbasidoj (750-1258/132-656 H.).

Al-Ĝahiz (777-868/160-255), tre kapabla verkisto kaj observanto, resumis kompare la trajtojn de la dinastio de Umajjaidoj (661-750/41-132 H.), kun ties sekvantoj - la Abbasidoj- tiele: la Umajjaida estis Araba Imperio, kaj la Abbasida Korasanana (Irana) Imperio (Al-Ĝahiz: *Kitab al-Bajan*, III, p. 366; ankaŭ, Goldziher: *Muslim studies*, vol.1, p.147).

(g) KONTRAŬ - BATALOJ DE DU KONTRASTAJ KULTUR-VALOROJ. La kristanoj kaj judoj en Sirio kaj Egiptio gente, kaj ankaŭ religie ne sentis sin tute fremdaj al la araboj. Arab-islamanoj rekonis kristanismon, kaj Judismon, kiel siajn legitimajn monotesistajn, kaj revelaciitajn precedentajn religiojn. Laŭ Korano, ili estis "La Popoloj de la Libro", t.e. la anoj de iu Sankta Biblio apartenantaj al la justa monoteista religio. Iliajn rajtojn libere praktiki siajn religiojn, oni jam ekde la komenco, en Islamo, kaj en Korano, klare agnoskis. Tute male al zoroastranoj en Irano, la kristanoj en Egiptio, por esti liberigitaj de brutalaj premoj de Bizanca Eklezio, eĉ bonvenigis la alvenon de la arab-islamanoj en 641/20, kiel siajn savantojn (*The Legacy of Egypt*, Oxford, 1963, p.327). Tial, sirianoj, kaj la plimulto en Egiptio, ne timis tute perdi siajn religiajn, kultur-valorojn, aŭ identecojn pro akcepto de la araba lingvo.

Kontraŭe, irananoj, nostalgie kaj fieraj pri sia gloro de civilizo pasinta, longe batalis- kaj eĉ iom ankoraŭ batalas- por esti agnoskitaj, kiel iu ajn alia t.n. "Popolo de la Libro"! La nomo de la irana profeto -Zoroastro-

La araboj enmigris postislame ambaŭ en Nord-Afrikon, kaj en Iranon. Sed, la proceso de asimilado prenis du tute malsamajn direktojn. En Egiptio estis la indiĝenoj, kiuj asimiliĝadis arabe, kaj en Irano, la araboj asimiliĝadis irane kaj perslingve vd.:

III. Supuler, B.: "Iran", in *Frueh-Islamischer Zeit*, Wiesbaden 1952, pp.20-45 kaj 247-250.

IV. -"The Expansion of the Arab in Iran and in Central Asia", in *The Encyclopaedia of Islam*, vol. 1, sec. ed., pp.531-532.

V. Wiet, G.: "Expansion of the Arab in Egypt", in *Encyclopaedia of Islam*, vol.1, sec. ed. pp. 531-532.

VI. Marcais, G.: "Expansion of Arabs in North Africa", in *The Encyclopaedia of Islam*, sec. ed., vol 1, pp.532-533.

Note 1: la nova eldono de *Enciklopedio de Islamo* haveblas dulingve - angle kaj france. Tial, ĉiuj supre menciitaj artikoloj troviĝas ankaŭ en la franclingva eldono de la verko.

Note 2: ĉiuj supre menciitaj artikoloj de *Enciklopedio de Islamo* entenas abundan bibliografion.

(d) Soci-EKONOMIAJ SIMILECO/MALSIMILECO. Interalie pro la amas-enmigrado de la araboj en Sirion kaj Egiption, baldaŭ malkreskadis la politikaj rangoj, kaj soci-ekonomiaj avantaĝoj de iam mallongtempe privilegiaj arab-koloniistoj mem. Tial, ili kaŭzis ne tro da antipatio, venĝemo, kaj reagoj envi-ĵaluzai inter la indiĝenaj popoloj. La cirkonstanco faciligis tre favore la baldaŭan asimiliĝadon.

(B) Sed la kazo por irananoj malsamis. La ĉi-subaj sep kialoj eble povus esti i.a. la plej gravaj! Kompreneble, la klasifikado de la faktoroj, estas iom arbitra. Ili konstruas diversajn perspektivojn de unu integra tutaĵo soci-kultura:

(a) HEGEMONIA FREMDECO. Irananoj, antaŭ la araba invado, dum kelkaj centjaroj super-regis grandan imperion, kaj nealkutimiĝadis al iu hegemonio fremda.

(b) KLAS-KONSCIA SUPERECO. Por siaj delonge striktaj sociaj strukturoj, kaj kastoj, irananoj estis tre kasto-konfrontado kun la rasa aroganco de malpli-multo de arabaj konkerantoj, por irananoj absolute ne estis tolerebla.

(1): *The Position of Arabic among the Semitic Languages*, pp. 561-562 (aû vd. la saman artikolon en la franclingva eldono de la sama Encik.).

(b) AKCEPTO DE JAMA LINGVA HEGEMONIO. Dum jarcentoj antaûislamaj, la greka lingvo regis en Sirio, kaj en Egiptio. La indiĝenaj lingvoj - la kopta kaj la aramea- jam ĉesis esti parolataj, aŭ eĉ komprenataj pere de la grandaj amasoj de la popoloj. Tiuj lingvoj, jam delonge apartenis al la klera elito, en siaj erudiciaj studoj, kaj en kristanaj liturgioj. Sed, inter la amasoj, ili travivis nur en multaj malsamaj dialektoj. Inverse, en Irano, la lingvo de la reganta elito -la pahlavia- disfalis pere de la araba invado. Dume inter la grandaj amasoj la nova persa lingvo jam fariĝis la unugrupigante interkomunikila lingvo. La elitoj -malsame al la amasoj- el Irano, en Sirio kaj en Egiptio, ĉiuj silile unu al la aliaj, akceptis la lingvon de la konkerantoj.

Bernard Lewis, la fama islamologo, alude al iu politik-naciista motivo, emfaze rimarkigas ke:

La sirianoj, kaj koptoj, kiuj jam delonge alkutimiĝis al fremda superregado, ŝajnis ne havi iun naciecan senton, kiel tiu, kiu garantiis la apartan identecon de la irananoj, eĉ post ilia konvertiĝo al Islamo. La koptaj ribeloj kontraû la registaro estis kelkfojaj, mal-adaj, sprodaj, kaj ne organizitaj... Tial, iliaj malsukcesoj preparis ilin por kompleta asimiliĝo (*The Cambridge History of Islam*, vol.1, 1970, chap.2, p. 179).

(c) LA JAMA KOLONIĜADO.Jam delonge antaŭ la alveno de Islamo komenciĝis la pacoplena amasa enmigrado de la araboj en Sirion, kaj Egiption. Unuvorte, Sirio kaj Egiptio jam antaŭislame koloniiĝis perarabe. Kaj tiu proceso daŭris ankoraŭ longtempe post la ekleviĝo de Islamo. Eĉ, en 727/109 H., la kalifo al-Hiŝamo (reĝ. 724-743/105-125 H.), aprobis la planitan amas-enmigradon, kaj la enhejmigradon de plur-miloj da Kajsi-araboj en la Nil-valon. La proceso de la arab-koloniado en Egiptio kontinuis dum la 2-a, kaj la 3-a jarcentoj de la Hiĝriaj/8-a ĝis la 9-a kristanaj.

Eble, la geografia simileco de hejm-landoj, kaj koloniaj lokoj ankaŭ kontribuis ne mal-grave, al la proceso.

I. Dussaud, R.: *Arabes en Syrie avant l'Islam*, 1907.

II. -*Penetration des arabes en Syrie avant l'Islam*, 1955

10. (a) Simile rimarkigas Armand Abel pri paralela simileco inter Irano, Berberoj en Nord- Afriko kaj Hispanio en sia leginda eseo (*Spain: Internal Division*):

... En la tempo de germana invado, la latina lingvo en Hispanio jam iĝis la lingvo de la tuta popolo... Nek la germana de Alanoj, Vandaloj, Suevianoj kaj Visigotoj, nek la araba lingvo iam povus venki ĝin...

Ĉie, kie la araboj konkeris, ilia lingvo disvastiĝis, kaj stabiliĝis... Nek la greka, nek la pahlavia, nek la aramea, nek la kopta povis rezisti ĝin. Nur la berbera kaj la latina persistis; ankaŭ la ekleviĝo de iu nacia lingvo en Irano (la nova persa) konstruas fenomenon, kiu certagrade estas paralela al ĉi-tiu travivo... (*Unity and Variety in Muslim Civilization,* edited by G. E. Grunebaum, Chicago, 1955, pp. 207-230).

(b) Tamen, koncerne de malsimilecoj inter Irano kaj Hispanio, i.a. rimarkinde estas, ke en 1556 p.K., Filipo la 2-a (1527-98), la prapatro de Inkvizicio en Hispanio, proklamis leĝon , laŭ kiu li strikte malpermesis al la islamanoj praktiki sian Diservon, araban lingvon, ktp. (Stanwood Cobb: *Islamic Contribution to Civilization*, Washington, Avalon Press, 1965, p.44). Similaj laŭleĝaj malpermesoj kontraŭ Arabismo- por tute ne paroli pri Islamo- neniam okazis en Irano. Irano, ekde tiam - islama konkero- jam restadis islama lando, kaj la ulemoj, ĉiame verkis, minimume iom simbole, arablingve!

11. (A) Kial la amasoj iranaj ne akceptis la araban lingvo, sed la amasoj de Sirio, Egiptio, kaj nord-afrikaj landoj asimilis la araban? Kial, ankaŭ Hispanio, malgraŭ okjarcenta regado de araboj, ne akceptis la araban? Kial, kial, kial?... Ĉiuj-ĉi kialoj, i.a. soci-lingvistike tre gravaj, atendas ankoraŭ esti erudicie pristudotaj. Por ekmotivigi studulojn eble sufiĉas mencii ĉi-tie, alude kompare, nur kelkajn faktorojn pri Irano, Sirio kaj Egiptio- kompreneble, Hispanio atendos ankoraû sian apartan pritrakton!

(a) LINGVA SAMRADIKECO. En Sirio kaj Palestino jam dum mil-jaroj, la loĝantaro- male al la irananoj- parolis iun semidan lingvon parencan al la araba en ĝia gramatika strukturo. La lingvoj de la indiĝenoj enhavis ankaû tre multajn similajn vortojn kaj esprimojn, vd. ekzemple:

I. *The Encyclopaedia of Islam*, new ed. Leiden- London (1957+), vol.1, *Arabiyya*

Mia pra-patro estas Islamo- Mi ne havas alian krome!

Lasu, do, aliaj fanfaroni pri siaj Kajso-tribo, kaj Tamin- tribo!

(Vidu pri ben Taŭsia, Goldziher: *Muslim Studies*, vol.1, p. 81, London, Allen-Unwin, 1967).

(c) Tial, multe da nearabaj islamanoj klopodis, kaj trovis vojon iele arabigi sin. Unu el la metodoj estis denove difini la arabecon:

- Kiu estas arabo? Responde, oni atribuis al la profeto la hadison (la Profet-eldiron), kiu alude al la Korano (ĉap. 49, pp. 13-14), eldiris:

...ĉiuj homoj havas nur unu solan pra-patron... La araba lingvo nek estas la patro, nek la patrino de iu ajn inter vi. Ĝi estas nenio, krom niu unu lingvo. Tial, kiu ajn parolas arabe, tiu estas arabo.

I.Ibn Asakir (1105-68/499-564 H.): *Tarib Demas^k* (Historio de Damasko), Damask, 1349/1930, vol. 6, p.450.

II. Goldziher: *Mubammedanische Studien*, vol.1, Halle, 1889, 116+ (Anglalingve: *Muslim Studies*, vol. 1, 1967, p. 111+).

(d) Dum la abasida periodo (750-1258/132-656 H.) la arda demando ne estis, ĉu Islamo, aŭ Irano?! Sed, pli ĝuste, ĉu iranigita, internacia Islamo, aŭ ŝoviniste limigita araba Islamo? Por la iranigitaj islamanoj jam estis legantaj la signoj de la venonta tempo. Ili estis la ĉef-ondo de la futuro tiama, dum la interesoj de la ŝovinistaj araboj restis provincaj kaj iusence reakciaj kontraŭ la reala sorto, aŭ potencialo de la Islamo.

Alivorte, por la irananoj la respondo al la tiama arda kulturinterhoma demando, iom simpligite, estis - kaj ankoraŭ estas- : Islamo, jes! Arabismo, ne!

Unu signo de la dividiĝo de la islama mondo en tiuj-ĉi du kampoj estis, krom la leviĝo de la nova persa lingvo en 10-a/4-a H. jarcento, la kolapso de la klasika araba lingvo en ĉirkaŭ la sama tempo. Saman opinion oni trovas ankaŭ ĉe:

I. Gibb, H. A. R.: *Studies on the Civilization of Islam*, London, Routledge-Kegan Paul, 1962, 66+.

Pri la forigo de la ĉiutaga lingvo de la klasika, kaj ties disigo en dialekto, vd:

II. Fuech, J.: *Arabiya*, Berlin, 1950, p.76 . Franca trad. de C.Denizeau, Paris, 1955.

Note 1: pri la hadisoj (la islama profet- profet-eldirâĵoj), detale, kaj Esperant- lingve vd:

I. Chiussi, Italo: *Je la Flanko de la profeto*, Antverpeno, 1978, pp. 215-344.

9. (a) Kompreneble, ne mankis al Irano tre entuziasmaj arablingvemuloj, kiuj eĉ malkaŝe preferis la araban al la persa lingvo; ekzemple, Abu Rejhan Biruni (973-1048/363-440 H.), la plej granda iran-islama sciencisto de la mez-epoko, honore kaj inde nomita la majstro, al-Ustad, el kvarazmo, nuna Khiva, emfaze diras ke:

... La sciencojn kiujn el ĉiuj landoj de la mondo oni jam tradukis en la araban lingvon, estas ornamigitaj, enriĉigitaj, kaj, do, pli allogaj. La belecoj de la lingvo araba estas en iliajn vejnojn enfluigitajn, Kompreneble, ĉiu gento sentas sian lingvon, al kiu aldutimiĝis, kaj uzadas ĝin por siaj ĉiutagaj aferoj, la plej bela. Sed, mi priparolas el propraj spertoj. Mi eldreskis en iu [irana] lingvo, en kiu trovi vere iun firman sciencon, ŝajnus stranga, kaj tute fremda. Poste, mi okupis min pri la persa, kaj la araba lingvoj. En ambaŭ lingvoj mi estis fremdulo, kaj nov-gasto. Kvankam mi klopodis akiri ilin ambaŭ perfedte, tamen mi pli preferas, ke oni insultu min arabe ol ke oni laŭdu min perse!

Vidu:

I.Meyerhof, M.: *Das Vorwort zur Drogenkunde des Biruni*, Berlin, 1932, p.39.

II. Schacht, Joseph F.: *The Islamic Background of the Idea of an Arab Nation*, in *The Arab Nation*, Washington, The Middle East Institute, 1969, p.23.

(b) Tamen, ne-araba-originaj arablingvemuloj havis egan malfacilaĝon esti akceptitaj per la indiĝenaj araboj. Tiu cirkonstanco kaŭzis multajn diskutoj kun sociologi-historiaj konsekvencoj, i.a. ekzemple la ekflamo de la Ŝuubi-movado - la anti-arabnaciismo de ĉefe multaj irananoj. La Ŝuubi-movadanoj havis siajn argumentojn sur la korana verso, kiu emfaze eldiras:

Ho vi homoj! Ni kreis vin el viro kaj virino, kaj faris vin popoloj (ne-araboj), kaj triboj (araboj), por ke vi ekkonu unu la alian. Vere antaŭ Allaho, la plej eminenta el vi estas la plej justa! (ĉapt. 49, verso 13-14: *La Nabla Korano*, laŭ la Esperanto traduko de Italo Chiussi, Kopenhago, 1970-Tehrano, 1978).

Sed, la voĉoj laŭ la koran verdikt-idealo, kiel ties de Nahar ben Taŭsia (mort. 85 H./704 p.K.) estis ne tre multaj:

persistaj literaturaj bataloj de Ŝuubistoj (vd. suben n-ro 9b) jam povis aserti prestiĝon egalan kun la araboj, kaj gardi sian nacian lingvon...":

I. Supler, B. *The Desintegration of the Caliphate in the East*, p.144 (*The Cambridge History of Islam*, vol.1, 1970, part 2, chap. 1, pp. 143-174).

II. Lazard, G.: *The rise of the New Persian Language (The Cambridge History of Iran*, vol. 4, 1975, chap. 19, pp. 595-632).

8. Ignaz Goldziher, la parto de la islamologio en Okcidento, en siaj monumentaj *Islamaj Studoj*, emfaze diras:

Por ke eĉ nur mencii la plej distingan ekzemplon de la partoprenado de Aĝam-elemento (ne-araboj) en la intelektan vivon de la mondo islama, kaj ties rolon en la evoluo de la islama religio, envolvus nin en la ĝisfunda plenfosado de la historio de la araba literaturo. Taksado statistika de tiuj ĉi materioj estus certe je la mal-avantaĝoj de la araboj (*Muslim Studies*, vol.1, London, 1967, P.109).

Goldziher plue aldonas:

Kiel ĝisfunda tiu fakto estis jam sentata en Islamo, kaj kiel la popoloj avidis trakti pri tio, videblas de la fakto, ke hadisoj (Profet-eldiroj) estis inventitaj, en kiuj oni instigis eĉ la profeton mem fari antaŭvidon pri ĉi-tiuj kondiĉoj de la Islamo: "Ni sidis", oni atribuis al Abu Hurajra (mort. 678/58 H.), la fama hadis -rakontisto, kiu diris, "kun la Profeto-Muhammad, kiam la Surao de la vendredo (Al-Ĝumua: ĉapt. 62 de la *Nobla Korano*) estis revelaciita al li... Inter ni estis ankaŭ Salmano la persa (=irana). La Profeto surlasis sian manon sur Salmanon, kaj diris:

- "Se la kredo estus sur la plejado, viroj de ĉi-tiu popolo (irananoj) atingus ĝin!".

Poste, la eldiro estis transformita por aludi al *scienco* jene:

- "Se la scienco alfiksiĝus al la finoj de la ĉielo, homoj el la popolo de Persujo atingus ĝin" (*Muslim Studies*, I, 112).

Pri la irana kontribuo al la arablingva literaturo, vd:

I. Danner, V.: *Arabic Literature in Iran* (*The History of Iran*, vol. 4, 1975, chap.18, pp. 566-594).

II. Huart, C.: *A History of Arabic Literature*, sec. ed. Beirut, 1966, 63+.

III. Hitti, Philip K." *History of tha Arab*, London Macmillan, N. Y., 1956, pp. 24, 306 kaj 402.

III. Nyberg, H.S.A.: *A Manual of Pahlavi*, I, tests, alphabets, index, paradigms, notes and an introduction. Wiesbaden, Otto Harrassowitz, 1964.

IV. Naficy, S.: "Persian Literature", ĉe *A History of Muslim Philosophy,* edited by M.M. Sharif, vol. II, Wiesbaden, Otte Harassowitz, 1966, pp. 1043-1047.

V. Brown, E.G.:(1862-1926): *A Literary History of Persia*, vol.I, Cambridge University Press, 1902, 7th ed. 1969 (vidu p. 513,index: Pahlawi), kun abundaj literaturnotoj.

VI. Geiger-Kuhn: *Grundrissder iranischen Philologie*, Strassburg, 1896, B. II, pp.1-53.

7. La ĉi-subj citaĝoj montras, kiel la verdikto de iran-islamaj ulemoj dum 10-a p.K./4-a H. jarcento sanktigisla persan lingvon en Irano, apud la araba:

...kaj ĉi-libro estas la granda Koran-ekzegezo, laû la interpreto de Muhammad Ĝ. al-Tabari [839-923 p.K./225-310 H.[. [Dum 961-976 p.K[, oni alportis ĝin el Bagdado al Irano... kaj enpersigis ĝin. Ĝi estis en 40 volumoj.

La libro originale estis arablingve verkita...Oni prezentis ĝin al la princo Mansur la unua [reĝ. dum 961-976 p.K./350-365 H.] de la samanid -dinastio [819-1005 p.K./204-395 H.]. Al la princo Mansur ŝajnis malfacile legi ĝin arablingve. tiel, la princovolis ke oni enpersigu la libron. Do, li kunvenigis la ulemojn el la tuta Trans-Oksianio, kaj petis ilin pri ilia verdikto. Li demandis ilin jene:

"- Ĉu estus permesite, ke oni traduku ĉi-tiun libron perslingve?! La ulemoj eldiris jene:

- Estus permesite legi, kaj skribi la Koran-ekzegezon perslingve, por tiuj, kiuj ne scipovas la araban lingvon!... kaj, la reĝoj de ĉi-regiono estas la reĝoj de la Ne-arablingvanoj!": *Tafsire Tabari* (La traduko de la Tabari-Koran, ekzegezo, far de anonimaj tradukistoj),

vol. 1, p.5, Tehran - Universitato, eldon n-ro 589, 1339/1960.

" Malsame al la loĝantaro de la Nil-valo, Nord-Afriko, Mezopotamio kaj Sirio, kie la araba lingvo subpremis, kreske la indiĝenajn lingvojn", skribas elstara germana islamologo Bertold Spuler, "la irananoj dum

ŝuldas la sia propra profeto Zoroastro... (R. C. Zaehner, *The dawn and Twilight of Zoroastrianism*, London, 1961, de. 1975, p. 191.)

Malpli nostalgie, sed pli kultur-historie, kaj fakto-ateste, rimarkigas ankaŭ Richard Frye tiele:

Kiam Islamo iĝadis iu internacia religio kaj kulturo, irananoj evoluigis sian propran novan lingvon, kaj islaman tradicion; do, strange irananoj ludis la ĉefrolon en ambaŭ aferoj -t.e. en la internaciigo de la araba lingvo, kaj en la ekleviĝo de la irana rensanco samtempe (R.N.Frye, *The Heritage of Persia*, London, Cardinal, ed. 1976, p.278).

6. Unu el la plej kapablaj Pahlavi-fakuloj de la Okcidento niatempe, R. C. Zaehner, plenplende emfazas (en 1956), la duboinstigan karakteron de la Pahlavi-skribisignoj jene:

Neniu tradukisto, kun longa sperto pri la freneziga duasenceco de la Pahlavi-skrib-simboloj volontulus aserti la definitivecon por sia propra tradukaĵo (R. C. zaehner, *The Teachings of the Magi*, London, 1956, Sheldon Press, 1975, p.16).

Oni skribis la pahlavian, mez-persan lingvon diversmaniere kun iu-ia aboco pruntepreniita de la imperia aramea alfabeto. La diversaj formoj de la pahlavi-alfabeto -kiel la sasanida, kaj la kaldea- efektive estas iuj miks -skribsignoj, aŭ eĉ parte, kaj ne malofte, duonideogramoj aŭ logogramoj. Ĉar multe da mez-persaj vortoj estis sole skribitaj sen-vokale far de la arameaj konsonantoj, ekz., oni skribis MLK - la semidan senvokalan vort-radikon- i.a., por la signifo de "Reĝo" (=Malik), sed legis ĝin-laŭsence ne laŭsone, iele ideograme- 'Ŝah', persligve.

Kutime, oni nomas tiujn strangajn mult-sencajn, divers-sonajn, duonideogramajn, logogramajn, semid-originalajn pahlavi-liter-vort-signojn Hozvareŝ-oj. Tiel, Hozvareŝ-o, signifas grafik-signojn, per kiuj oni skribas fremdlingve; kiel dirite, se oni dezirus perslingve NAN, kiu signifas 'panon', oni skribus hozvareŝe LHM (Lahma), sed elparolus ĝin NAN! Vidu ĉiteme:

I. Machenzie, D.N.: *A Concise Pahlavi Dictionary*, Oxford University Press, 1971, pp. IX-XX kaj 79.

II. "Das Fascher Lexikon", *FL*, 25, ĉe H.F. Wendt: *Sprachen*, Frankfurt am Main, 1970, pp. 212-213.

persian by R. Levy, Persian Heritage Series, no° 2, London, Routledge-Kegan Paul (first ed. 1967), reprinted 1977, chap. 29, pp. 317-321.

Note 1: *S^ab-name* (La Libro de la Reĝo) (*The Epic of the Kings*) estas la irana nacia epopeo el 4-a H./10-a jarcento. Ĝi enhavas iranajn mitojn, legendojn kaj historiajn rakontojn. La verko komenciĝas per la kreo de la mondo el nenio, kaj finiĝas per la islama kondero de Irano. "En sublima traduko de Levy", skribas la pri-recenzo en *Islamic Review*, "la okcidenta leganto ne mal-sukcesus distingi klarajn ekvivalentojn de la ĉapitroj en la *Genezo*, Odiseo de Homero, *Paradizo Perdita* de Milton, *Kanterberiaj Rakontoj* de Chaucer, kaj eĉ Shakespeare. Dramo, komedio, tragedio, kompato- ĉio-ĉi estas en la epopeo. La koro de l'homaro batas ene de ĝi".

II. Nizam al-Mulk (1020-1092): *The Book of Government or Rules for Kings (Sijast-name)*, translated from the persian by Hubert Darke, Persian Heritage Series, n.°32, London, Routledge Kegan Paul, 2nd ed., 1978, chap. 44, pp. 190-206.

Note 2: Oni konsideras la libron de Nizam al-Mulk, kiel la plej klasikan en la tuta persa literaturo de la 5-a/11-a jarcento.

III. Noeldeke, T.: "Ueber Mazdak und die Mazdakiten", ĉe *gesch. der Perser und Araber*, Leyden 1879, 455+. La sublima verko de Noeldeke restas ankoraŭ grava, informa ĉef-fonto pri la temo en la germana lingvo, kun bibliografio diverslingva.

IV. Brown, E. G.: *A Literary History of Persia*, vol. 1, 1969, pp. 166-172.

V. Nicholson, R. A.: "Mazdak", *c^e Encyclopaedia of Religion and Ethics*, vol. 8, pp. 508-510.

VI. (Perslingve): *Agajede Mazdak* (Doktrinoj de Mazdak), de multaj aŭtoroj, ed. Tehran, a. M. Nagavi, Atai Press, 4-a eld. 1352/1973.

5. R. C. Zaehner (1913-1974) svis-angla filologo, kaj fadulo pri Zoroastra religio, nostalgie rememoras (1961) la disfalon de tiu religio, sed samtempe emfazas, i.a., ke la irana ekburĝono kultura sole ebliĝis nur dum la islama periodo:

...kaj la malgaja fakto restas, ke Irano ekleviĝis kiel iu forta kultura ...potenco, nur tiam, kiam ĝi mal-konfesis sian propran religion, kiun ĝi

pp.57-61.

VI. Zaehner, R. C.: *The Teachings of the Magi. A Compendium of Zoroastrian Beliefs*, London, Sheldon Press, 1956 (facila, mallonga kaj informa).

Note 1: la samnoma poezi-filozofia ĉefverko de Niĉeo (Nietzsche: *Tiele parolist Zaratus^tra*, Esperanta traduko de Van Themaat, Helsinki, Fondumo E-o, 1977, 366 p.) havas nenium rilaton kun la doktrinoj de la irana profeto. "Ĉar Zoroastro estis la unua instruisto morala", tial, en tempo de la *Renveso de c^iuj valoroj*, Niĉeo deklaris ke "ankaŭ lin oni devus unue vipi!"

Note 2: la persa elparolo de la nomo de la irana profeto ĉefe estas Zartoŝt, kaj iam ankaŭ Zaratoŝt.

3. Pri (Manih/Manes) Mani, kaj liaj doktorinoj, vd:

I. Browne, E.G.: *A Literary History of Persia*, vol.1, Cambridge Univesity Press (first ed. 1902), 1969, pp. 154-166.

II. Bevan, A. A.: "Manichaeism", ĉe *Encyclopaedia of Religion and Ethics*, vol. 8, New York, 1926, pp. 394-402.

III. Puech, C.: *Le maniche´isme, son fondateur, sa doctrine*, Paris, 1949.

IV.Widengren, G.: *Mani und der Manichaeismus*, Stuttgart, 1961. La libro estas havebla ankaŭ angle (Weiden-Feld, London, 1965) kaj perslingve (Tehran, 1352-1973).

V. (Prese): *Mani va Dine U, eldonis A. Afshar Shirazi*, Anghomane Iran-shenasi (Iranologia Asocio), Tehran, 1355/1956, 684 p. La libro enhavas ĉiujn haveblajn tekstojn arabajn kaj pesajn pri Mani, kaj bibliografion ĉiulingve.

VI. Dectret, F.: *Mani et la tradition maniche´enne, collection micro.*, Seuil, Paris, 1974 (Maîtres Spirituels-40).

Note 1: la nomo de la irana profeto prese, arabe kaj internacie estas Mani. En mez-persa pahlavi-skribo oni skribis ĝin Manih, kaj ankaŭ iam Manihik. La greka elparolo de la lasta formo sonis kiel Manihaios, kaj latine Manichaeus. Tial, en okcidento jam delonge oni nomas lin sole Mani, sed lian doktorinon manikeismo. Ni eble devus nomi la doktrinon de Mani, maniismo, aŭ manianismo (simile al mazdakismo, zoroastrismo, ktp., vd. *PLV*). Tamen- kompreneble ne volonte - ni sekvis la kutiman okcidentan uzmajueron.

4. Pri Mazdako kaj mazdakismo, vd:

I.Ferdausi, A. (mort. 1020): *The Epic of the Kings*, translated from the

Bibliografio ĉe la notoj:

La bibliografio estas iom arbitre elektita, tute ne kompleta, sed kovras relative pli disponeblajn verkojn. Ĝi ankaŭ estas koncentriĝita pli sur iran-islamaj aspektoj de la temo. Plue, ĉar la elekto celas internacian ĝeneralan legantaron, la fontoj indikitaj estas pli okcidentaj ol arab-iranaj originalaj verkoj.

NOTOJ:

1. Pri la sociaj strukturoj kaj kast-sistemo en Irano antaŭ -islama vd:

I. Benveiste, E.: "Les classes sociales dens la tradition avéstique", ĉe *Journal Asiatique*, 1932, pp.116-134.

II. Christensen, A.: "*L'Iran sous les sassanides*, Copenhagen, 1944.

Note 1: la iranaj sociaj klasoj, kompreneble, jam estis - kaj ankoraŭ estas - favora temo por soveta iranistiko:

III. Dyakonov, M. N.: *Ocherk istorii drevnego Irana*, Moskva, 1961.

IV. Lukonin, V. G.: *Iran v epokb Sasanidov*, Leningrad, 1961.

V. *-kultura Sasanidskogo Irana*, Moskva, 1969.

VI. Perikhanyan, G. kaj Mazaheri, A.A.: "agnaticheskie gruppy v drevenem Irane", ĉe *Vestnik Drevenei Istorii*, 3, Moskva, 1968, pp.28-53.

VII. Grantovskii, E. A.: "*Rannyaya Istoriya Iranksikh plemen Prednei Azii*, Moskva, 1970.

VIII. Saheb-Zamani, M.H.: *Dibac'ei bar Rahbari* (Enkonduko al la Arto Gvidi Amasojn Orienteske- Teorie kaj praktike). Tehran 5-a eld., 1354/1975, pp.235-265.

2. Por detala informo, kaj ampleksa bibliografio pri Zoroastro kaj lia religio vd:

I. Zaehner, R. C. (1913-1974): *The dawn and twilight of Zoroastrianism*, London, Weidenfeld- Nicolson, 1961, pp.339-348.

II. Hinz, W.: *Zarathustra*, Stutgart, Kohlhammer, 1961, pp.263-271.

III. Duchesne-Guillemin, J.: *La religion de l' Iran ancien* Paris, 1962. Bibliografio.

IV. Oxtoby, W.G.: *Ancient Iran and Zoroastrianism in Festschriften*, Waterloo, Ontario, 1973.

V. Frye, R. N.: *The heritage of Persia*, sec. ed. London, Cardinal, 1976,

naciaj lingvoj. Ĝuste tion oni klopodas eviti! ...Ia naskiĝo kaj evoluo de Esperanto... almenaŭ prezentis al ni la direkton, en kiu eblas solvi la problemon[21].

Resume, oni kutime emas kerdi ke:

...Ĝiu nacio amas sian proparan lingvon pro tio, ke ĝi havas intiman rilaton kun la nacio. Se tiu nacio estas mistraktita rilate ĝian lingvon, precipe, se al ĝi estas altrudita alinacia lingvo, tio certe vekos grandajn malŝaton kaj malamon de tiu nacio...[22].

Sed, la ekzemplo de la islama civilizo montras klare, ke la afero ne estas tiel absoluta, mal-kompleksa, kaj unu-dimensia, kiel oni optimisme deziro-pensas. Kontraŭe, ĝi estas mult-dimensia, kaj interdependas de mal-samaj motivoj, kaj kaŭzoj. Tial, la problemo de interagado inter civilizo, kulturo kaj lingvo bezonas ankoroaŭ pli zorgoplenan, erudician atenton kaj pristudojn.

Koncize, Esperanto por Irano -Plej-verŝajne, sam-kiel, por multaj aliaj landoj de la Tria Mondo - havas gravan signifon. Nia landa movado klopodas atingi kelkajn celojn. Sed, pri tio, detale, alitempe!

Ni esperas, ke, venonte, ankaŭ la supre menciitajn temojn studos niaj esperantistaj kleruloj. Ekzemple, la rolo de la araba lingvo en Hispanio povus esti taŭga stud-materialo por niaj samideanoj tie. Similaj studoj pri la rilato inter la svagila kaj araba lingvoj en Afriko, aŭ la islama kaj urdua povus esti valoraj temoj por nia kolegaro en afriko kaj Azio.

Tiaj studoj certe povus pozitive ŝanĝi la komunikilan mondkoncepton pri esperanto ĝenerale. Tio montrus novan viv-eblecon de nia lingvo por hidiaŭa aplikado, kontribuus pli krean komprenon inter la tria-mondanoj, kaj ne-triamondanoj! Laste, sed ne malpli grave, tiaj studoj povus, espereble, iomete moligi la negativajn voĉojn en Esperantujo, kontraŭ niaj, bedaŭrinde, ne facile kompreneblaj urĝaj postuloj pri la scienco-teknika literaturo en Esperanto, pri iu koresponda esperantista universitato, kaj pri iu vere fizike, kaj tut-jare - ne nur tut-semajne - palpebla Universitato Esperant-lingva! Sed, por konvinki la skeptulojn pri la realigebleco de tiuj-ĉi aradaj postuloj eble ankaŭ alitempe, plidetale, aliloke!

Evidente estus neebla traduki ĉion en tia kongreso en la hispanan lingvon; tamen estus malfacile ne simpatii kun studentoj, kiuj scias, ke ilia registaro kaj ilia universitato faris grandajn klopodojn kaj elspezis multege da mono por faciligi la organizon de Mondkongreso, sed faris nur tre limigitajn aranĝojn por hispanlingvaj tradukoj...[19].

Se la afero -la anti-anglismo- ek-ŝajnus ankoraŭ esti iu junuleska, eble ne tre internasa, studenta protest-manifestacio en Latin-ameriko, sed, aliloke, en franc-lingvaj landoj, iĝis jam tre serioza konflikto. La anglismo ekde 1975 estas ja iu kontraŭleĝa, t.n. "anglomanio", en Francio. Laŭ la franca gazetaro:

La uzantoj de la franca lingvo, kaj ties asocio - AGULF (65 Bd. des Invalides, F-75007 - Paris) - gajnis jam du procesojn kontraŭ firmoj, kiuj ne aplikis la lingvan leĝon Bas Lauriol (1975-1977). Temis pri la flugkompanio British Airways, pro biletoj ne-surhavantaj kontrakt-kondiĉojn en la franca lingvo, kaj la entrepreno S.E.I.T.A., kies enlanda gazet-reklamo pri nova cigaredo estis tute en la angla lingvo! Post plurjara kampanjo, okazis en 1982 la unua internacia renkontiĝo pri aplikado de lingvaj leĝoj en franclingvaj. Pri tiu ĉi vasta temo diskutis en Parizo reprezentantoj el Belgio, Kanado, el Hispanio kaj Portugalio.

En februaro 1983, la ministro G.Filloud proponis liston de cent francaj neologismoj, kiuj povos anstataŭi anglajn teknikajn vortojn en la kampo de la komunikado...[20].

La saman sintenon spegulas "Lingvo kaj Nacia Sento", artikolo de Zhang Qicheng, el fora oriento:

... Ĝuste, kiel ni ĉiuj scias, imperiistoj agresas malfortajn naciojn ne nur per politiko, ekonomio, kaj milito, sed ankaŭ per kulturo; kaj trudi al la malfortaj nacioj siajn lingvojn estas unu rimedo el la rimedoj de kultura agreso! ... Nun Britio kaj Usono klopode disvastigas la anglan lingvon, kio ja ne povas esti senrilate kun ilia klopodo por disvastigi iliajn fortojn kaj influon... La angla estas la lingvo de Britio, kiu historie havis gigantan imperion, kaj ankaŭ la lingvo de Usono..., tial multaj landoj malvolontas akcepti la anglan, kiel la komunan lingvon. Ĉar tio sentigus humiligon antaŭ la brita-usona forto, kaj disdriminacion, kaj mal-estimon al aliaj

Usono pere de la hispanidoj[17]. La angla lingvo, kontraŭ-ŝajne, pli kaj pli foriĝas de eventuala monopolio de rapide florante kultura kaj eĉ scienc-teknika literaturo de la mondo. La mondo bezonas iun vere influzivan bankon por facile rezervi kaj ĝuste disdoni ĉiujn scienc-teknikajn, kaj kulturajn heredaĵojn de la homaro al ĉiu ajn homo, aŭ nacio. Jam pli ol 60% da tiaj heredaĵoj ekfloras en lingvoj aliaj ol la angla. Oni ne profitus mal-liberigi sin optimisme en la ebura kastelo de pseŭdo-universaleco de sia nacia lingvo! La lingvo universala, vere internacia, devus esti i.a. supernacia. La ideo -supernacieco de IL- neniel iu sola aspiro, aŭ nura mal-kovro, aŭ unika inventaĵo de iuj tria-mondanoj. Ĝi havis jam, kaj havas ankoraŭ, eĉ pli fortajn subtenantojn ankaŭ en nuntempa Eŭropo. Laŭ la rezolucio de la 60-a Germana Esperanto-Kongreso en FR Germanio:

...La decido, eldoni la Eŭropan Pasporton en la angla, kaj la franca, krom en la nacia lingvo, trovis fortan mal-aprobon, ĉar tio povas esti la unua paŝo reen al la lingva hegemonio de kelkaj potencaj popoloj. Racia, kaj neŭtrala solvo povas esti nur la uzo de Esperanto apud la nacia lingvo de la eldonanta ŝtato[18].

La angla lingvo havas ankaŭ pluan problemon ne facile solveblan. Ĝuste, aŭ man-ĝuste, oni ligadas ĝin, grandparte en la Tria Mondo, kun la amara memoro pri la koloniismo kaj la imperismo. Citaĵo, sen iu komento, el-klarigas la punkton, eĉ pli ol sufiĉas:

En la bulteno *ASA Footnotes* de la Amerika Sociologia Asocio (decembro, 1982), D-ro Melvin Kohn rakontas impresojn de la Deka Mond-kongreso de Sociologio okazinta en la urbo Meksiko en aŭgusto. Pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj grandskala protesto li diras:

Estis miriga kaj impresa sperto observi demonstracion de studentoj, kiuj postulis hispanajn tradukojn. Je la komenco de la tria Plendunsido... proksimume 750 studentoj marŝis en la salonegon, portante standardojn kun surskribitaj devizoj kiel:

- "En Meksiko ni parolas hispane, ne angle!"
- "For la kulturan koloniismon!"
- "Cervantes jes- Shakespeare ne!"
- "Deka Mondkongreso de Dociologio -nur por la elitoj- ĉesigu la imperiisman arogantecon!"

danĝera. Efedtive, la lernado de iu lingco apartenanta al la grandaj potencoj, por la anoj de la Tria Mondo, signifas, ne malofte, ankaŭ la elektadon de onia destino konfliktoplene politiksocia! Ja, vere la scipovo de fremada lingvo tiu-regione, neniam signifus absolutan kulturan valoron benoplenan, sed iun intervolvitan komplekson, perpleksigan paradokson de iu sociopolitika enigmo nesondebla! Tiel, ne nur personoj individue, sed kelktempe, eĉ unu generacio komplete, pro tio malgajnas tute la kaprican sortoludon. Ekzemple, oni zorgeme pripensu momente, pri la, pli-malpli, fatalaj sortoj de tiuj, kiuj scipovis la anglan en Vjetnamio, post la eliro de la amerikanoj, antaŭ lanova, suspektoplena, revolucia registaro de tiu lando! Oni pripensu, pri la politikaj konsekvencoj de la edukado de tiuj, kiuj nuntempe en Afganistano lernas la rusan lingvon, post la eliro de la soveta armeo el tiu lando! Nia propra viktimigita generacio en Irano, jam dufoje ek-spertis ege amare, ĝis-abisme de l' animo, tian plagoplenan indubsonĝon ĝuste, ĵus post du fatalaj defaloj de ekstreme malsamaj reĝimoj, en la lando! Tial, la supernacieco kaj la neŭtraleco estas dekreto nepra, verdikto sorta por ĉiu ajn supernacia pontolingvo, por ĉia ajn lingvo, kiel kultura banko internacia! Kaj tio, absolute ne estas vortludoj pli-bonigaj pro oratoraj efektoj, sed io serioze tut-konsiderinda, demando ĝismorta, sperto elveninte el nia profunda elserĉado pri sekureco. Alivorte, la urĝa postulo pri la supernacieco kaj neŭtraleco de la internacia pontoligvo estas logike, plitike, historio, sociologie, kaj psikologie la sekvo agonie akirita de nia longa batalo por la sola ekzistado digna en Irano - iu vere aktuala demando ekzistenciala por ni, antaŭ ĉiu ajn envolviĝo en ĉia ajn kunlaborado interkultura!

Aliflanke, oni ne troigu ankaŭ la potencon de la angla lingvo. Ĝi pretendas iun ŝajn-facilecon. Sed, tiuj, kiuj dum jaroj studis ĝin spertas tute kontraŭe. Krome la angla lingvo eĉ nuntempe, en sia sekura hejmo en Usono, ne plu regas monopole, kaj estas -pli-malpli- ekpremata ambaŭflanke. Iom, eble ankoraŭ neglektebla, de la franca lingvo el Kanado, kaj male, iomete pli ol iom, certe de la hispana lingvo el Latin-ameriko. Samtempe, kune kun ĉiu-jara enmigrado de centmiloj da hispanlingvanoj en Usonon, kaj pro la alta demografia kreskado de hispanlingvaj usonanoj, multaj metafore ek-parolas pri la rea venko super

kiel lando kun longa historio kaj bona literatura heredaĵo Ĉinio devas kontribui al la paco kaj progresema kultura afero de la homaro, kaj disvastigo de Esperanto estas nepre necesa[14].

Ankaŭ en Japanlando la komunikada ek-konsciado pri internaciaj eblecoj de Esperanto jam ek-burĝonis. Fidindajn indikojn liveras regule i.a. *Oomoto*,oficiala organo de Oomoto. Citaĵeto sufiĉe aludas al la sinteno kreskanta en Japanio.

En Julio, 1963, okazis memorfesto de 40-jara jubileo de Esperanto en Oomoto... Inaŭguriĝis la Esperanto- monumento monolita kun la vortoj ĉizitaj sur ĝi:

Unu Dio, unu mondo, unu Inter-Lingvo[15].

En mal-pli ol duonjarcento, Japanio atingis la plej imageblan altan nivelon, kaj militaristan kaj ekonomian. La mondo nuntempa ne plu atendas de "la lando de la suno leviĝa" militaristan, aŭ eĉ ekonomian miraklon, sed ek-leviĝan scienc-kulturan kontribuon internacian al la paco kaj inter-komprenemo! Per sia propra lingvo, Japanio estas izolita. Tial, plej eble la beno estas jam rezervita por la Lingvo Internacia! Se ni kapablus ek-tuŝi penetrante la majestan, ĝis-nun kaŝitan scienc-kulturan talenton de la nacio japana, ni konfide povus ĝui ĝiajn fruprintempajn fruktojn, eĉ en nia generacio.[16]

La inter-rilatoj de eg-potencoj, kaj iliaj lingvoj, ankoraŭ ne estis jam serioze pristudataj. La amikoj, kaj eĉ multe da malamikoj de Usono ŝatas la lingvon de Usono -la anglan- kaj lernas ĝin. Sed verŝajne, multe da amikoj de Sovetio ne tiel volonte lernus la rusan lingvon, pro ĝia malfacileco. Allogo de orient-eŭropanoj al Esperanto, povus i.a. esti pro tri ĉefaj kaŭzoj: unue, la naci-lingva izoleco de tiuj popoloj. Due, la malfacileco de la rusa lingvo. Trie, sed ne mal-pli grave, la limigita uzebleco de tiu lingvo internacie, ekster la sovetia bloko. Pollando certe havas pluan kaŭzon por admiri Esperanton. Zamenhof estis pollandan. Tial la Zamenhofa lingvo ankaŭ apartenas al la pollanda kontribuo al internacia kulturo. Tiel, Pollando havas krome sian motivon por esti por Esperanto!

Cetere, la apogado sur unusola lingvo okcidenta, por la etaj nacioj de la Tria Mondo, ne nur kulture povus esti tro riskema, sed ankaŭ politike tre

lingvon, sed ege minrinde, denove oficiale disvastigis la persan, kaj ĉi-foje en fremda medion[12].

La persa lingvo oficiale regin Hindion ĝis la totala invado de la angla lingvo. Simile, kiel irananoj - kiuj servis la araban- ankaŭ hindoj, kvankam malpli, kontribuis grave al la persa lingvo[13].

Nuntempe la arab-islama lingvo estas la 6-a oficiala lingvo de Hinda Unio. Kaj la urdua, alia frukto de Islamo, ankaŭ klopodas tie oficialigi sin.

Tiuj edzemploj aludas iom sufiĉe al aspedtoj de la kvazaŭ-dialektika interagado de la islama civilizo, kaj internacia komunikilo, pri kio oni ankoraŭ scias tre malmulte. Ni bezonas iun erudicie makrosociologian linvistikon por el-esplori tiun grandiozan komunikadan fenomenon.

Tiu grandioza vigleco komunikada atestas klare, ke io jam mankis - kaj ankoraŭ mankas- inter-komunikile en la nuna mondo! Ja, ĉio-ĉi montras profundan inter-homan, kulturan bezonon al nova super-komunikilo universala. La ilsama civilizo, siatempe, pli-malpli, kontentigis por si tiun bezonon. La ĝusta diagnozo de tia inter-agado inter tiu bezono, kaj ĝia ĝusta kontentigo, donus al ni lecionojn, ege utilajn ankaŭ por Esperanto. Nu, ĉu en tia medio, Esperanto havas veran ŝancon? Ĉu Esperanto povus plenigi interkomunikilan breĉon, kaj krei novan senprecedentan inter-rilaton? Niascie, minimume, la Tria Mondo estas potence bonveniga regno, tute virga tiuterence.

pro kialoj similaj, aŭ eĉ identaj, Esperanto alportas por Irano la bon-mesaĝon, jam de-longe sopiratan, pri la ebleco de alveno de iu nova renesanco humana kaj de nia kunlabora ĉeesto kultura sur la internacia scenejo. Laŭ nia sperto historia, ni emas kredi, ke ankaŭ Ĉinio kaj Japanio, krom per iu supernacia lingvo, kiel Esperanto, neniam povus ekonomie, facile kaj rapide, deklari siajn ĉeestojn en la internacia kultura kaj scienc-teknika areno.

Multaj indikoj atestas klare, ke nia kolegaro en Ĉin-lando sentas la samon pri si mem. *EPC^*, ĉiumonate, liveras multajn atestaĵojn. Unu el dekaj ĝisdataj ekzemploj de ĉina pri-sinteno frapvortas jene, en *El Popola C^inio*:

Vespere de la 18-a de Oktobro 1982 la Centra Televida Stacio de Ĉinio sendis programeron lun titolo "Esperanto en Ĉinio" por diskonigi la devenon, kaj evoluon de Esperanto... En la programero oni... montris, ke

interkomunikado grandskale, kaj mult-dimensie. Iranaj kleruloj verkis arablingve pli ol ĉiuj kleruloj de aliaj islamaj nacioj. Kontraŭe, la amasoj iranaj absolute ne adceptis la araban lingvon. Sed, la amasoj de Egiptio kaj ĉiuj nord-afrikaj landoj forlasis siajn proprajn lingvojn, kaj asimilis la araban. Hispanio, preskaŭ simile al Irano, malgraŭ ĉ. 8-jarcenta regado de araboj en tiu lando, entute ne adecptis la araban, kiel sian nacian lingvon[9]. Tamen. iuj arabdevenaj hispanaj kleruloj, kiel Averoeso (1126-1198) ktp, impone kontribuis al la islama kulturo arablingve[9].

Grava parto de Hindio -kune kun Pakistano kaj hodiaŭa Bengaldeŝio akceptis la islamon, rifuzis la araban, forlasis proprajn lingvojn. Sed, anstataŭe, Islamo kreis, en hindio, iun tute novan sintezan komunikilon- la urduan lingvon- per enmiksiĝo de la persa, araba, truka, kaj kelkaj lokaj disalektoj. la lingvo nuntempe estas la patrina lingvo de pli ol 350 milionoj da popolanoj en Suda Azio[10].

La svahilo, la alia komunikila kreaĵo islama, hodiaŭ estas kvazaŭ inter-landa lingvo de Afriko[11].

Islamo eltiris, el la Centra Azio, la turkan lingvon, kune kun ĝiaj triboj, enriĉigis ĝin per religio-filozofiaj terminoj, kaj faris ĝin la oficiala lingvo de la otomanida imperio (1299-1924), hodiaŭa Turkio, kaj partoj de la loĝantaro islama de Sovetio.

Tiel, Islamo ekmobilizis en la mondon la lingvojn de lu tute diversaj gentoj - la aragaj kaj turkaj. El tiuj limigitaj tribaj lingvoj ĝi elfaris fortajn oficialajn komunikilojn por du grandaj imperioj de la mondo: la abasida (750-1258), kaj la otomanida, aldone al la arablingvaj hispanaj dinastioj (710-1492).

Simple al la inter-reagoj de la araba, kaj ĝiaj homaj medioj, partoj de diversaj nacioj, en la islama mondo, forlasis siajn proprajn lingvojn kan asimilis la turkan. Originale ili ne estas turkoj, sed lingve parolas turke. Ekzemple, ĉ. 13 milionoj (1 el 3) da irananoj parolas turke hodiaŭ en Irano. Multe da ili ne estas turkdevenaj, sed asimilis jam la turkan lingvon.

Mongoloj invadis Iranon (1256-1349), kaj akceptis la islamon. Tamen, ili ne ekpuŝis sian proparan, nek sian saktan religian arag-islaman lingvon; sed ili akceptis la lokan persan lingvon, la lingvon de la venkitoj! Branĉoj de mongolaj triboj regis Hindion (1525-1857), kaj altransportis la lokan

Tial, ne menciante malmultajn esceptojn, tiuj ravaj eblecoj, senmezuraj kompensoj de jarcentaj lingvaj baroj, por irananoj mem-konsciaj, estas jam iuj trezore karaj atingaĵoj kulturaj, memorinde modelaj kaj klasike imiteblaj. Por ni, irananoj, ili estas ne teoriaĵoj, sed faktoj historiaj. Ili certe ne estas sopiroj romantikaj, sonĝoj adoleskaj aŭ fantaziaĵoj kapricaj, sed pripensita idealo relative praktika. Irananoj kun perspektivoj internaciaj kredas, ke ili preskaŭ sole per iu lingvo universala povus denove partopreni brile en ia alt-kultura agado internacia - kvankam la celo ne estus tiel proksima, kaj la vojo ne tiel ebena, kiel oni dezirus! Ĉu eble ankaŭ simila proceso povus esti, pli-malpli, ne-evitebla sorto de la plimulto de nacioj malgrandaj, kun siaj limigitaj lingvoj?

Por eviti kelkaj miskomprenojn, indus noti, ke la post-islama religia, aŭ politika aspekto, kaj la dimensio - unue religian, due imperian, aŭ politik-militarist-historian, kaj trie kulturan. La tri dimensioj de la islamo, kvankam interdependaj, tamen, havas malsamajn vizaĝojn, evolu-stadiojn de la islamo, kvankam interdependaj, tamen, havas malsamajn vizaĝojn, evolu-stadiojn, kaj fatalajn ne troveblajn en la kristanismo, aŭ budhismo; tial, ilin ofte kaj facile mis-komprenas islamistoj kaj religio-scienculoj okcidentaj. La tri dimensioj islamaj ne nur mal-ofte inter-subtenas, sed ofte kontraŭbatalas unu la alian tre mal-konstrue! Ĉi-tie, ni ne parolas pri la religia aspekto de la islamo, sed pri ĝia kultura dimensio, rezulte de ĝiaj ne-eviteblaj inter-agoj kun invadema imperia profilo de la islama civilizio mezepoka. Do, la prezentado klopodas esti pli kultur historia ol apologetika!

Komence, epizodo mal-longa politike ŝajn-printempa alvenis. Sed, baldaŭ poste, tre mal-hela aŭtuno ek-regadis en Irano. Ver-dire, dum socio-politike mal-feliĉa inter-tempo de du kruelaj ŝokoj de la arabaj, kaj mongolaj invadoj el leviĝis renesanco irana. Ja, enmeze de katastrofaj disfaloj, ruinoj, ve-spiroj, ploradoj, sangoverŝoj, incendioj, rufĝoj kaj mizere altrudita vagabonda viv-maniero, la kultura fenisko irana, mirakle, naskiĝis! Dum milito, kaj revolucio, denove nia-tempe, ni spertas iun trian invadon, kun ĉiuj ĝiaj ne antaŭvideblaj sekvoj- sed, ĉu ankaŭ ĉi-foje la invado iĝos kulture frukto-dona, la incendio fenikso-naskiga?

Socio-lingvistike, la islamo faris mirinda revolucion i.a. pri la

Irano signifis ne nur religion, sed ion multe pli - verdire, ian renesancon eble eĉ la alt-kulturan ek-burĝonon[5]. Kaj tiu riĉa ek-florado kultura elvolviĝis per mirinde radikala ŝanĝo de multaj lingvaj komunikiloj.

La granda venko islama kaŭzis la falon de la kasta ordo en Irano (7-a jc p.K.). La mezpersa lingvo, la pahlavia aŭ la lingvo de la magoj kaj altaj kastoj, kun sia ege malfacila ortografio, kvazaŭ mortis[6]. Ĝin oni studas hodiaŭ nur pro filologiaj interesoj.

Kun la disfalo de la sasanida Imperio (226- 652) en Irano, falis ankaŭ la klasika aramea lingvo. Ĝi estas la internacia lingvo de la sasanida administracio mez-orienta. Hazarde, la klasika aramea estis ankaŭ la sankta lingvo de la fondinto de manikeismo. Tiu samtempa lingva defalo kun la Sasanida Imperio mem kontribuis ankaŭ multege al la rapida morto de manikeismo en Meza Oriento.

La lingvo de mal-avantaĝaj kastoj iranaj ĉ. 96% de la loĝamtarp farĝis la fundamento de la nuntempa persa lingvo. Tiu lingvo kreskadis dum la islama epoko, kaj skribiĝis unuafoje per pli perfekta alfabeto. Ĝia aboco estis, kaj estas, tute nova, kaj pliege simpla ol la duon-ideografia skribado de la pahlavia. La persan alfabeton oni eltiris el la arabaj skrib-signoj, kaj fonetike konformigis al la sonsistemo de la persa lingvo.

La plimulto de iranaj kleruloj elektis la araban lingvon kiel sian super-nacian komunikilon. Tiel ĉ. 70% el la verkistoj kaj scienculoj de la islama kulturo en la mezepoko estis iranaj aŭtoroj, kiuj verkis arab-lingve[7]. Fame konataj nomoj kiel Aviceno (980-1037), kajjamo, Gazalio, Birunio ktp, kiuj apartenas al la trezoro de la monda literaturo, estis irananoj de la ilsama periodo. Ili elektis la araban lingvon por pli vaste aŭdigi sin al la homaro. Kompreneble, la granda famo de Kajjamo estas pro liaj poemoj (ankaŭ tradukitaj Esperanten du-foje, de Waringhien kaj de Auld). Li poemis perse, sed siajn matematikajn kaj filozofiajn verkojn li skribis arablingve.

Irananoj, dum la tuta historio, nur unufoje, inter la 7-a kaj 14-a jarcentoj, havis la ŝancon montri al la mondo sian kulturan genion. Kaj tion ili faris, mirindege, ne per sia nacia lingvo, sed ja nur per iu tute fremda, semida lingvo - la araba! Iliaj verkoj estis legataj, laŭdataj kaj instruataj en la lernejoj de almenaŭ tri kontinentoj, de Hindio, tra Nord-afriko, ĝis Hispanio[8].

Ni ofte povus konstati la ekzistonde iu komunikada kern - elemento, nome lingvo, en grandaj movadoj, kiel la resesanco, reformacio, humanismo, aŭ eĉ en marksismo, ktp. Tiuj movadoj ĉiam komenciĝis per la revolucia alrigardo al lingvoj, t.e. la ek-ŝanĝo de la atento kaj utiligado de la homa inter-komunikilo nov-stile!

La renesanco kaj humanismo ekestiĝis ĉefe per la reveno al la klasika greka lingvo, kaj la latina de antaŭ-kristo. La reformacio i.a. signifas kontraŭstaron al la latina, kaj apogon al naciaj lingvoj - denove radikalan ŝanĝon de la lingva komunikilo! La anglikanismo, kiel la protestantismo, ŝuldas grandparte sian sendependecon ankaŭ al la revolucia ekŝanĝo de sia domunikilo, nome for de la latina al la angla, La mardsismo, sen transvestado lingva de sia griginala vesto komunikila - la germana lingvo- kaj sen elekto de aliaj pli vastaj trans-misiiloj praktike, ne povus antaŭen - salti oriente, en Ruslandon kaj Ĉinion. Kaj ĉiuj- ĉi kune kontribuis al alivizaĝigo de kulturo daj civilizo de la okcidento specife, kaj de la mondo ĝenerale.

Pli- Malpli, similan procezon tra-spertis ankaŭ la budhismo. La budhismo komencis sian grandan venkon orienten per ekŝanĝo de originale hindo-eŭropaj al pli orientaj, hindoĉin-japanaj lingvoj, en la jaro 61 p.K. en Ĉino, kaj 552 p.K. en Japanio.

En la antaŭ-islama historio de Irano, ekzistis ia kasta ordo kun siaj antaŭjuĝoj kaj baroj, Tiuj antaŭjuĝoj kruele baradis lingve, religie kaj kulture la kontaktojn inter la kastoj. Nur la lingvo de la altaj kastoj (ĉ. 4% = 1.500.000 el 40 milionoj de popolanoj) havis skriban literaturon. La amasoj, laŭ la kasta regularo, ne havis posedrajton. Ili ankaŭ ne havis la rajton je edukado, eĉ ne en la elementa stadio [(1)].

En Irano antaŭ-islama ni ne konas iun veran scienculon, filozofon, poeton, aŭ verkiston, escopte de kelkaj nomoj, kiuj sonas esti pli legendaj figuroj, krom la reala persono de la Profeto Zoroastro iam inter la 10-a kaj 6-a jarcento a.K.[(2)], Manikeo (215-272 p.K.) -la irana Kristo-Budho, kaj la fondinto de la manikeismo[(3)] - kaj Mazdako (6-a jc) - la fondinto de mazdakismo - irana socialismo[(4)]. Irano tiama, kulture se ne tute mortinta, sed almenaŭ ŝajne estis steriligita. La verkoj de tiamo estas ĝenerale religiaj, iomete epopeaj, kaj mitologiaj. Tial, la posta alveno de Islamo por

El: "Serta Gratvlatoria, In Honorem
Prof. Juan Régulo,
Universidado de la Laguna (Hispanio),
1987, II, Esperantismo":

IRANO, ISLAMO, KAJ LA SUPER-NACIA LINGVO - ESPERANTO

M.H.SAHEB-ZAMANI
Universitato de Tehrano (Iran)

Tiuj, kiuj ne memoras la pasintecon, estas kondamnitaj revivi ĝin.
George Santayana (1863-1952)

§ E-390:

Oni demandas min, interalie, kial vi elektis Esperanton? Kial vi batalas por ĝia dis-vastigado, eĉ dum la vivo-danĝera, susekto-plena tempo de milito kaj revolucio en Irano? Kian signifon Esperanto havas por vi persone, por Irano nacie, por la Tria Mondo kulture, kaj por la mondo ĝenerale...?

La kristianismo, plej verŝajne, povis antaŭensalti ĉefe per leekto de unu okcidenta lingvo hindo-eŭropa. Ĝi elektis la grekan lingvon kiel superkomunikilon tiaman mlfavore al siaj mez-orientaj, originalaj, semidaj lingvoj - la aramea kaj la hebrea. La plej granda skismo en la historio de la kristana eklezio (en 1054), la dividiĝo en ortododsan kaj katolikan, okazis i.a. pro la eniro de iu refoje nova lingvo - la latina - kiel alia sankta lingvo, en la okcidentan katolikan kristanismon.

skribante ekzemple: "Mi legis, ke Unesko jam en 1954 akceptis jenan rezolucion pri la internacia lingvo Esperanto: ...Ĉar mi preparas artikolon (aŭ prelegon) pri tiu temo, mi petas vin afable informi min, kian sekvon Unesko ĝis nun donis al tiu rezolucio?!" La rezoluciotekston ĉiu povas trovi en la Jarlibro. Se en ĉiu lando venados multaj tiaj demandoj al la nacia Unesko-komisiono, ĝi estos siavice devigita turni sin al la sekretariejo de Unesko en Parizo, kaj tiel kreiĝos nerekta, sed forta kaj tutmonda premo al Unesko, ke ĝi okupiĝu pri tiu demando, premo tute demokrata. Neniu ŝtato mem levos tiun demandon proprainiciate, kaj Unesko mem certe ne konsideros ĝin, se neniu levos la demandon. Sed per tiu metodo ni povas krei socian premon kaj postulon.

Due, en ĉiu lando ekzistas multaj reprezentejoj de aliaj ŝtatoj: ambasadoj, konsulejoj, legacioj. Ĉiu individuo povas foje skribi al la kultura ataŝeo aŭ la ŝarĝito pri informado de unu aŭ alia tia reprezentejo kaj simple demandi, ekzemple jene: "Mi estas intruisto, aŭ mi verkas artikolon aŭ studon, aŭ mi preparas prelegon aŭ mi interesiĝas pri la pozicio de Esperanto en la mondo. Mi afable petas vin informi min pri la pozicio de Esperanto en via lando. Se vi disponas pri broŝuroj, filmoj, libroj en aŭ pri Esperanto, bonvolu informi min aŭ sciigi min, kie mi povas ricevi informojn pri tio en via lando. "Aŭtomate la koncerna diplomato turnos sin al la eksterlanda ministerio de sia propra lando, kaj tiu siavice trunos sin al diversaj kulturaj institucioj, ekzemple al la ministerioj de kulturo aŭ edukado, al universitatoj ktp., kaj tiamaniere kreiĝos oficiala korespondado pri Esperanto, kaj en tiaj oficialaj instancoj oni konsciiĝos, ke ekzistas publika interesiĝo pri Esperanto. Sufiĉas, se ili per tio nur konsciiĝos, ke Esperanto ekzistas . Por tiu agado oni ne bezonas esti profesoro aŭ verkisto aŭ gvidanto de la movado; ĉiu ajn, kiu kapablas verki leteron, povas tiel kunlabori. Tian agadon mi rekomendas al miaj lernantoj en Irano kaj rekomendas al la tutmonda Esperanto-movado.

Esperanto Revuo, PP. 4-8.
Intervijuis d-ro V. sadler

Universitato de Teherano, mi instigis la vicrektoron de la Universitato skribi al la Ĝenerala Direktoro de Unesko leteron, en kiu li koncize raportis, ke konforme al la Unesko-rezolucio de Montevideo, en Irano oni organizis tiajn kursojn kun tiaj rezultoj. De Unesko venis respondo, per kiu ĝi montris interesiĝon kaj petis pli detalajn raportojn. Tiajn raportojn ni nun preparos kaj sendigos al Parizo. Mi estas certa, ka ankaŭ tiu letero helpis stimulisron M'Bow akcepti la invition de UEA ĉeesti la Kongreson en Islando.

Ankoraŭ alia tia rimedo estis la Publika Letero, kiun mi sendis en la angla lingvo al la 25-a Kongreso de la usona Esperanto-asocio ELNA. Nome, mi poste decidis tradukigi ĝin en plurajn aliajn lingvojn - en la hispanan, en la germanan, en la italan ktp - kaj por tio mi trunis min ekzemple al la Germana Preĝejo, al disversaj ambasadoj, kaj petis ilin helpi min per traduko. Mi sciis, ke ĝenerale la personoj, al kiuj mi turnis min, devos peti permeson de siaj superuloj por fari tiun traduklaboron por mi. Sed mi estis certa, ke ili faros tiun komplezon kaj ankaŭ, ke per tiu rimedo multaj personoj devos paroli pri Esperanto aŭ iel okupiĝi pri ĝi. Per tiaj metodoj mi iom post iom kreas ian inter- nacian poŝtan trafikon pri Esperanto en elektitaj medioj. Tiun publikan leteron kaj ĝiajn tradukojn mi mem sendis al multaj elektitaj personoj en kaj ekster Irano, al ĉirkaŭ 400 adresoj entute.

D: Kiamaniere laŭ via opinio la Esperanto-movado en aliaj landoj povas plej bone apogi vian agadon? Ĉu vi havas konkretajn proponojn por la agado en aliaj mond-partoj?

R: Por mi, kiu havas tre specifan sperton kiel profesoro kaj verkisto laboranta en la apartaj kondiĉoj de la irana movado, estas iom malfacile fari proponojn pri aliaj mondpartoj. Sed mi ja havas du sugestojn, kaj mi opinias, ke ĉiuj povas apliki ilin, kaj mi certe mem faros la samon.

Kiel vi scias tre bone, en ĉiu lando ekzistas nacia komisiono por Unesko. La rezolucio de Unesko akceptita en Montevideo pri Esperanto vere donas al Unesko la moralan devon helpi kaj apogi la movadon. Ĉiu esperantisto povas foje turni sin al sia nacia komisiono por Unesko,

pesimisma, tio estas komprenebla pro via sperto, ĉar ĉiam vi okupiĝis pri tiaj fundamentaj eldonaĵoj, kiuj vere estas necesaj, sed kiuj ne havas merkaton.

D: En Irano vi jam kontaktis kun registaraj instancoj, kun religiaj kaj universitataj instancoj. Ĉu vi havis kontaktojn ankaŭ kun iuj internaciaj kompanioj aŭ organizaĵoj?

R: Jes, tiajn kontaktojn mi intence ligis. Ekzemple, en Irano ekzistas kristana minoritato, en kiu estas reprezentitaj diversaj eklezioj: Romkatolika, evangelia, anglikana, presbitera, luterana kaj aliaj. Por veki ilian atenton por Esperanto, mi unue trunis min al la Biblia Societo de Irano. Montriĝis, ke ili eĉ ne scias, ke ekzistas la *Biblio* en Esperanto. Do mi petis ilin informiĝi pri tio, kaj sekve ili devis skribi al Londono por demandi, ĉu biblioj en Esperanto estas haveblaj. Venis la respondo, ke jes, kaj tiam mi mendis 30 ekzemplerojn por vendi inter la lernantoj de niaj kursoj. Kompreneble, mi estus povinta tuj mendi ilin ĉe UEA, sed mi volis per tio atentigi ilin pri la lingvo kaj ankaŭ atentigi la centron en Londono, ke jen en Irano ekzistas merkato por la *Biblio* en Esperanto.

Krome ekzistas ĉi tie t.n. Centro de Rimedoj kaj Studoj, kiun subtenas la Evangelia Presbitera Eklezio de Usono. Tie laboras diversaj kristanaj kleruloj. Jam frue mi klopodis veki tie interesiĝon pri Esperanto, kaj ankaŭ tie mi esperas baldaŭ instrui. Mi petis ilin kontakti kun Kent Taylor, kiu parafraze tradukis la *Biblion* en la anglan lingvon kaj per la profitoj el tiu furore disvendita traduko starigis fondaĵon por prepari similajn tradukojn en aliaj lingvoj. Mi petis, ke oni sondu, ĉu ili pretas konsideri tian parafrazan tradukon en Esperanto, kaj ankaŭ pri tio estas jam interŝanĝitaj pluraj leteroj. Mi turnis min ankaŭ al pluraj ambasadoj, petante materialojn pri aŭ en Esperanto, kaj ĵus pasintsemajne la ŝarĝito pri informado de la Aŭstralia Ambasado scigis min, ke alvenis du filmoj en Esperanto el Aŭstralio kaj kvanto da libroj, kiujn mi povos prunte-preni por la kursoj. Mi anoncos al miaj kursanoj, ke ni projekcios tiujn filmojn, kaj espereble venos filmoj en Esperanto ankaŭ el aliaj landoj, kiujn ni povos montri. Ni turnis nin ankaŭ al Unesko. Ĉar niaj kursoj okazas en la

en ĉiu unuopa lando kaj por kunordigi la mendojn tiel, ke ĝi povu prezenti al tiaj gravaj eldonejoj kombinitan garantion de la merkato.

D: Mi kredas, ke vi estas iom tro optimisma pri la ĝisnuna merkato en la Esperanto-movado, sed, se ni havus eĉ nur 5 landojn kiel Irano, kie ekzistus nova merkato por, ni diru, po 100 ekzempleroj, tio jam farus signifan diferencon.

R: Eble mi estas optimisma pro la rezultoj de nia laboro ĉi tie. Eble tio estas natura reago al la videbla kresko de nia movado ĉi tie en Irano. Aliflanke mi kuraĝas opinii, ke la ĝisnuna sperto de UEA ne estas la ĝusta sperto por pritaksi tian merkaton. La libroj, kiujn oni ĝenerale eldonadis en Esperanto ĝis nun, el la vidpunkto de nia celo, estis plej ofte la malĝustaj libroj. Ni prenu kiel ekzemplon la *Koranon*. Estas belege, ke aperis la Esperanta traduko de la *Korano*, prestiĝa eldonaĵo, montrinda, komplimento al la islama mondo, pruvo pri la universaleco de Esperanot..., sed tute alia afero estas efektive vendi ĝin al islamanoj, ĉar ĉiu islamano havas en sia hejmo tradukon de la *Korano*, same kiel en kristanaj hejmoj oni jam trovas nacilingvan tradukon de la *Biblio*. Do ne ekzistas granda merkato por la Esperanta *Korano*.

Ĉefe aĉetas ĝin kolektantoj, sed ilia nombro estas limigita. Alia ekzemplo estas *Esperanto en perspektivo*. Ĝi estas bona manlibro por homo de mia kalibro, kiu volas gvidi la Esperanto-movadon en sia lando kaj sekve devas esti bone informita pri ĉio detale. Sed tio ne estas verko por studento. Studento ne bezonas profundan scion pri la laŭŝtupa disvolviĝo de la Esperanto-movado, ne volas scii, kiu estis malamiko de Esperanto, kiom da homoj mortis pro Esperanto aŭ en kiu jaro estis distribuita tiu aŭ alia cirkulero por aŭ kontraŭ Esperanto. Mi ne vidas en Esperanto tiajn librojn, kiaj estas troveblaj ekzemple en la angla serio Penguin, ekzemple pri psikologio aŭ pri aliaj sociaj sciencoj - tiaj vekoj, kiajn ĉiu volas trastudi kaj konservi ĉe mane kiel informlibrojn. Tiaj detalaj libroj pri Esperanto, kiel *Esperanto en perspektivo*, estas grava fundamento por la Esperanto-movado en ĉiuj partoj de la mondo, sed ili ne estas libroj, kiuj povas atingi vastan merkaton. Tion necesas konscii. Do, se, vi trovas, ke mi estas iom

landoj, precipe en la nove riĉigintaj nafto-produktaj landoj aŭ en la novaj ekonomiaj potencoj kiel Japanujo, kiuj ne havas lingvajn avantaĝojn en monda skalo, venu la mono por tiu celo. Ĉu vi povas imagi, ke en baldaŭa estonteco Irano povus ludi iniciatan rolon en interregistara nivelo tiurilate?

R: Vi menciis japanujon, kaj laŭ mia opinio ni bone povus komenci de tie. En nia regiono oni ne timas politikan intereson de japanujo, kaj la japanoj mem suferas lingvan diskriminacion en la mondo. La japanoj represas multajn librojn en Esperanto, sed ili devus ankaŭ pli multe traduki bazajn studlibrojn kaj eldoni ilin. Ili havas la kapablon distribui tre efike siajn varojn de aliaj specoj, kaj ili povus fari la samon pri libroj, konstruante al si internacian libromerkaton pere de Esperanto.

En Irano mi mem parolis kun pluraj el la ĉefaj eldonistoj, kaj ili estas pretaj kunlabori, sed necesas, ke iu venu al ili kun konkretaj proponoj. Necesas ia kampanjo , ia organizita agado ĉe ili. Bona ekzemplo estas la verko de Italo Chiussi *Je la flanko de la profeto*. Mi parolis kun pluraj personoj en Irano, kaj ni jam povis antaŭmendi cent ekzemplerojn. Kiel vi scias, hieraŭ ni havis aŭdiencon ĉe Lia Moŝto, kaj li deklaris: " Se en tiu libro estas nenio, kio kontraŭas la ŝijaisman koncepton de islamo, kompreneble ankaŭ ni povas aĉeti multajn ekzemplerojn por helpi la eldonon de tiu libro."

Mi estas certa, ke de ĉiu bona libro ni povos vendi en Irano almenaŭ cent ekzemplerojn, kaj, se en aliaj landoj oni komencus tiajn movadojn por Esperanto, kiel ni faris ĉi tie, jam baldaŭ estus granda merkato. La ekonomiistoj kaj la komercaj eldonejoj ankoraŭ ne konscias pri la potencialo de tiu merkato, kaj necesas atentigi ilin pri ĝi. Mi scias, ke foje venis al Irano reprezentantoj de Oxford University Press por diskuti pri kunlaboro kun la eldonejo de miaj verkoj. Ili estis pretaj entrepreni novajn eldonojn, se ili nur havis garantion pri vendo de 500 ekzempleroj. Kial do ili ne farus same por Esperanto, se ni povus garantii al ili bazan merkaton? Tiaj komercaj eldonejoj havas eblecojn por libro-distribuo tra la mondo, kiuj estas ankoraŭ nekonataj por UEA aŭ aliaj Esperantaj eldonejoj. UEA devus kunlabori kun la landaj Esperanto organizaĵoj por sondi la merkaton

tiuspecaj. Krome, inter la ĉefaj taskoj de Unesko estas la popularigo kaj disvastigo de la scienco kaj kulturo, precipe al la landoj de la Tria Mondo. Ĝi devus kunlabori kun la Esperanto-movado por kreskigi tian literaturon en Esperanto.

Unuavice, laŭ mia opinio, necesus eldonigi bazajn lernolibrojn pri sociaj sciencoj kaj due pri studoj matematikaj teknikaj. Provizore ne estas bezonataj poezio kaj belliteraturo. Trie taŭgaj estas ekzemple malgrandaj enciklopedioj aŭ informlibroj pri sociaj sciencoj, pri ekonomiko, pri industrio k.s. Tiaj verkoj ekzistas en multaj lingvoj, ekzemploj estas la serioj *Pelican* en Britujo, *Que sais-je* en Francujo. Ni povus eletkti la plej bonajn en ĉiu kampo, kaj traduki ilin en Esperanton. Tie havus samtempe la rezulton, ke per tio multe riĉiĝus la lingvo per la evoluigo de la baza scienca terminaro, kio estas tre necesa. Poste povus sekvi pli ampleksajn enciklopediojn, prestiĝajn eldonaĵojn, kiuj ebligus konvinki eĉ la plej skeptikajn intelektulojn de la Tria Mondo, ke Esperanto povas konkurenci kun ĉiu ajn alia lingvo.

Sed mi rekomendas ne eldonadi tro multe da poezio kaj belliteraturo, ĉar ĝenerale tiaj verkoj jam ekzistas en multaj lingvoj. Ekzemple, la verkoj de Shakespeare estas multfoje tradukitaj en la persan lingvon, do Shakespeare en Esperanto estas interesa kaj havinda, sed ĝi ne allogas la lernantojn ĉi tie, ĉar tion ili povas legi en la persa lingvo. Poezio jam abundas en nia lingvo, kiel ankaŭ en la lingvoj de Hindujo kaj multaj aliaj landoj, do la poezio en Esperanto ne estas tio, kio povas kapti ilian intereson.

Cetere multaj perslingvaj poetoj tradukadas el aliaj lingvoj. Ĉiusemajne aperas persaj literaturaj revuoj kun tradukoj el la poezio latin-amerika, franca, angla, rusa kaj multaj aliaj. Do tio ne estas io, al kio la popolo sopiras. Sed tio, kio mankas aŭ ne estas sufiĉe havebla en nia lingvo, tio estas la literaturo scienca, teknika, ekonomika kaj simila.

D: Ŝajnas al mi, ke la financaj rimedoj por vere evoluigi tian sciencteknikan literaturon en Esperanto povas veni nur de grandaj fondaĵoj aŭ ŝtataj instancoj. Kaj ĉar evidente la bezono ekzistas unuavice en la Tria Mondo, estus logike atendi ke de registaroj aŭ fondaĵoj en tiuj

niaj respektivaj landoj aŭ por interŝanĝi poŝtmarkojn. Ni bezonas lerni ĉi tiun lingvon por scienco kaj tekniko, kaj ni bezonas povi lerni pri scienco kaj tekniko per tiu lingvo. Bedaŭrinde, se niaj studentoj scius, ke tiu literaturo, kiun ili bezonas por lerni pri natursciencoj kaj sociaj sciencoj kaj tekniko, ankoraŭ ne estas havebla en la Esperanto, ili senreviĝus kaj perdus la entuziasmon, kiun ili nun montras. Tio estas granda danĝero. En publika letero al la Esperanto-ligo por Norda Ameriko mi provis klarigi tion. Mi estas certa - kaj kiel specialisto por la Monda San-Organizo mi multe vojaĝis tra aliaj landoj de la Tria Mondo-ke la situacio estas simila en ĉiuj evolulandoj.

D: Evoluigi signife utilan edukan literaturon en Esperanton bezonas sufiĉe grandajn financajn rimedojn. La ĝisnuna literaturo de Esperanto, kiel vi scias, estas konstruita per penaj oferoj de individuoj kaj granda laboro tra pluraj jardekoj. Kiel vi imagas, ke estus eble evoluigi pli rapide tian literaturon por kontentigi la bezonojn de la Tria Mondo, kaj pri kiuj specoj de literaturo estas la bezono plej urĝa laŭ via opinio?

R: Estas efektive malfacile tion respondi. La popol-amasoj de la Tria Mondo sentas bezonojn. Grandparte ili estas ankaŭ malriĉaj kaj ne povas antaŭe investi monon por produktado de libroj. Sed ja ekzistas eblecoj kunlabori kun multaj eldonistoj en la Tria Mondo por eldono de sciencaj verkoj. Ekzistas riĉaj eldonistoj, kiuj pretas oferi monon por bonaj celoj. Ankaŭ multaj okcidentaj eldonistoj estus pretaj eldoni en Esperanto, se per kunlaboro de niaj organizaĵoj ni povus garantii al ili iun minimuman eldonkvanton. Kvankam ni havis en niaj kursoj ĉi tie nur 2500 lernantojn en la unua jaro, tamen jam vendiĝis 7500 ekzempleroj de nia lernolibro, kaj la lernantoj nun komencas postuli aliajn, pli taŭgajn legaĵojn. Necesus, ke la okcidentaj Esperanto-organizaĵoj turnu sin al konataj Esperanto-eldonejoj, ekzemple al la brita eldonejo Penguin, klarigante la perspektivon pri la potenciale kreskanta merkato en la Tria Mondo kaj proponante, ke ili garantios aĉeti difinitan bazan kvanton (ekzemple mil ekzemplerojn) de ĉiu taŭga verko, kies tradukon en Esperanto komisios kaj eldonos tiu eldonejo. Ankaŭ en Japanujo certe troviĝas eblecoj

miskomprenojn kaj psik-originajn malsanojn; multaj, kiam ili revenas el eksterlando, estas fremdiĝintaj, kaj tio kreas multajn problemojn por nia lando. Simile estas en ĉiuj aliaj tiaj landoj.

D: Do - dum en Eŭropo ekzemple oni allogas lernantojn al Esperanto, dirante: "Jen facila ligvo, kiun vi povas uzi, kiam vi vojaĝas por libertempo, por korespondi, por kolekti poŝtmarkojn ktp." - via startegio rilate la Tria Mondon estas argumenti, ke jen estas lingvo, per kiu oni povos atingi superan kleriĝon, anstataŭ pere de la angla, franca, germana aŭ alia lingvo, kiun oni nur kun granda peno kaj nur en esceptaj kazoj lernas sukcese. Ĉu vi ne renkontas tamen la argumenton aŭ la dubon ĉe viaj studentoj, ĉu Esperanto havas tian literaturon aŭ povas evoluigi tian literaturon, ke ĝi povos anstataŭi ekzemple la anglan?

R: Unue mi devas komenti pri la unua parto de via demando, antaŭ ol respondi al la dua parto. Mi sincere respektas la laboron de la Esperanto-movadoj en la Okcidento - Ameriko kaj Eŭropo - sed mi devas konstati, ke ili rigardas Esperanton kiel agrablaĵon, ian luksaĵon. En iliaj lingvoj ja ekzistas adekvataj literaturoj, kaj neniam ili venas al la ideo, ke por ili necesus lerni fremdan lingvon por akiri eĉ nur elementan scion pri unu aŭ alia fako. Do kial ili lernu Esperanton? Por mi tio estas miriga: por ni en la Tria Mondo estas mirige, ke ili lernas Esperanton, kaj estas tre laŭdinde, ke ili fars tion.

Sed ili kunvenas, ĉiujare 3-5 tagojn eble en iu kongreso, ili kantas, iom diskutas, renkontiĝas, iras hejmen kaj interŝanĝas poŝtkartojn aŭ eble kaseton en Esperanto. Por ni, aliflanke, temas pri nia kultura vivo aŭ morto. Ni devas elekti iun lingvon, kaj pere de tiu lingvo ni devas akiri la scion, pri kiu ni malsatas, la teknikan scion de la moderna mondo. Ni devas elekti unu lingvon, ĉar ni ne povas oferi tiom da tempo, kiom necesas por lerni 2 aŭ 3 lingvojn - nur por lerni iun rimedon por atingi la celon. Ni jam konstatis, ke ĝenerale, ni ne kapablas mastri la anglan, francan aŭ germanan, eĉ post 10 aŭ 15 jaroj da studado.

Do, por ni Esperanto signifas esperon. Sed ni kiel lukasaĵo, ne kiel nura rimedo por korespondi kaj informi unu la alian pri la turismaj belaĵoj de

lernejoj de Japanujo. En Hinda Unio, la angla fariĝas nur duon-oficiala lingvo, ne plu la oficiala, kaj por tio necesis nur ĉirkaŭ 1/14 de la tempo, kiun la kolonia potenco bezonis por enkonduki ĝin en Hindujon. Vere, la investo de tiom da laborhoroj kaj monrimedoj estas por la malriĉaj landoj kompleta perdo.

D: Ĉu ne ekzistas ia adekvata scienca literaturo en la persa lingvo, por ke la studentoj povu kleriĝi pri la modernaj scienco kaj tekniko pere de ĝi, aŭ ĉu oni ne povus evoluigi en la persa lingvo tian literaturon?

R: Kiel vi scias, la scienco kreskas, laŭ la kalkuloj de la sociologoj kaj historiistoj pri scienco, je proksimume 6,6% jare. Tio signifas, ke la scienca literaturo duobliĝas en la daŭro de ĉ. 11 jaroj. Mi povas diri malkaŝe, ke tia kresko tute ne ekzistas en la persa lingvo- lingvo de 35 milionoj da homoj ĉi tie kaj eble de entute 50 milionoj, se oni enkalkulas tiujn, kiuj parolas ĝin en Afganujo, Hinda Unio, Pakistano, Taĝikujo kaj aliloke. Ankaŭ aliaj lingvoj neniel povas konkuri kun tia grandega kresko de la scienco; simple ne eblas tiakvante tradukadi en tiujn lingvojn. Do, ni vere ne posedas sciencan literaturon kaj tial ni devas studi fremdajn lingvojn. Ni havas franclingvan universitaton en Hamadan, anglalingvajn universitatojn en Ŝiraz.

Ligitajn al iuj usonaj universitatoj: Ni havas arablingvajn universitatojn por teologiaj studoj, kaj nun oni fondos ankaŭ germanlingvan universitaton. Estas vere ĥaoso, kaj la homoj fariĝas fremduloj en sia propra lando; ili ligas sin jen al unu, jen al alia kulturo, kaj ni perdas nian kulturan unuecon kaj kulturan personecon. La intelektuloj ĉiam pli fremdiĝas al la popolamasoj kaj ankaŭ fremdiĝas inter si, depende de tio, aŭ ili studis en Usono aŭ Francujo aŭ aliloke.

Ni devas lerni fremdan lingvon, do kial ne unu universalan ligvon? Mi menciis la koston de fremdlingva instruado en lernejoj, sed oni memoru, ke ankaŭ en la universitatoj oni instruas fremdajn ligvojn, same en diversaj privataj elementaj lernejoj, kiuj estas tre multekostaj, tiel ke malmultaj povas sendi siajn infanojn tien. Multaj infanoj kaj studentoj iras eksterlanden por lerni fremdan ligvon, kaj tio kaŭzas multajn

povi atingi pere de komunikilo tre facile lernebla. La 347 jaroj da brita kolonia regado en Hindujo kaj aliaj mondpartoj pruvis, ke la tiel nomataj naturaj lingvoj de la Okcidento ne taŭgas kiel tia komunikilo, kian, ni bezonas. Por mi, Esperanto estas tiu komunikilo.

D: Ĉu vi povas iomete precizigi la lingvan situacion en Irano kaj ankaŭ klarigi, kial la studentoj ĉi tie estas en malavantaĝa pozicio en akirado de scioj?

R: Nu, nia lerneja sistemo grandparte similas al multaj el la sistemoj en la Okcidento. [La tempon] de la unua lernojaro ĝis la 12a, ni konsideras "lernejo", kaj post tio komenciĝas la universitato. Kompreneble, tiuj 12 lernejaj jaroj dividiĝas al kvinjara elementa lernejo, trijara postelementa lernejo kaj mezlernejo aŭ gimnazio dum kvar jaroj. Post tio la lernantoj ricevas diplomon pri scienco, pri matematiko, pri natursciencoj, pri literaturo aŭ pri ekonomiko. En la postelementaj kaj mezaj lernejoj, t.e. entute dum sep jaroj, la lernado de unu fremda lingvo estas deviga. Plejparte tio estas nuntempe la angla, sed parte ĝi estas la araba. kompreneble, tiu fremdlingva lernado daŭras proksimume 6 horojn semajne dum 7 jaroj. Tio signifas unu kvinonon de la lernotempo, ĉar la semajna programo ampleksas 30 horojn. Sekve, ankaŭ la kosto devas esti ĉirkaŭ unu kvinono de la tuta buĝeto de la Ministerio de Edukado. Laŭ la pasintjara buĝeto tio prezentas elspezon de 400 milionoj da usonaj dolaroj, nur por lingvolernado. Kun kia rezulto? Pasintjare la ministro pri edukado mem deklaris, ke post 7 jaroj da lingvostudoj niaj lernejanoj ne kapablas skribi aŭ elparoli eĉ unu solan anglan frazon senerare. Do la rezulton ni rajtas rigardi kiel nulan.

La suma tempo uzata, laŭ proksimumaj kalkuloj (en niaj lernejoj estas ĉ. 3 milionoj da infanoj), estas 1,2 miliardoj da horoj jare. Entute, por sep jaroj, tio signifas elspezon da 2,8 miliardoj da dolaroj kaj ĉirkaŭ 9 miliardoj da horoj - nur por la lernado de lingvoj. Kaj, laŭ mia opinio, bazita sur statistikoj, intervjuoj kaj artikoloj diversloke aperintaj, la situacio pri lingvo-lernado nenie en la Tria Mondo estas pli bona, ol ĉe ni. Pro similaj rezultoj, kiel vi scias, la angla lingvo ne plu estas deviga instruobjekto de la

La kultura heredaĵo de la homaro akumuliĝis unuavice en la okcidentaj landoj, kaj mankas komunikilo por transporti ĝin al la ceteraj mondpartoj. Malekvilibro do ekzistas ne nur en ekonomio kaj sano sed ankaŭ en scio, kaj la scion ni ne povas transporti al la Tria Mondo. Nur kiam ni povos levi la nivelon de scio en la Tria Mondo, la tieaj popoloj povos helpi sin mem. Kaj nur tiam la aliaj popoloj povos helpi ilin efike. La unua helpo, kiun ni povas kaj devas doni al ili, estas havigi al ili komunikilon, kvazaŭ telefonon, pere de kiu ili facile povu proprigi al si la scion, la kulturan heredaĵon, la sciencon kaj teknikon de la Okcidento kaj, pere de tio, atingi ian kulturan egalrajtecon kaj ekvilibron. Sen tia komunikilo, restos la diskriminacio en la kultura sfero, kaj sekve ankaŭ en la ekonomika kaj eble eĉ en la rasa - ĉio ĉi pro la lingva handikapo de la Tria Mondo, kiu ne povas sekvi la mondan evoluon de la kulturo kaj de la tekniko. Estante psikologo, mi scias, ke la homa inteligento ne estas specifa apartenaĵo de la okcidentaj aŭ de la (politike) orientaj popoloj. Ankaŭ la popoloj kaj la junularo de la Tria Mondo estas tre inteligentaj. La distribuo de inteligento estas ĉie sama. Do, se ne ekzistus tiu lingva handikapo, ili ne post restus.

Tial temas pri pli ol nura ideologio. Sen tia komunikilo, mi opinias, ĉiuj ideologioj malsukcesos. Necesas doni al ili neŭtralan lingvon, per kiu ili povos aliri al la kulturan heredaĵon de la tuta homaro. Kaj tion, laŭ mi, ni devas fari por la tuta Tria Mondo. Ĉiuj povus tion kompreni, se la intelektuloj povus alparoli ilin kaj prezenti al ili la valoron de Esperanto kiel revolucio en la tezo kaj antitezo de la komunikilo kaj la komunikaĵo, kiuj nun estas en sintezo. Mi ne volas profundiĝi ĉi tie en la teoriojn de Marshall Macluhan pri komunikilo, komunikaĵo ktp. Ili ne estas pravaj. Ni devas unue havi komunikilon, kaj poste ni povos transdoni la komunikaĵon.

Kiam mi pripensas la problemojn de la junularo en la Tria Mondo, mi konstatas, ke ĉiuj parolas supraĵe pri tio, ke la junularo havas jen tiun, jen alian problemon. Sed, la fundamenta problemo estas jeno:

Nuntempe en la Okcidento ekzistas tiom da scienco, da scioj kaj tekniko, kiujn potenciale povus profiti la junularo de la Tria Mondo, sed tiujn ili ne povas atingi pro la lingvaj baroj kaj diskriminacio. Do, mi antaŭvidas profundan revolucion por la tuta Tria Mondo. Tion ili devas

Ni ne lernas Esperanton pro lukso, sed pro malsato pri novaj scioj
Intervjuo de D-ro V. Sadler kun D-ro M. H. Saheb-Zamani

Parto 2

La unua parto de ĉi tiu intervjuo, kiu aperis en nia decembra numero (paĝoj 202-207), estis rakonto pri la amasa Esperanta aktivado en Irano. Ĉi tiu dua parto de la intervjuo kun d-ro M.H. Saheb-Zamani prezentas la idean fonon de la irana movado. Temas pri nova rilato al la internacia lingvo, pri ideoj, kiujn onĉ ec teorie apenaŭ tuŝis gin nun, sed kiujn Irano komencis praktiki en antaŭe nevidita skalo.

Demando: Ŝajnas, ke vi estas aparte ideologie ligita al Esperanto. Vi vidas en ĝi ne nur instrumenton por internaciaj kontaktoj sed ankaŭ rimedon por evoluigo de la junularo en la Tria Mondo.

Respondo: Ni rigardu la aferon el la vidpunkto de la informteorio. Ni devas elekti taŭgan komunikilon por ĉiu komunikaĵo. La universalaj profetoj - ĉu spiritaj, ĉu materiismaj - neniam pensis pri la komunikilo, kiun ili devas elekti por sia mesaĝo. Ekzemple, Marks skribis, ke ĉiuj suferantoj devas unuiĝi. Sed per kiu lingvo ili unuiĝu? Ĉu per la paŝtua, la farsia, la guĝrata aŭ la germana? Ĉu ili lernu la germanan aŭ atendu tradukon en ilian lingvon, kaj kiu traduku? Ĉu la aristokratoj, kiuj povis vojaĝi al Eŭropo kaj lerni eŭropajn lingvojn, traduku tiajn verkojn por la popolamasoj, por ke tiuj unuiĝu kaj ribelu kontraŭ la aristokrataro?

Journal kaj *Journal de Téhéran*,ankaŭ internacian arablingvan ĵurnalon, tre popularan junularan gazeton, gazeton por virinoj, por sportistoj kaj diversaj aliaj.

La dua plej influa eldonejo estas Keihan, kiu eldonas matenan anglalingvan gazeton *Keihan International*, perslingvan virinan gazeton *Zane ruz* (Hodiaŭa virino), kaj ankaŭ gazetojn por infanoj kaj sportistoj, krom kompreneble perslingvaj ĵurnaloj. Poste mi ekrilatis kun aliaj matenaj ĵurnaloj, unue *Rasťahiz* (Releviĝo), la oficiala organo de la sola politika partio de Irano, kaj poste kun *Ajandegan*, kies redaktoro nun fariĝis la ministro de informado kaj sekve transdonis la redaktorecon al iu alia. Ni skribis ankaŭ en *Negin*, unu el la plej influaj monataj revuoj, kaj same en *Dane'ŝ Kadeh*, la ĝenerala revuo de la Universitato de Teherano. Rezulte de tiu artikolo iuj el la universitataj aŭtoritatuloj petis min fari prelegon pri tio, kion mi baptis la "lingva revolucio".

Tiu prelego poste aperis en broŝura formo sub la titolo *La kulturo kaj la revolucio lingva* - siatempe jam menciita en la revuo *Esperanto*. Multaj aŭskultantoj-studentoj tie demandis: "Kie ni povas lerni ĉi tiun lingvon?" Mi kaptis la okazon kaj respondis: "Se la estimataj sinjoroj de la Univesitato - la profesoroj, la direktoro, la rektoro, kiuj ĉiuj ĉeestas ĉi tie - donos al mi klasĉambron, mi volonte instruos al vi senpage." La direktoro pri kulturaj aferoj de la Universitato, profesoro B. Saruĥani, ankaŭ li sociologo, respondis: "Se ĉi tiu salono, en kiu vi prelegas, taŭgas por vi, ĝi estas je via dispono, vi povos komenci." (Ĝi estis taŭga salono, por 110-120 personoj.) Ni do povis transloki nian kurson el la lernejo al la Universitato.

Esperanto Revuo, 1978 januaro, P.202-203

privata ĉambro, kie lia edzino kutimis dufoje semajne instrui pri *Korano* al sinjorinoj. Tie estis kelkaj seĝoj kaj nigra tabulo, do tie mi komencis instrui al eble 15 personoj, inter kiuj estis ankaŭ tiu pastro. Tio estis la unua paŝo.

Tiam ni alparolis lernejestron de privata lernejo, petante lin disponigi senpage klasĉambron. Mi devis skribi al la Ministerio de Edukado por peti permeson tie instrui Esperanton, kvankam tute senpage. Oni respondis, ke mi ekuzu tiun salonon, sed ke la formalaĵoj postulos iom da tempo, antaŭ ol mi ricevos oficialan respondon al mia letero. Mi kredas, ke ili volis vidi, pri kio temas, ĉar pluraj personoj, eĉ la ĝenerala direktoro de edukado por Teherano, venis al mia klaso por observi. Fine, post pluraj monatoj mi ricevis oficialan respondon, ke, kondiĉe ke temas pri senpaga instruado, mi rajtas daŭrigi.

Tiam mi komencis kampanjon de alparoloj al unuopaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj. Mi devas unue klarigi, ke dum ĉ. 6 jaroj mi faradis radio-paroladojn pri sociaj kaj psikologiaj temoj kaj la rezulto de miaj paroladoj aperis en 4 volumoj, el kiuj jam atingis la 15an eldonon. Pro tio mi jam fariĝis sufiĉe konata en la amasmedioj, kaj do estis facile por mi telefoni al tiu aŭ alia ĵurnalisto aŭ redaktoro, dirante, ke mi havas ion, pri kio mi volus scii lian opinion, kaj invitante lin al lunĉo por priparoli ĝin. Kutime ili akceptis, kaj ni do sidiĝis kaj pridiskutis Esperanton.

Mi ĉiam kunportis tekon plenan de libroj, precipe la Esperanta traduko de *Korano*. Do ofte, post du horoj da parolado, kiam mi ankoraŭ ne klarigis, kion mi volas peti de ili, ili memkomencis diri: "Nu, kion ni povas fari pri vi"? Ili konsentis , ke temas pri grava afero. Do mi diris: "En via gazeto vi publikigas ĉia specajn informojn; do kial ne ankaŭ kulturajn informojn pri Esperanto"? Ili respondis, ke ili ne disponas pri tiaj informoj. Tamen, kiam mi certigis, ke mi povos liveri al ili informojn, ili konsentis publikigi. Mi komencis ekstrakti kaj kompili mallongajn novaĵojn el tio, kion mi legis en la Esperanta gazetaro, precipe en *Esperanto* kaj *Heroldo de Esperanto*. Mi faris nur mallongajn informojn, sed mi ĉiam adaptis ilin al la irana pensmaniero kaj vekis ilin laŭ la gusto de la koncerna publiko. Do unu post alia, inter la aliaj mondaj novaĵoj, ekaperis tiaj informoj pri Esperanto. Poste, mi parolis kun Etelaat, kiu estas unu el la plej elstaraj kaj riĉaj gazeteldonejoj. Ĝi havas perslingvan vesperan gazeton, matenajn gazetojn anglan kaj francan, *Tehran*

D: Por Esperantistoj en aliaj landoj la interesiĝo ĉi tie ŝajnas tre subita fenomeno. Ĉu tiu interesiĝo estas grandparte spontana aŭ, ĉu ĝi ekzistas nur dank' al zorga preparlaboro de la publika informiteco.

R: Mi devas, por klarigi tion, unue rakonti pri mi mem. Mi ekinteresiĝis pri Esperanto jam antaŭ 30 jaroj. Nun mi estas 46-jara. Tiutempe mi trovis libreton eldonitan de la forpasinta Bahman Ŝidani, kiu pioniris Esperanton en Irano antaŭ ĉ. 55 jaroj. Mi legis ĝin kaj trastudis ĝin kun pluraj miaj lernejaj kamaradoj. Tiutempe neniu sciis ion pri Esperanto, sed kelkaj diris, ke ĝi estas ligita kun unu religia sekto. Do en tiu tempo mi ne povis vere ion fari, sed mi verkis kaj eldonigis broŝureton, en kiu mi dediĉis 3 paĝojn al priskribo de Esperanto. Poste mi iris al Eŭropo por studi, kaj mi ne plu multe pensis pri Esperanto, ĉar mi estis tre okupita.

Sed antaŭ proksimume 2 jaroj kaj duono, trarigardante mian bibliotekon, mi rimarkis tie miajn notojn pri Esperanto, laŭ kiuj mi promesis iam eldoni ion por tiu lingvo. Kvankam neniu iam demandis min pri tio kaj verŝajne ĉiuj jam forgesis pri la ekzisto de tiu mia broŝureto, mi tamen sentis ian honton kaj kulpon, ke mi faris iam promeson publikan sed ne plenumis ĝin. Do mi skribis al Britujo, al Francujo, al Nederlando, kaj mi petis konatojn miajn, kiuj vojaĝis, esplori, kiel nun statas la afero de Espernato en la mondo, kiom da eldonaĵoj ekzistas, kiom da societoj funkcias ktp.

Kiam mi disponis pri sufiĉe da informoj, tiam mi komencis fari planon por la agado. Unue mi ekinstruis Esperanton hejme al pluraj el miaj parencoj, al malgrandaj infanoj, unu el ili 9-jara, kaj poste mi foje anoncis al miaj gestudentoj en la Universitato: "Venontan semajnon mi volus rakonti al vi pri io tre nova, tre interesa, pri kio vi certe neniam aŭdis antaŭe." Do ili fariĝis tre scivolaj, kaj venis amase al la posta leciono. Unue mi prelegis pri la lingvo-problemo, ankoraŭ neniel menciante Esperanton. Nur post unu horo da kritikoj pri la naciaj lingvoj kaj pri la nuntempa lingvo-instruado mi kalarigis, ke laŭ mia opinio ekzistas solvo, ke tiu solvo estas Esperanto, kaj mi donis enkondukan lecionon pri ĝi. Ili estis tre entuziasmaj kaj petis min instrui la lingvon al ili.

Unu el miaj studentoj, islama pastro, proponis al mi la uzon de unu lia

interesiĝis, tiel ke ankaŭ ili komencis diskonigi la aferon. Ni nun kreis entute eble 12 instruantojn, kiuj pretas senpage instrui Esperanton en diversaj lokoj po ĉ. 4 horoj semajne. Ankaŭ ili estas nukleo, el kiu nun disradias la ideo pri Esperanto.

La libroj, same, ludas rolon. La lernolibro *La dua Lingvo* atingis jam la trian eldonon en malpli ol 10 monatoj. La unua eldono estis en 5000 ekz., tiam post 2 monatoj ni devis represi ĝin en 2000 ekz., kaj nun, nur antaŭ kelkaj tagoj, aperis la tria eldono en 7000 ekz., do entute 14000 ekz. La Universitato de Teherano komencis reproduktadi ĉiujn gazetartikolojn pri Esperanto en la formo de numeritaj bultenoj, sub la titolo "Esperanto kaj la gazetaro", kaj ĝis nun ni povis distribui 22 tiajn bultenojn. Tiel ni atingis multajn pliajn homojn. Ĉi-jare mi vidas en niaj kursoj aliajn specojn de lernantoj, ol pasintjare: pli prestiĝajn personojn, ekzemple, pensiitajn kolonelojn, unu el la direktotoj de la Ministerio de Edukado, la vic-ĝeneralan direktoron de la Ministerio de Energio, kiu mem estas profesoro de la Teknika Universitato. (Estas interese, ke, kiel vi mem povis vidi, li mem daŭre promenas kun aŭdilo en unu orelo. Li diras: "La homoj kredas, ke mi surdiĝis. Sed ne gravas, kion ili pensas. Fakte, mi havas vian kurson en kasetofono en la poŝo, kaj mi daŭre reaŭskultas ĝin.")

D: Laŭ la vendiĝo de via lernolibro oni povas supozi, ke krom la lernantoj en viaj kursoj ankaŭ multaj aliaj homoj en Irano nun klopodas lerni la lingvon meminstrue. Vi vendis jam 7000 ekzemplerojn, vi havis 2500 kursanojn, do ie ekzistas ankoraŭ 4500 homoj, kiuj ne havas instruiston.

R: Sendube estas tiel. Ni ricevadas leterojn el multaj partoj de la lando. Feliĉe, la Universitato de Teherano ŝarĝis oficiale du personojn en la Fako de Kulturaj Aferoj respondadi al informpetoj pri Esperanto, kaj ili ĉiutage ricevas leterojn el multaj partoj de la lando. Kompreneble ili kutime konsultas min pri la plej bona maniero respondi. Do el tio ni jam scias, ke en multaj urboj ekestis interesiĝo , kaj krome, la eldonisto de la lernolibro informas nin; kiom da ekzempleroj estas mendataj en kiuj lokoj. Mendoj nun alvenadas ĉiutage.

Kial Esperanto furoras en Irano?
Intervjuo de D-ro V. Sadler kun D-ro M. H. Saheb-Zamani

§ E-391:

Parto 1

Dum la lastaj du jaroj venis al ni informoj pri la Esperanto agado en Irano, kiuj plej ofte sukcesis konfuzi nin, ĉar ili sonis - kiel tion konfesas d-ro Saheb- Zamani mem - kvazaŭ ĉapitroj el "Mil kaj unu noktoj". Ni timeme traktis parton de tiuj novaĵoj ekz. en nia pasintjara decembra n-ro. Nun la direktoro de la CO de UEA, d-ro V. Sadler, iris fine de oktobro kaj komence de novembro libertempi en Irano. Ĵau nia peto, li tie faris longegan intervjuon kun la Ĉefmotoro de la irana Esperanto-agado. Trovante la intervjuon interesegan, ni decidis publikigi la tuton. La dua parto sekvos en nia numero de januaro 1978.

Demando: D-ro Saheb- Zamani, jam pasintjare vi komencis instruadon de Esperanto en la Universitato de Teherano kaj jam tiam havis ĉirkaŭ 2500 lernantojn. Nun komenciĝis nova universitata jaro, kaj oni inaŭguris novajn kursojn. Ĉu la interesiĝo estas same granda, kiel pasintjare?

Respondo: Jes, eĉ pli. La interesiĝo ĉiam pli kreskas, ĉar ni tiel sukcesis ĉe la amasmedioj, ke preskaŭ ĉiusemajne io aperis pri Esperanto en ĵurnaloj, gazetoj aŭ radio. Do la publiko povis daŭre informiĝi, ke ne temas pri io efemera sed pri io konstante aktuala. Multaj el niaj lernantoj forte

en tiu domo, okazas kursoj nuntempe ankaŭ en pluraj moskeoj.

Unika kaj tre signifa kurso- ne malpli grava ol tiu por 675 geinstruistoj en 1980- jam estis aludita en nia maja numero. Temas pri oficiala dejortempa intensa kurso de la irana aer-armeo. Partoprenis 36 oficiroj. La kurso daŭris 480 horojn, 4 horojn tage, 5 tagojn semajne, dum 7 monatoj (1980 09 27 - 1981 05 05).

esperanto revuo / 1981 Decemro / p.209

52 rubrikoj de Ĝavanan

EN ĴUS RICEVITA RAPORTO pri la agado en Irano dum la pasinta jaro elstaras tri tre influriĉaj atingoj.

Jam dum tuta jaro la revuo *Ĝavanan* (Junularo- eldonata de la plej granda irana gazetejo Ettela-at en 500 000 ekz) aperigas ĉiusemajnan rubrikon "Vivu Esperanto", ĉiufoje sur po 1-2 grandformataj paĝoj. Ĝi konsistas el: konciza leciono de Esperanto; respondoj al leteroj de legantoj pri Esperanto kaj la lecionoj; citâoj el la ricivitaj leteroj (meznombre 135); biografietoj de famaj personoj, kiuj parolis favore al Esperanto (Tagor, Gandhi, Tolstoj, Tito ktp); pri-Esperanta krucvortenigmo kun premioj (lernolibroj de Esperanto donacitaj de la eldonejo Atai).

Alia paĝo de *Ĝavanan* sub la rubriko "Hodiaŭa scienco" aperigadas informojn tradukitajn el la Esperanta revuaro, ekz. el *Homo kaj kosmo, Monato* kaj *El popola Ĉinio*. La Esperanta fonto estas emfaze indikita. La redaktoro de "Vivu Esperanto", s-ro Reza Ĥejr-ĥah, mem lernis Esperanton en la Universitato de Tehrano. Ĉar nuntempe la universitatoj estas fermitaj, estas luita tri-etaĝa domo proksime al la Universitato, je kosto de ĉ. 3000 gld. monate, jam de julio 1981. La domo ricevis la nomon "IRAN-ESPERANTO". Multaj gejunuloj de "IRAN-ESPERANTO" kunlaboras kun s-ro Ĥejr-ĥah en la redaktado de "Vivu Esperanto". Krom

kontakti homojn el la onidire libera mondo kaj eventuale peti helpon, kaj (ĉ) ke oni eble povus ricevi librojn, revuojn ktp donace de eksterlando.

3. Trejnado de homaj fortoj en la Okcidento, kiu dum lasta jarcento multe riĉiĝis je tradicio kaj sperto pri Esperanto, plenigus ian vakuon en la Tria Mondo. Pro tiu vakuo, Esperanto-amantoj de nia regiono aspektas eble tro verdaj. Tial necesas plani, starigi kaj plenumi specialajn projektojn, inkluzive de stipendioj, vojaĝoj ktp. Ordinare, tiuj kiuj unuafoje vojaĝas al Okcidento suferas de t.n. kultura ŝoko dum ĉ. kvar ĝis ses monatoj. Tial la planataj stipendioj devus esti inter naŭ monatoj kaj unu jaro. UEA ne bazu la evoluon de Esperanto sur blinda konfido ke ie, iu, iam, iel, eble ekkonus Esperanton, eklernus kaj daŭrigus lerni ĝin, kaj espereble ankaŭ povus labori por ĝi!

4. Kopirajto bezonas diskuton triamonde. La valoro, kopirajto kaj, t.n. pirat-eldono tute malsamas en Okcidento kaj en la Tria Mondo... Esperanto krome havas apartajn kialojn, kiuj devigas ofseti jam (okcidente) presitajn librojn en la Tria Mondo. La kialoj i.a. jenas: (a) malfacila disponebleco de latin-litera tipografio; (b) aldona malhelpo de supersignoj; (c) disponigo de pli ampleksaj vortaroj kaj lernoliboj al studentoj. Oni unue permesu, ke oficialaj instancoj akceptu Esperanton, kaj poste kverelu pri tiel nomata piratado!

5. Konklude: Kiam iu eldonisto pretus riski kapitalon por eldonado de lernomaterialoj, tiam oni povus ektrovi esperon pri la progreso de Esperanto en la Tria Mondo. Usona kolego, R. Kent Jones, skribis en sia anonco en Esperanto (1988/n-ro 7-8): "Nia 9-landa teamo de kemiistoj tradukis [574-paĝan lernolibron] laŭ la peto de triamondanoj por scienca materialo. Tial ni senkoste donos al ili la rajton presi kaj vendi ĝin laŭvole." Faru kiel Jones faras, por pli efektiva integrado de kunlaboro, pere de UEA, por evoluigi Esperanton en Tria Mondo.

Esperanto Revuo / januaro, 1989, p 15

Iranaj sugestoj: UEA en la Tria Mondo: Ĵila Sadigi - Saheb - Zamani

Jen resumo de referaĵo el la simpozio pri UEA en Roterdamo, kies aktoj haveblas fotokopie de la CO kontraŭ 15,00 gld.

Niajn sugestojn ni pritrakas en tri partoj.

1. Du gravaj mankoj de Esperanto estas (a) baza scienc-teknika literaturo, kaj (b) facilaj legaĵoj por komencantoj kaj post-elementaj kursoj. Sen la unua, Esperanto kiel solvilo de profunda problemo en la Tria Mondo neniel serioze havas allogon por ties kleruloj. Tial ni bezonas fondaĵojn kaj subvenciojn, kaj klopodojn por plenigi la breĉon devus fariĝi kelkoblaj! Manko de la dua kontribuas multe al maldaŭrigo de amasoj da komencantoj. La plej serioza revuo, kiu jam priatentis la bezonon, estas Kontakto; tial ne indas redukti la numerojn. Estus ege utile se i.a. Kontakto ĉiun kelkan jaron aperigus siajn plej facilajn artikolojn en unu volumo, kun demandoj kaj respondoj, kiel akompana lernolibro por komencantoj.

2. Koresponda Servo Mondskala ekzistas, tamen unuopa gvidanto volontula ne povas respondi al ĉiam kreskanta deziro de triamondaj komencantoj. Tiuj komencantoj kompreneble ne regas la lingvon, sed per korespondado ili deziras certigi sin (a) ke Espreranto vere vaste ekzistas, (b) ke ĝi ne ligiĝas kun politika aŭ religia tendenco, (c) ke eblas tiel

studento kaj profesoro povus sufiĉe memfide kaj facile profiti de tiuj tradukitaj libroj, ege rapide, kaj eĉ tre malmultekoste, post nur 150-250 horoj da Esperanto-lernado intensive en du-tri monatoj. Tiam ni havigus preskaŭ 90% de hodiaŭa scienca kono je dispono de la plimulto de la homaro en la Tria Mondo. Kaj ĝuste tial, la publika edukado, kiel la klerigado de respondecaj funkciuloj, aŭtoroj, instruistoj ktp, devus esti la nova startegio de Esperanto en la venonata jarcento de ĝia vivado!

Esperanto Revuo / Novembero . 1987. p199

Espersnton, kiam li/ŝi povus vojaĝi al multaj arabaj landoj senbezone de iu lingvo krom sia propra – jam la sesa oficiala lingvo de UN? Aŭ kial iu latin-amerikano lernu Esperanton, kiam vojaĝante al pli ol 20 landoj en sia regiono, eĉ en partoj de Usono, Eŭropo kaj Afriko, li/ŝi ofte povas paroli hispane?

La signifo de Esperanto por eŭropanoj nur en kunteksto de iliaj propraj kulturaj atingaĵoj kaj evolu-kondiĉoj estas komprenebla. En lokoj, kie tiuj evolukondiĉoj ne ekzistas, kiel en Azio kaj Afriko aŭ en Sud-Ameriko, tiuj signifoj por alikulturanoj facile povus tute, aŭ parte, esti puraj malsignifoj. Tial, la signifo de Esperanto por la dua jarcento de ĝia evoluo devus esti redifinita por malsamaj klasoj, malsamaj sociaj tavoloj, por diversaj malplimultoj, religianoj aŭ ideologiaj komunumoj, por komputiloj, por malsimilaj etapoj de la vivo, kaj la kulturoj de diversaj partoj de la mondo.

Esperanto estas samtempe ambaŭ, kaj Unueco kaj Varieco. Ni devas difini la Variecon ene de Unueco. Ankaŭ la Supernacieco de Esperanto bezonas difinon. Ĝia aplikado devas esti pli detale kaj pli ekzakte difinta. Esperanto bezonas novan strategion, kaj ĝia aplikado novajn taktikojn. El-lernado de Esperanto estas facila, sed ĝia plena aplikado ankoraŭ ne estas tiel facila, kiel ĝi ŝajnas!

La plej lasta aplikebleco de Esperanto, pri kies agnosko Irano sincere jam kontribuis, estas la nova signifo de Esperanto, kiel transmisilo de scienco kaj tekniko por la Tria Mondo. Multaj popoloj, inkluzive de multaj alte progresintaj kleruloj kaj respondecaj sociaj gvidantoj, estas ankoraŭ absolute ne konsciaj pri ĉi potencialo de Esperanto. Tamen Esperanto povus riĉe kontribui al iu necesa revolucia ekvilibrigo de kono kaj sciencteknikaj informoj inter Nordo kaj Sudo, sen kio la mondo neniam povos atingi la veran inter-komprenon kaj pacon!

Por scienc-teknika pliriĉigo de la Tria Mondo, se nur en ĉ.200 branĉoj de scienc-teknikaliteraturo, kaj aparte por ĉiu fako ĉ. 10 plej ampleksaj, normaj kaj bazaj lernolibroj – entute 2000 libroj – el kelkaj scienc-teknike evoluintaj lingvoj, tradukiĝus en Esperanton, subite, mutaci-simile kaj vulkaneske, ek-burĝonus ia altkultura evoluo, senprecedenca ekde Gutenberga epoko, en la Tria Mondo. Tiam ĉiu

Malsamaj signifoj de Esperanto: J^ila Sadigi - Saheb - Zamani

Esperanto havas malsamajn signifojn por malsamaj landoj kaj kontinentoj. Ĝi havas ankaŭ malsamajn signifojn por malsamaj popoloj en la sama lando. Aldone, Esperanto havas multajn signifojn samtempe por unuopaj individuoj. Kaj, ĝi eĉ ofte havas malsamajn sigifojn, dum malsamaj tempoj, por la sama persono!

Ĉion ĉi oni povus facile konstati pere de tralegado de artikoletoj, kaj pere de trarigardo de anoncetaro pri korespond-deziroj en la Esperanta gazetaro. Sed por kelkaj homoj, ekz. en Pakistano – laŭ amiko pakistana – Espernto havas nenian signifon. Ili diras: "Ni havas multajn naciajn lingvojn, kaj la urduan kiel nian supernacian lingvon; kial do ni devus havi supernacian lingvan, kiel Esperanton? Kion ĝi ofertus al ni krom plian perdon de tempo, kaj malŝparon de mono? "Aŭ ni rigardu la kazon de Hinda Unio, Kie popoloj batalas por regiona identeco helpe de sia propra lingvo inter pli ol 15 ĉefaj rivalaj lingvoj! Kion Esperanto povus kontribui al ilia mensopaco, aŭ por solvi ilian identec-krizon post pli ol tricent jaroj de anglalingva kultura hegemonio? La samon, plej verŝajne, oni povus diri pri multaj afrikaj nacioj, kun la tribaj konfliktoj kaj multaj koloniaj Lingvoj de Okcidento. En Afriko ekzistas kelkaj supernaciaj lingvoj, kiel la svahila. Por afrikanoj, kiel por multaj pakistananoj kaj hindoj, Esperanto ankoraŭ ne povas havi seriozan signifon. Kaj simile, kial do ekz. iu arabo lernus

nedevigaj, sed oni pagas min laŭ la pagleĝo por profesoroj. Ĉiu kurso estas trihora semanjne.

2e. Dek geprofesoroj pri belartoj petis de Saheb [d-ro Saheb-Zamani] Esperanto-kurson, kaj li prezentis al ili s-ron Aref Azari kiel la instruiston. Li komencis la kurson antaŭ tri semajnoj.

3e. D-ro Pezeŝki havos sian Esperanto-kurson en Karaĝ apud Tehrano, kie li loĝas, ekde la osa monato.

4e. Sed la plej grava estas jene: Antaŭ unu semajno aperis la sociologiaj lernolibroj de la gimnazioj (kompreneble kun iom da malfruiĝo pro la revolucio kaj la reverkado). En du el ili - tiuj de la unua grado (naŭa klaso) kaj la tria grado (dek-unua klaso) - Saheb verkis ĉapitron, kaj en la dua, 18-paĝojn ĉapitre (tio estas okono de la libro - 144-paĝa), kun bela bildo tutpaĝa de Zamenhof, kiun faris irana pentristo. La nomoj de la ĉapitroj estas "Kulturo kaj lingvo". Nu, ĉi-jare preskaŭ 1,5 miliono da gelernantoj iranaj konatiĝos kun Esperanto. Dezirinde estas scii, ĉu ankaŭ en aliaj landoj ekzistas lernolibroj, kiuj enhavas ĉapitrojn pri Esperanto?!

5e. De la 30a de oktobro, la komencdato de la nova programo de Radio Pekino, preskaŭ 200 geirananoj raportis ĝian aŭskulton. Nur, ekzistas en iuj noktoj apudaj stacioj, kiuj ĝenas la aŭskulton. Ĉu ne eblas, ke oni direktu la elsendojn ankaŭ al mez-oriento? Ĉi tie, la programo aŭdiĝas je la 23.30-24.00 h. laŭ la loka tempo. Tia entuziasmiĝo povas esti instiga, ne nur por Pekino, sed ankaŭ por aliaj landoj!

Ĉi-jare inter la Universitato de Tehrano, la sola fremda lingvo, por kiu oni anoncis kaj aranĝis, estas Esperanto. Nuntempe, Esperanto povas esti rigardata kiel forta batalilo kontraŭ la koloniigaj lingvoj, precipe en la liberiĝintaj landoj, kiel la nia. Tio ne ĝenas la neŭtralecon, ĉu?

Esperanto Revuo

Decembro 7, 1979, p.203

LETRERO EL IRANO: Ĵila Sadigi - Saheb - Zamani
Informiĝo de miliono kaj duono da gelernantoj

§ E-392:

Irano estas la ĉeftemo en la mondaj novaĵoj dum la lastaj monatoj. Ne la irana Esperanto movado pri kiu ni dum monatoj aŭdis preskaŭ nenion. Ni timis, ke la granda movada fluso tie komencas malaperi. Aliflanke, ni ne sukcesis trovi kialojn, pro kiuj la nuna gvidantaro de la lando ne enprenus Esperanton en sian kulture radikalan idearon. Forta kaŭzo por pensi tiele estis la vortoj, kiujn pri Esperanto diris Ajatula Ŝariatmadari, unu el la plej elstaraj figuroj de la novaj moviĝoj en Irano (vidu lian deklaron en nia numero de januaro 1978, p.7) Nun venas la apuda letero de s-ino Saheb-Zamani. Ni aperigas la tutan leteron, preskaŭ. Ni lasas ankaŭ la du belajn adjektivigojn de la finaĵoj is kaj os. La letero montras, ke Irano plu ĉampionas en la klopodoj interersi amasojn pri Esperanto. Jam de longe mi ne skribis al vi - kiel ĉiam, pro la manko de tempo. Dankon pro la regula sendado de la revuo. Ankoraŭ ekzistas iom da malfacilaĵoj pri devizoj.

Sed pri Esperanto en Irano:

Le. Miaj kursoj rekomenciĝis ekde la 23a septembro, la komencdato de la studjaro, en la Universitato de Tehrano; ĉi-foje en la fakulltato pri tekniko. Okazas tri elementaj kursoj kun 150 gekomencantoj kaj unu paroliga kun 50 gepartoprenantoj. Kiel la isan jaron, la kursoj estas

nin sufiĉe bone?

* * *

En la komenco, dum kvin tagoj, ĉiuj 500 kursanoj estis kune, en unu eĉ por Irano senprecedence amasa kuro. Sed, ekde la sesa tago oni dividis la kursanojn en tri subgrupojn. Ankaŭ instruprogramo havis tri partojn: gramatiko, legado-tradukado, konversacio. Lastatage oni redaktis kaj subskribis rezolucion de la iranaj mezlernejaj geinstruistoj pri kaj por Esperanto. Meze de la tria kursosemajno okazis libroekspozicio. Ni disdonis ankaŭ 700 fotokopiojn de la paĝo kun la rubriko "Esperanto en radio" el la revuo Esperanto.

Tamen, nuntempe oni ĉi tie povas aŭskulti nur la elsendojn el Pekino. Tuta grupo da profesiaj kaj multaj amatoraj fotistoj tre aktivis dum la kurso kaj oni ĝis nun sukcesis vendi fotojn por la sumo de ĉ. 5.800 guldenoj.

Ĝenerale, plejmulto forlasis kursojn kun granda fido je Esperanto, plejmulto, pretaj sincere helpi al la progresigo de la Internacia Lingvo. Kaj ĉio ĉi, mirinde, okazis en tempo ege griza en Irano, kiam vere nenio estas eĉ iomete facila, kio ankoraŭ rapidege disvolviĝas kaj pro kio nenio estas antaŭvidebla.

Esperanto Revuo /1980 Oktobro / p. 161-163

scipovu la lingvon. Ankaŭ la menciitaj estos je la dispono de tiu studentino.

Responde al unu el la 35 demandoj - Kial vi volas lerni Esperanton? - la kursanoj, ĝenerale, montris tre bone, ke ili estas klare cel-konsciaj:

Ili ne volas lerni facilan, muzike belan lingvon pro nura libertempa amuziĝo aŭ pura estetika plezuro; ili ne volas lerni Esperanton por interŝanĝi poŝt-markojn, muzikdiskojn ktp., internacie, por korespondado pri botaniko, muziko, sporto ktp., por tranokti senpage pere de la Pasporta Servo en iu ajn lando dum iu vojaĝo, por trovi kunulon aŭ kunulinon en nudista kampadejo en iu okcidenta lando pere de anoncetoj, por legi originalan aŭ Esperante tradukitan poemaron, romanon, dramon (kiel Hamleto, Faŭsto, Robajoj de Kajjamo ktp).

Tamen ili deziras, eĉ volegas lerni Esperanton! Kaj kial? Ĉar: a) ili kredas, ke Esperanto estas universala, supernacia, sen kulturimperiismaj altrudoj; b) pere de Esperanto oni esperas povi liberigi sin de la scienc-teknika malriĉo de la Tria Mondo; c) helpe de Esperanto oni deziras ludi iun estimplenan roleton en la internacia kulture areno, profiti de ĝi kaj eble ankaŭ kontribueti al ĝi science, ekonomie, humane kaj eĉ teknike.

Jes, tio estas la nova Esperantismo, en la Tria Mondo. Kaj tial ili proksimiĝas al Esperanto kaj en ĝi serĉas kompenson por siaj mankoj. Estus katastrofo, kultura kaj ideologia katastrofo, se ili ne trovus sian de longe revitan perditon en Esperanto. Tiam Esperanto, senrevene forlasita, mortus por ĉiam en la Tria Mondo. Tio ĉi, espereble, estas ĝustatempa morala admono al la okcidenta Esperantistaro, alarmosignalo por tiuj kleruloj, kiuj ne konscie viktimigas la ĉefajn, primarajn principojn pro la sekundaraj malgravaĵoj en Esperanto. Tio ĉi estas adomono al tiuj, kiuj anstataŭ pripensi kaj zorgeme verki, traduki, eldoni kaj aldoni al la nuntempe malriĉa sciencteknika literaturo de Esperanto, ege bedaŭrinde, perdadas la multvaloran tempon pri tro pedantaj, luksaj akademiaj disputoj kaj temoj.

Ni instigadas la intereson de la amasa publiko en Irano pri Esperanto, sed ni solaj certe neniam povos adekvate respondi ĝian grandan scienteknikan malsaton. Vi devus helpi, eĉ helpegi nin. Nu, ĉu oni aŭdas nin tie en la sciencoriĉa, kultura Okcidento? Ĉu ni povis komprenigi

La kursoj komenciĝis la 7an de junio kaj daŭris ĝis la 3a de julio 1980. Lastatage, laŭ la peto de 175 gestudentoj, oni daŭrigis la kursojn ĝis la 10a de julio. La ĉefkursoj funkciis dum 6 tagoj semajne, 3,5 horojn tage, plus minimume 2 horojn por hejmaj taskoj. Do, 66 instruhoroj, 44 ekzerco-horoj, sume ĉ. 110 studhoroj en 28 organizitaj instrutagoj de Esperanto en Irano. Ĉu senprecedenca evento?

La Ministerio sugestis la starigon de la kursoj ekde la 22a de junio, ĉar ĝis tiu dato la plimulto de geinstruistoj estis okupita pri la lernejaj finekzamenoj. Krome, la plimulto de la kurspetintoj deziris, ke la kursoj okazu posttagmeze. Tamen, konsiderinte ke temas pri 30 000 mezlernejaj geinstruistoj, kaj - aliflanke - povinte respondi adekvate al maksimume 500 kursanoj, oni intence decidis komenci la kursojn 16 tagojn pli frue kaj matene. Tiele estiĝis ia konscie kaj zorgeme plantia selektado. Ariĝis, unuafoje, en la "Irana Esperanto-ĝardeno" - oni nomis ĝin tiel - kvincent potencialaj amantoj de la homara amikeco, ĉiutage frumatene, por akiri la necesan komunikilon, por iĝi batalontoj de nia Movado. Multaj eĉ volonte rezignis pri aliaj aferoj, por iĝi studentoj de la Internacia Lingvo.

Amasiĝis jam antaŭ kursokomenco pli ol 300 aliaj allogitaj volontuloj ege petante partopreni la kursojn sed, bedaŭrinde, vere ne plu oni povis akcepti ilin. Anstatŭe, oni decidis starigi aliajn kursojn post la islama fasta monato Ramadano, de la 16a de aŭgusto 1980. Laŭpete, oni havos ankaŭ perfektigan kurson por ĉirkaŭ 200 jam lernintaj geinstruistoj.

En la kursoj partoprenis ankaŭ 15 jamaj lernintoj, kiel estontaj instruantoj. Krome, kunlernis du universitataj profesoroj kaj du radio-ĵurnalistinoj.

En la unua tago oni disdonis al la kursanoj demandaron kun 35 demandoj pri Esperanto, por identigi la antaŭ juĝojn kaj antaŭsciojn. La lastan tagon de la kursoj oni denove disdonis la saman demandaron kun 5 pliaj demandoj, por eltrovi la ŝanĝojn kaj aktivajn sciojn de la kursanoj. Ĉar dum tiu periodo oni devis akiri ankaŭ teoriajn konojn i.a pri ekonomiaj, psikologiaj kaj sociologiaj aspektoj de Esperanto.

Unu Kursanino verkas sian magistran tezon pri "Esperanto kaj internaciaj kulturaj rilatoj". Ŝi studas en la Universitato Farabi en Tehrano, kies respondeculoj akceptis la tezon oficiale, kondiĉe, ke ŝi mem

servadis kaj-adas kiel la umbilik-ŝnuroj de imperiismo kultura. Tial ili, tiuj ligoj, devus esti disnoditaj tuj post la liberiĝo de ĉiuj subpremataj popoloj.

c) Petojn, ke la Ministerio ekplenumu revolucian agadon per la organizo de intensaj Esperantaj kursoj por la geinstruistoj. La Ministerio ankaŭ devus enkonduki Esperanton en la mezlernejajn programojn. En ĉirkaŭ ses monatoj, preskaŭ 84 000 voĉoj kun subskriboj venis al la Ministerio. Prof. M. H. Saheb-Zamani sukcesis kolekti la fotokopiojn de proksimume du trionoj de la alsenditaj leterroj, skrib-rulaĵoj ktp., kaj ekspozicii ilin.

2) Komence, multe da geinstruistoj pri fremdaj lingvoj iom kaj iel kontraŭstaris la movadon, pro la disvastigita onidiro, ke "ekde la venonta jaro oni anstataŭigos la anglan kaj la francan per Esperanto". Ili ektimis perdi sian laboron. Tamen, poste, pro la senĉesaj demandoj de gelernantoj, multaj el la instruistoj mem entuziasme volontuliĝis, samvoĉe kun la aliaj, petis la Ministerion pri la baldaŭaj Esperantaj kursoj.

3) Lastatempe, la interesiĝo pri la Internacia Lingvo pli vaste kaj pli intense populariĝis en Irano. Jen en la lernejoj, jen en la moskeoj, universitatoj kaj en junul-kluboj kresk-adis kaj -adas fervore aroj da Esperantaj kursoj. Ekzemple, ĝis majo 1980, ekzistis nur en Tehrano 66 kursoj kun 3125 gelernantoj en 3 universitatoj, 7 moskeoj kaj en 56 mezlernejoj.

Kaŭze de tiel granda demandado kaj premado, finfine, la Ministerio pri Edukado, vole-nevole, dissendis oficialan cirkuleron (la 22an de aprilo 1980), al la mezlernejoj de la tuta lando. Laŭ la cirkulero, ĉiuj geinstruistoj pri fremdaj lingvoj kaj sociaj studoj povus partopreni intensajn Esperantajn kursojn dum 22 tagoj.

La kursojn gvidis prof. Saheb-Zamani, s-ino M. Sagafian kaj la subskribinto. Unue oni anoncis, ke la loko konvenus nur por 300 personoj. Tamen, petis multe pli, kaj oni devis enskribi 500 geinstruistojn, 300 el Tehrano, kaj 200 el aliaj urboj iranaj. Tial oni devis ŝanĝi la lokon el iu lernejo al la iama klubo de usonanoj. Ĝi estas granda ĝardeno (300 000 kvadratmetroj), kiu nuntempe estas je la dispono de malriĉaj infanoj kiel sportejo.

LETERO EL IRANO: Ĵila Sadig - Saheb-Zamani
675 geinstruistoj lernas instrui Esperanton

§ E-393:

Irano spertas revolucion kaj militon. Temen, eĉ en tiaj cirkonstancoj, la "irana Esperanto-revolucio" ne ĉesas arde flami. Laŭ lastatempa telefona komuniko, ne plu temas pri 500 sed pri 675 geinstruistoj, kiuj lernas instrui la Internacian Lingvon.

Post la aperigo de la ĉapitroj pri Esperanto en mezlernejaj sociologiaj lernolibroj en Irano (v. nian revuon de decembro, 1979, p. 202-3), rezultis, kiel antaŭvidite kaj iom planite, multnombraj konsekvencoj. Eble, antaŭ ĉio, por la esperantistaro de la mondo estas menciinda jeno:

1) Dekmiloj da gelernantoj kaj geinstruistoj, el la tuta lando, sendis al la Ministerio pri Edukado leterojn, telegramojn kaj skrib-rulaĵojn, kiuj enhavis:

a) dankojn pro la revolucia prezento de unu granda atingo homara en la sfero de la internacia kultura komunikado, tiel logike konstruita kaj facile lernebla, kiel Esperanto.

b) Deklarojn kaj opiniojn, ke la ĝis nun instruitaj okcidentaj fremdaj lingvoj en Irano - kaj verŝajne ankaŭ en aliaj landoj de la Tria Mondo - vole-nevole, kaŝe-malkaŝe, konscie-nekonscie, bedaŭrinde, ĝenerale

Rejkjaviko. Kopio de la persa traduko estis sendita al la ĝenerala direktoro.

17. La Montevidea rezolucio de Unesko pri Esperanto aperis en diversaj iranaj libroj, revuoj kaj gazetoj (entute, pli ol 500,000 ekzempleroj). Pli frue, la membroj de la nacia Unesko-komisiono ne disponis pri la persa traduko, kiun nun konas plej multaj universitatanoj.

Heroldo de E-O / 20 Jenuaro 1978/ p.1

de Esperanto, aperis en tri eldonoj, disvastigitaj tra tuta Irano, kun entute 14.000 ekzempleroj.

7. Dum la lastaj du jaroj, plej multaj iranaj gezetoj ofte aperigis novaĵojn kaj artikolojn (85 entute) pri Esperanto.

8. La Esperanto-sekcio de la fako pri kulturaj aferoj ĉe la Universitato de Tehrano publikigas bultenon sub la titolo "Esperanto kaj la gazetaro". La studentoj ricevis senpage dekmilojn da tiaj bultenoj, kies 22 numeroj jam aperis.

9. Surkaseta elementa Esperanto-kurso (daŭro 4 horoj kaj duono) estas je la dispono de ĉiu studento, kiu petas ĝin.

10. Unuafoje, tri Esperanto-studentinoj el Tehrano partoprenis en la Universala Kongreso de Rejkjaviko (Islando). Favore raportis irana kaj Esperanto-gazetaro.

11. La gazet-agentejo PNA (Pars Novaĵ- Agentejo) dissendis per teletajpilloj informojn pri Espernto al Iranaj kaj alilandaj amas-komunikiloj.

12. La Irana Radio intervjuis studentojn kaj instruistojn de la internacia lingvo kaj disaŭdigis novaĵojn kaj prelegojn pri la sama temo.

13. Priesperantaj artikoloj al la Irana gazetaro aperis, post traduko, en aliaj lingvoj. Ekzemple, recenzo pri "La Nobla Korano" (tradukita en Esperanton de D-ro Italo Chiussi) aperis urdu-lingve, en la hinda revuo "Jaridae-jafri" (vol 5, n-ro 8/1977).

14. En letero ref. 221-9264 de la 13-a de septembro 1977, la Ministro pri Scienco kaj Altlerneja Edukado, varme rekomendas la instruon de Esperanto al profesoroj pri literaturo kaj fremdaj lingvoj. Subskribis, por la ministro, profesoro Amoozgar, nun kanceliero de la Ferdowsi Universitato en Maŝhado.

15. La religia centro Gom publikgis plurajn artikolojn pri la Esperantlingva eldono de la Korano. Gom eldonas revuojn en 6 diversaj lingvoj.

16. "Rastakhiz" la oficiala gazeto de la unusola irana politika partio, aperigis multajn recenzojn pri libroj kaj artikolojn pri la internacia lingvo. Kelkaj el tiuj artikoloj ampleksas 6 paĝojn, ekz. la parolado, kiun faris la ĝenerala direktoro de Unesko - S-ro A. M. Ḿbow - dum la 62-a UK en

Plie pri la renesanco en Irano

§ E-394:

En la raporto sendita de D-ro M. H. Saheb-Zamani, profesoro ĉe la Universitato en Tehrano, al prof. Saruĥani, direktoro pri la kulturaj aferoj de la sama universitato, oni legas inter alie jenajn informojn pri disvastiĝo de Esperanto en Irano.

1. Studentoj kompilis la unuan Esperanto-persan vortaron, kies eldono (5.000 ekzempleroj) elĉerpiĝis post 10 monatoj. Konsekvence, dua eldono baldaŭ aperos.

2. Lingvistoj kaj alia grupo de studentoj preparas novan pli detalan vortaron kun 10.000 vortoj. La prepar-laboro estas preskaŭ finita.

3. La universitato de Tehrano publikigis kaj disdonis 5.000 ekzemplerojn de la broŝuro "La kulturo kaj la revolucia lingvo". La Instituto por Internaciaj Aferoj (branĉo de la ministerio pri ekstertandaj aferoj) mendis 50 ekzemplerojn kaj dua eldono estas nun preta por plua disdonado al diversaj instancoj.

4. Alia verko - ankaŭ en la persa lingvo - "La literaturo de espero" estos eldonata de la Universitato de Tehrano.

5. La eldonejo "Atai Press" publikigos kolekton de gravaj artikoloj pri la internacia lingvo, en libro, kiu ampleksos pli ol 550 paĝojn.

6. La lernolibro "La dua lingvo", taŭga por lerneja kaj hejma studado

mortintaj projektoj, revizias kaj rerevizias statutojn, tradukas forgesitajn poemojn... kaj al neniu restas la tempo por redakti unu bonan gazeton por komencantoj aŭ verki informojn por la nacilingva gazetaro. Oni vivas komforte en la konata movada medio kaj eĉ ne rimarkas, ke la vorto "movado" ĉesis esti aplikebla... Oni havas sian plezuron el la uzo de Esperanto, sed oni forgesas, ke Esperanto ne estas "la lingvo por ni". Ĝi estas la lingvo por ili, por tiuj miliardoj da homoj, kiuj ankoraŭ ne lernis ĝin kaj plejparte eĉ ne aŭdis pri ĝi.

La irana kazo estas saniga kaj espereble ankoraû ĝusta-tempa memorigo, ke vera movado estas io dinamisma, eĉ agresa. Ni vidas tie vivantan pruvon, ke unu homo povas krei amasmovadon por Esperanto-havante nek organizaĵon, nek landan gazeton, nek kongresojn, nek estrarkunsidojn, nek kontrolkomisionojn, nek lokajn klubojn, nek libroservon. Naŭdek jarojn post la Unua Libro, ni emas forgesi, ke ĝuste tion faris ankaŭ Zamenhof.

Esperanto Revuo/ 1978 Januaro/ PP. 1-2

Ekzistas jam propono ampleksigi tiucele la revuon *Esperanto* per aldono de 12 ekstraj paĝoj al ĉiu numero - sed la kosto estus ĉirkaŭ 60'000 guldenoj jare laŭ la nunaj prezoj, kaj tio estas financa risko ne jam farebla, sen garantiaj subvencioj. Sed eble ankaŭ sur tiu kampo necesas revizii nian kutiman pensmanieron. Kio pli gravas: ĉu konservi altnivelan revuon kiel intelektan ludejon de kelkmil eŭropanoj - aŭ produkti allogan, instruan kaj klerigan gazeton por (potenciale) multoble pli granda nombro da legantoj en la evolu-landoj? Por kiu ne elspezu tiujn 180'000 guldenojn jare (tiom kostas ĉi tiu revuo)- ĉu por la elito, kiu jam sukcese lernis la lingvon, aŭ por la multe pli granda nombro, kiu volus lerni ĝin, se ili havus taŭgajn materialojn? Por la veraj aktivuloj movadaj povas sufiĉi serioza organo de eble 1'000 ekzempleroj. Ni konsideru ankaŭ, ke la kreskanta nombro de kolektivaj abonoj alportas ĉiam pli grandan proporcion de komencantoj en nian legantaron.

Tiu demando kondukas nin al la dua leciono ĉerpebla el la irana sperto: ke la malnova movado emas forgesi, ke ĝia ĉefa tasko estas la disvastigo de Esperanto. Se venas propono dediĉi pli da atento al komencantoj, ĝia kutima respondo estas, ke pri ili okupiĝu la lokaj kluboj, ke tamen Esperanto estas matura lingvo de vivanta socia komunumo kaj ke estas ofendo al la prestiĝo aŭ digno de la movado, se ni iel malkaŝas al la ekstera mondo, ke ĉe ni ankoraŭ ekzistas komencantoj. La vero tamen estas, ke Esperanto estas lingvo de ankoraŭ nur malgranda grupo de parolantoj, plejparte eŭropaj, kaj la vera danĝero por la prestiĝo de la movado estus ne la ekzisto sed la manko de komencantoj. Esperanto troviĝas ankoraŭ nur ĉe la komenco de sia mondkonkera vojo. Sekve estas necese, ke, dum longa tempo ankoraŭ, ĉiam pli granda parto de la movado konsistu el komencantoj. Tiel estas en Irano, kaj tio ja estas karakterizo de ĉiu ajn kreskanta movado. Feliĉe, komencantoj ne mankas, eĉ en la malnovaj Esperanto-movadoj eŭropaj. Sed ili ja perdiĝas. Ĉiujare malfermiĝas tra la mondo almenaŭ 2000 novaj kursoj, en kaj ekster-lernejaj. Ni diru: kelkaj dekoj da miloj da novaj komencantoj. Malgraŭ tio, la movado ne kreskas.

Ĉu eble pro tio, ke la spertaj parolantoj ne havas tempon por helpi la komencantojn? Ili diskutas pri pioniroj, kompilas bibliografiojn de

Dum du trionoj de la homaro loĝas en Azio, 85% de niaj membroj loĝas en Eŭropo kaj nur 5% en Azio... Por ŝanĝi la situacion, necesas unue kompreni, ke la lingvaj problemoj de la Tria Mondo estas esence aliaj, ol tiuj de la cetera mondo. Dum en Eŭropo, ekzemple, la lingva problemo sentiĝas plej forte dum internaciaj vojaĝoj, en Azio aŭ Afriko la ĉefa problemo sentiĝas jam hejme, ĉe homoj, kiuj eble neniam vojaĝos eksterlanden. Ĝi estas problemo de la lingvo de kleriĝo, de edukado. Al homoj, kiuj dubas, ĉu ili iam havos eblecon vojaĝi alilanden, ne utilas rekomendi Esperanton kiel helpilon turisman. Al homoj, kiuj studadas fremdajn lingvojn, por ke per sia kripla, pasiva scio de tiuj lingvoj ili havu ŝancon lerni iom pri ekonomiko aŭ elektrotekniko aŭ medicino kaj tiamaniere atingi pli bone salajratan oficon - al tiaj ne utilas reklami, ke per Esperanto ili povos legi *Don Quijote*. Al tiaj realistoj tio ŝajnus efektive donkiĥota entrepreno!

La vere grandaj perspektivoj por Esperanto en Afriko kaj Azio - kaj, cetere, la tuta pli longdaŭra sukceso de la nova movado en Irano - postulas urĝan kaj serioze planitan laboron por laŭgrade disvolvi taŭge elektitan klerigan literaturon, precipe sciencan kaj teknikan, en la Internacia Lingvo.Tia eldona plano ne respondas al la ĉefaj interesoj de la jam ekzistanta (ĉefe eŭropa) Esperanta libromerkato. Sed ĝi ja rspondas al la bezonoj de la kreskigo kaj tutmondigo de la movado. Nur tia literaturo povas doni sencon al la lernado de Esperanto por triamondanoj. Samtempe, tamen, el vidpunkto de la landoj, kie la movado jam establiĝis, tia reorientiĝo de la agado povas aldoni novan dimension al la idealisma signifo de Esperanto. Al ĝia valoro por la forigo de aliaj specoj de lingva maljusteco aldoniĝas ĝia valoro kiel rimedo por helpi la evolulandojn. Tamen, novaj lernantoj en la Tria Mondo ne povos tuj ensalti en la lingvaĵon de fakaj lernolibroj. Ili bezonas ankaŭ taŭgan legmaterialon por la transira stadio inter la unua lernolibro aŭ kurso kaj la ekutiligo de la lingvo por klerigaj studoj. Nek eŭropaj anekdotoj de antaŭaj jardekoj, nek sentimentalaj rakontoj pri kongresaj amoj taŭgas por vivteni ilian intereson. Estas bezonataj modernaj tekstoj: aktualaj novaĵoj kulturaj, sciencaj, ekonomikaj, redaktitaj en facila lingvaĵo.

Irana Leciono: Victor Sadler Ph. D.

§ E-395:

La rapide kreskantaj sukcesoj atingitaj por Esperanto en Irano- pri kiuj oni povas legi en ĉi tiu kaj en la antaŭaj numeroj de la revuo - prezentas du lecionojn al la internacia Esperanto- movado. La unua admono jam aperas klare el la dua parto de la intervjuo kun la iniciatinto de la irana movado: La monda movado devas urĝe revizii sian laborplanon, precipe sur la kampo de eldonado, por kontentigi la bezonojn de la tiel nomata Tria Mondo. La dua leciono trudiĝas el komparo de la irana agado kun ekzemple la eŭropa: La pli malnovaj movadoj stagnas aŭ malprogresas, ĉar ili komforte forgesis pri sia unua prioritato: La disvastigo de la lingvo.

Ne unuafoje sur ĉi tiuj paĝoj ni akcentas la ĝis nun tro eŭropan konsiston de la Esperanto-movado. Restas ĉiam aktuala la admono de Zamenhof: "Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia". Necesas, ke la lingvo atingu mondan disvastiĝon - kaj por tio ne sufiĉas noti unuopajn lernantojn en la plimulto de afrikaj kaj aziaj landoj, sed necesas proporcia populariĝo ĉe la vastaj popolamasoj. Sufiĉas rigardi la tabelon de la UEA- membraro por vidi, per kiaj malfortaj radikoj Esperanto tenas sin en la duono de la landoj, kien ĝi entute penetris. Malgraŭ la malfortiĝo de la angla lingvo en Hinda Unio, ankoraŭ ekzistas tie pli da angle-parolantoj, ol da Esperanto-parolantoj en la tuta mondo.

izolemaj elementoj inter Iranaj gvidantoj, kaj la amas-movado ŝrumpis, estis anstataŭigita, en la kursoj de la 1980-aj kun organizitaj strukturoj pli konvencia naturo kaj kun pli da emfazo sur kvalito ol la kvanto. Irana Esperanto parolantaro fariĝis regulaj partoprenantoj en Monda Esperanto-Kongresoj kaj reto da lokaj UEA reprezentantoj estabiliĝis. Esperanto-kursoj daŭris en universitatoj kaj aliaj lokoj, okazaj artikoloj aperis en la gazetaro, kaj radio kaj televido reliefigis Esperanton de tempo al tempo. Dua eldono de la Esperrantlingva Nobla Korano estis aperigita, kaj iom poste traduko de la Robaioj de Omar Khajjam. Aliaj tradukoj inkluzive de la verkoj de Imam Ali kaj Hafiz. Hodiaŭ la Esperanto-movado en Irano estas vigla kaj aktiva, kaj Irano estas fame konata en la Internacia Esperanto-Komunumo.

BIBLIOGRAFIO

M. Bulton, Zamenhof Creator of Esperanto, Londono, 1960.

. Courtinat, Historio de Esperanto 1887-1960, 3 vol-oj, Bellerive-sur Allier (Francio), 1964-66.

. Janton, Esperanto: Language, Literature, and Community, Albanio N.Y., 1993.

. Kokeny and V. bleier, Enciklopedio de Esperanto, Budapeŝto, 1933.

Lapenna, "The Common Language Question before International Organizations", La Monda Lingvo-Problemo, 2, 1970, p. 83-102.

Lapenna, U. Lins, and T. Carlevaro, Esperanto en Perspektivo, Londono kaj Roterdamo, 1974.

E. Privat, Aventuroj de Pioniro, La Laguna (Hispanio), 1962.

. Rebrik, "Fragmentoj el Dek Jarojn en Persio", Sennaciulo, 28 Januaro 1925 kaj 5 Februaro 1925.

M. H. Saheb-Zamani, M.H. "Irano, Islamo, kaj la Supernacia Lingvo Esperanto", in Serta Gratulatoria in Honorem Juan Regulo, vol. 2, La Laguna (Hispanio), 1987, p. 701-717.

.E. Stojan, Bibliografio de Internacia Lingvo, Ĝenevo, 1929.

Humphrey Tonkin
Office of the President
University of Hartford
West Hartford, CT 06117, USA.

denove en la listo en sekvanta jaro, kaj estas kuniĝta kun delegitoj en Qazvin (instruisto, Mohamad Labib) kaj Tehran (Bahman Shidani, redaktoro de la ĵurnalo Raad, kaj Ahmad Jazdani, oficisto de urba registaro (Rebrike, Passim), kaj Ahmad Kasravi. Shidani kompilis la unuan Esperanto-manlibron en Farsi publikigita en Tehrano en 1915 (Stojan, P. 282), kaj Jazdani partoprenis en Monda Kongreso de Esperanto en 1920, en Hague. Tra la jaro 1920-a la Esperanta-movado kreskis firme kaj konstate, spronis per intenaciistaj sentimentoj inte Iranaj intelektuloj kaj religi-kredantoj. Persujo ludis gravan rolon pri la klopodoj adapti Esperanton kiel la lingvo de la Ligo de Nacioj (Privat, p. 83-88, Lapenna, p. 86-92). La persa delegito Princo Arfa-ed-Douleh, estis unu el 11delegitoj, kiu proponis la adapton en la rezolucio prezentita al la unua Asembleo de la Ligo je la 9a de Decembro, 1920, kaj renovigis en la dua Asembleo (Septembro 9, 1921). La Svisa Esperanto-pioniro, Edmond Privat servis, kiel legala Konsulo al la Irana delegacio.

La jaroj 1930 vidis malkreskon je interesiĝo pri esperanto. Kvin delegitoj estis listigitaj en la Jarlibro de 1934, sed tute neniu en 1937, kiam la loka politika kondiĉo fariĝis malfavora al ĝia internaciista perspektivo. ĝis 1975, Esperanto ne reaperis sur Irana scenejo, kiam la artikolo de Prof. M.H. Saheb-Zamani, en la revuo de Tehrana Universitato - Daneshkade - stimulis tian interesiĝon, ke en mallonga spaco de tempo Esperanto-kursoj establiĝis ne nur en la Universitato sed ankaŭ en multaj aliaj lokoj ĉirkaŭ la lando, speciale universitatoj, lernejoj, kaj moskeoj. Esperanto estis inkluzivita en la sociologia instruplano en alt-lernejoj, kaj sekve de la revolucio, en kiu multaj Esperanto-parolantoj ludis entuziasman rolon, la Ministerio de Edukado eldonis alvokon al instruistoj por lerni la lingvon por povi respondi la kreskantan interesiĝon(demandon). Totala 675 instruistoj lernis por instrui Esperanton, sed la programo finfine mallongiĝis per subita starigo de la Iran-Iraka milito (1980-1988). La kultura revolucio de 1980 portempe fermis la universitatojn, sed la kursoj daŭris en lernejoj kaj moskeoj, kaj Esperanto paĝo aperis regule en la populara semajna gazeto Javanan. En 1981, Esperanto-centro fondigiĝs en Tehrano. Esperanto fariĝis amas-movado.

La klimato ŝanĝiĝis en la fruaj jaroj de 1980 kun la supereco de plia

fame kiel Universalaj Kongresoj (UK) jam okazis en Hispanio(1993), Koreio(1994), kaj Finlando(1995).

La unua Esperanto gazeto aperis en 1889, kaj la Universala Esperanto Asocio (UEA), la pricipa internacia organizaĵo de Esperanto-parolantoj, estis fondita en ĝenevo en 1908. ĝI funkciis tra speciale nomumitaj lokaj reprezentantoj, nome delegitoj. Granda nombro de originala kaj tradukita literaturo kreske ekzistas en Esperanto, inkluzive de tradukoj el ĉefaj /grandaj kaj multaj minoritataj lingvoj. Ambaŭ La Nobla Korano kaj La Biblioj ekzistas en Esperanto tradukoj. Hodiaŭ, estas parolantoj kaj uzantoj de Esperanto en bone pli ol cent landoj, kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj en pli ol 60 landoj. Multnombraj internaciaj, profesiaj kaj specialigitaj Esperantaj, organizaĵoj ekzistas tra la mondo.

Esperanto estis proponita kiel la lingvo de la Ligo de Nacioj en 1920, kaj ĵus/nur apenaŭ malvenkis (Lapenna, Lins, and Carlevaro, p. 748-758). La Universala Esperanto Asocio (UEA) havas konsultan rilaton kun ambaŭ la Unuiĝantaj Nacioj (UN) kaj Unesko, kaj ĝia utiligo estas subtenita en multaj Unesko-rezolucioj. Relative facila por lerni kaj uzi, senrigarde de la uzant-es nacia/indiĝena lingvo ĝi estas vaste rigardata, per ĝiaj parolantoj, kiel praktika solvo de la lingvaj problemoj, kio favoras neŭtralan kaj sen-partian komunikadon inter kulturoj, kaj helpas doni voĉon al malgrandaj lingvoj kaj kulturoj, alfronte al pli superregaj povoj. Hodiaŭ Esperanto funkcias kiel surprize vigla/forta rimedo por interŝanĝo kaj komprenado inter intelektuloj, hobiistoj, kaj profesiuloj.

La unuaj pioniroj de la lingvo en Irano ŝajnas esti ke, M. Abesgus, rusa bank-oficisto, postenita unue en Baku, kaj en 1910, en Tehrano (Kokeny kaj Bleier, p. 437-38). Kontribuanto al Esperanto-periodaĵoj, li estis elektita en la Lingvo-Komitato, poste en Esperanto-Akademio, kiam ĝi establiĝis en 1905 (Courtinat, P. 153).

Sumere de 1910 en la revuo Bahar artikoleto aperis pri Esperanto de Jusef Etesam-ol-Molk (1874-1937), la patro de la fama poetino Parvin Etesami (1913-1937), kaj kursoj de Esperanto komenciĝis en Tabriz en 1912. La Jarlibro de UEA por 1912 listigis Ardaches Der Hovhanissiantz, kiel delegito en Tabriz, je la adreso de la Imperia Banko de Irano. Li estas

Esperanto En Irano: Prof. Humphrey Tonkin
Universitato de Hartford, Majo 31, 1995
Esperantigis: Ĵ. A. Sadigi

§ E-396:

Kreita de Ludwik Zamenhof (1859-1917), de Varsovio, kiel lingvo por internacia uzo, Esperanto unue vidis la lumon de l' tago en libreto Ruslingva, titolita Internacia Lingvo Enkonduko kaj Kompleta Manlibro, publikigita en 1887. La libreto publikigiĝis sub la psedaŭnimo D-ro Esperanto "Iu, kiu esperas", kaj tiuĉi nomo baldaŭ alligiĝis al la lingvo mem. Pola, Franca, kaj Germa eldonoj, preskaŭ tuj, sekvis la rusan kaj eldonoj en aliaj lingvoj elvenis poste. La dua libreto aperis en la sekva jaro (Boulton, p.32-39).

La lingvo, kies vortaro estas bazita sur Hindo-Eŭropaj radikoj kaj speciale Latino, sed la strukturo havas afinecojn kun ali-familiaj lingvoj (Janton, p.137-38), trovis sian unuan interesiĝantaron en Centra Eŭropo, disvastiĝante al Francio, Britio kaj plue, turne de la jarcento. En la fruaj jaroj de la 20-a jarcento, Esperanto-movado kreskis en aliaj partoj de la mondo, inkluzive Ĉinio kaj Japanio. La unua Internacia Konferenco de Esperanto-parolantoj okazis en Boulogne-sur-Mer (Bulonjo-sur la Maro), Fracio, en 1905, kaj tiaj konferencoj estas daŭrigitaj, kun interrompoj dum la militoj (1914-1918/1939-1945), ĉiujare ekde tiam. Lastaj konferencoj,

Esperanto continued in universities and elsewhere, occasional articles appeared in the press and radio and television featured Esperanto from time to time. A second edition of Esperanto Quran was published, and later a translation of the RubÐiyÐt of Omar Khayyam. Other translations included works by the Imam Ali and by Hafiz. Today, the Esperanto movement in Iran is vigorous and active and Iran is well known in the international Esperanto community.

BIBLIOGRAPHY

M. Bulton, Zamenhof Creator of Esperanto, London, 1960.

. Courtinat, Historio de Esperanto 1887-1960, 3 vols. Bellerive - sur - Allier (France), 1964-66.

. Janton, Esperanto: Language, Literature, and Community, Albany N.Y., 1993.

. Kokeny and V. Bleier, Enciklopedio de Esperanto, Budapest, 1933.

Lapenna, "The Common Language Question before International Organizations", La Monda Lingvo-Problemo, 2, 1970, pp. 83-102.

Lapenna, U. Lins, and T. Carlevaro, Esperanto en Perspektivo, London and Roterdam, 1974.

E. Privat, Aventuroj de Pioniro, La Laguna (Spain), 1962.

. Rebrik, "Fragmentoj el Dek Jarojn en Persio", Sennaciulo, 28 January 1925 and 5 February 1925.

M. H. Saheb-Zamani, M.H. "Irano, Islamo, kaj la Supernacia Lingvo -- Esperanto", in Serta Gratulatoria in Honorem Juan Regulo, vol. 2, La Laguna (Spain), 1987, pp. 701-717.

.E. Stojan, Bibliografio de Internacia Lingvo, Geneva, 1929.

Humphrey Tonkin
Office of the President
University of Hartford
West Hartford, USA, CT 06117

Esperanto movement grew steadily, spurred by internationalist sentiments among Iranian intellectuals and religious believers. Iran played an important role in the efforts to adopt Esperanto as the language of the League of Nations (Privat, pp. 83-88, Lapenna, pp., 86-92). The Persian delegate, Prince Arfa-ed-Douleh, was one of 11 delegates who proposed the adoption in a resolution presented to the first Assembly of the League on December 9, 1920, and renewed in second Assembly (September 9, 1921). The Swiss Esperanto pioneer Edmond Privat served as legal counsel to the Persian delegation.

The 1930s saw a decline in interest in Esperanto. Five delegates were listed in the Yearbook for 1934, but none at all in 1937, as local political conditions became unfavorable to its internationalist outlook. Not until 1975 did Esperanto reappear on the Iranian scene, when an article in the magazine of Tehran University by Prof. M.H. Saheb-Zamani stimulated such interest that in a short space of time courses in Esperanto were established not only in the University but at many other locations around the country as well, especially universities, schools, and mosques. Esperanto was included in the sociology curriculum in high schools, and, following the Revolution, in which many Esperanto speakers played an enthusiastic rols, the Ministry of Education issued an appeal to teachers to learn the language in order to deal with the rising demand. A total of 675 teachers learned to teach Esperanto, but the program was ultimately curtailed by the onset of the Iran-Iraq War. The Cultural Revolution of 1980 temporarily closed the universities, but courses continued in schools and mosques, and an Esperanto page appeared regularly in the popular weekly magazine Javanan. In 1981, an Esperanto Centre was opened in Tehran. Esperanto became a mass movement.

The climate changes in the early 1980s with the ascendancy of more isolationist elements among the Iranian leadership, and the mass movement dwindled, to be replaced, in the course of the 1980s, with organizational structures more conventional in nature and with an emphasis on quality rather than quantity. Iranian Esperanto speakers became regular participants in World Esperanto Congresses and a network of local UEA representatives was established. Courses in

operated through specially designated local representatives called Delegates. A large original and translated literature has grown up in Esperanto, including translations from most major languages and many minor ones. Both the Quran and the Bible exist in Esperanto translations. Today, there are speakers and users of Esperanto in well over a hundred countries, and national Esperanto organizations in over sixty. Numerous international professional and specialized organizations exist.

Esperanto was proposed as the language of the League of Nations in 1920 and only narrowly defeated (Lapenna, Lins, and Carlevaro, pp. 748-758). The Universal Esperanto Association has consultative relations with both the United Nations and UNESCO and its use has been supported in several UNESCO resolutions. Relatively easy to learn and use, regardless of the user s native language, it is widely regarded by its speakers as a practical solution to language problems that favors neutral and non-partisan communication between cultures, and helps give a voice to small languages and cultures in the face of more dominant powers. Today Esperanto functions as a surprisingly vigorous means of exchange and understanding among intellectuals, hobbyists, and professionals.

The earliest pioneers of the language in Iran appears to have been one M. Abesgus, a Russian bank official posted first in Baku and, as of 1901, in Tehran (Køkeny and Bleier, pp. 437-38). A contributor to Esperanto periodicals, he was elected to the Language Committee, later the Esperanto Academy, when it was established in 1905 (Courtinat, p. 153). The summer 1910 issue of the magazine Bahar contained an article on Esperanto by Jusof Etesam-ol-Molk (1874-1937), father of the poet Parvin Etesami, and courses in the language began in Tabriz in 1912. The UEA Yearbook for 1912 lists Ardaches Der Hovhannissiantz as Delegate in Tabriz, at the address of the Imperial Bank of Iran. He is listed again in subsequent years, and is joined by Delegates in Qazvin (a teacher, Mohamed Labib) and Tehran (Bahman Shidani, editor of the newspaper Raad, and Ahmad Kasravi, a city government official) (Rebrik, Passim). Shidani compiled the first Esperanto textbook in Farsi, published in Tehran in 1915 (Stojan, P. 282), and Jazdani took part in the 1920 World Congress of Esperanto in The Hague. Throughout the 1920s the

Esperanto In Iran/Persia: Prof. Humphrey Tonkin
University of Hartford, May 31, 1995

§ E-397:

Created by Ludwik Zamenhof (1859-1917), of Warsaw, as a language for international use, Esperanto first saw the light of a day in a booklet in Russian, entitled International Language, with Introduction and Complete Textbook, published in 1887. The booklet was published under the pseudonym Dr. Esperanto, one who hopes, andthis name soon became attached to the language itself. Polish, French, and German editions followed almost immediately, and editions in other languages came later. A second booklet appeared in the following year (boulton, pp. 32-39).

The language, whose vocabulary is based on Indo-European roots and especially Latin, but whose structure has affinities with other language families (Janton, pp. 137-38), found its first enthusiasts in Central Europe, spreading to France, Britain and beyond, at the turn of the century. In the early years of the century Esperanto movements grew up in other parts of the world, including China and Japan. A first international conference of Esperanto speakers was held at Boulogne-sur-Mer, France, in 1905, and such conferences have continued, with interruptions during the war years, annually ever since. Recent conferences, known as World Congresses, have taken place in Spain (1993), Korea (1994), and Finland (1995).

The first Esperanto periodical began publication in 1889, and the Universal Esperanto Association (UEA), the principal international organization of Esperanto speakers, was founded in Geneva in 1908. It

La antaŭparolo de la eldonisto

"La dua lingvo" aperis unuafoje en la jaro 1976 kun eldonkvanto de 5000 ekzempleroj. Tiam oni supozis, ke la vendo de la libro daŭros longan tempon. Sed, la libro mirinde elĉerpis en malpli ol unu jaro pro la famo de ĝia aŭtoro (Prof. Dr. M.H.Saheb Zamani) ĉe Esperantistaj,kaj neesperantistaj legantoj.

Tial, la dua eldono de la libro aperis en marto 1977 po 2000 ekzempleroj. La dua eldono estis celita al tiuj, kiuj ĵus aliris al Esperanto kaj interesiĝis pri ĉi tiu libro. Mirinde ankaŭ tiu eldono tuj elĉerpiĝis.

Pro multe da demandoj, la tria eldono aperis. en septembro 1977 po 7000 ekzempleroj.

Ek de tiam, la libro ne plu eldoniĝis pro diversaj kialoj, kiel ekzemple la islama revolucio en Irano, la relative malrapida kresko de Esperanto en Irano kaj plejgrave la insisto de la aŭtoro pri la havebligo de iu ampleksa akademia Esperanto - lernolibro.

Dum tiuj ĉi jaroj la aŭtoro okupis sin pri la elverko de tia libro. Ankaŭ kun helpo de la aŭtoro, la eldonisto faris sian kvarjaran kontribuon al perfektigo de la libro.

Ni esperas, ke ĉi libro prezentita en nova elverkita formo, kompare al ĝiaj malnovaj eldonoj, plaĉas al la esperantistoj, kiuj senpacience atendis ĝin dum jaroj.

La eldonejo, inĝ. Behruz ATAI

La Dua Lingvo

Tute re-elverkita

Festado de la centjariĝo de Esperanto

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954 okazinta en Montevideo per la rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto - movado, kaj precipe de Universala Esperanto - Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko. same kiel ĝian partoprenon en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. **Gratulas** la Esperanto - movadon okaze de ĝia centa datreveno;

2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;

3. **Invitas** la Ŝtatojn - Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo - problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;

4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

Ĝenerala konferenco de Unesko, Sofio, 1985

REZOLUCIOJ DE UNESKO

En du okazoj la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis specialan rezolucion dediĉitan al Esperanto. Tiu de la 4-a Ĝenerala Konferenco (Montevideo 1954) rezultis el kelkjara kampanjo kunordigita de UEA, precipe de ĝia estrarano Ivo Lapenna. La rezolucio pri la jubilea Jaro, akceptita de la 23-a Ĝenerala Konferenco (Sofio 1985), estis la frukto de tridekjara kunlaboro kaj bonaj kontaktoj de kelkaj naciaj delegacioj. Kune la du rezolucioj konsistigas la plej klaran agnoskon de la valoro de Esperanto fare de grava ineterŝtata organizaĵo. Kvankam en 1993 la 27-a Ĝenerala Konferenco denove diskutis pri Esperanto, la favora rezolucio proponita de Italio ne atingis voĉdonon kaj restis labordokumento.

IV.1.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;
IV.1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;
IV.1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;
IV.1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj - Membroj informis pri sia preteco enkunduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;
IV.1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto - Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954.

On the 10th December 1954, th 8th General Conference of UNESCO at Montevideo approved the following Resolution:

"The General **Assembly** of **UNESCO,** after discussion of the Report of the Director General on the *'international Petition on Esperanto'*

1. Notes the success that Esperanto has had in the field of international intellectual relations and closer mutual understanding between peopeles;
2. Observers that this success in accord with the aims and ideals of **UNESCO;**
3. Authorises that Director General to follow up the experience acquired through the utilisation of Esperanto in education. sciences and culture, and to co - operate for this purpose with the *'Universala Esperanto - Asocio'* in all matters of interest to both Organisations;
4. Notes that several Member States have declared their readiness to introduce instruction of Esperanto into their schools. both elementary and higher grades, and invites these Member Staes to inform the Director General of the resultes achieved in this connection"

ENHAVO (Esperanto - Tekstoj)

Esperanto In Iran/Persia: Prof. Humphrey Tonkin 9
Esperanto En Irano: Prof. Humphrey Tonkin 13
Irana Leciono: Victor Sadler Ph. D. 17
Plie pri la renesanco en Irano: D-ro M.H. Saheb-Zamani 21
LETERO EL IRANO: Ĵila Sadig - Saheb-Zamani 24
LETRERO EL IRANO: Ĵila Sadigi - Saheb-Zamani 29
Malsamaj signifoj de Esperanto: Ĵila Sadigi-Saheb-Zamani 31
Iranaj sugestoj: UEA en la Tria Mondo: Ĵila Sadigi - Saheb - Zamani 34
52 rubrikoj de Ĝavanan 36
Kial Esperanto furoras en Irano?: D-ro V. Sadler 38
Ni ne lernas Esperanton pro lukso: D-ro V. Sadler 43
IRANO, ISLAMO, KAJ LA SUPER-NACIA LINGVO - ESPERANTO: M.H.SAHEB-ZAMANI 55
Iranaj Ĵurnaloj laŭdas nian lingvon 82
Kion opinias ambasadoroj!?: Mag. Tibor Sekelj 84
Esperanto en CNN: Ĵila Sedighi (Saheb- Zamani) 90
30 - Lingva Hafezo: W. Auld 92
30 - Lingva Hafezo: M.H. Saheb-Zamani 94
Kajjamo & Hafezo 96
Eksterordinara eldono en Irano 99
Psikologio, kaj Esperanto: Ĵ. A. Sadigi 101
Spreading The Word in China ??: By J.D. Reed 105
Disvastig^ado de la vorto en C^inio: J.D. Reed 107
Esperanto - Ŝoko, kaj Kontraŭ- Ŝoko: M. H. Sabeb-Zamani 109
Intervjuo kun: M.H.Saheb- Zamani 118
Historia decido en Irano: D-ro Hadi Naimi 124
Eksterordinara eldono en Irano 127

ATAI PUBLISHING CO.
3/1 Second Gandi Street
Tehran 1516747315

Tel: (9821) 88 77 51 51
Fax: (9821) 88 88 58 69
http: //www.ataipub.com
email: info@ataipub.com
ISBN: 964-313-643-4

All rights reserved.
Copyright@2005 by M.H.Saheb-Zamani.

First Edition: 2006
Printed in IRAN

M. H. Saheb-Zamani , Ph.D.

La Dua Lingvo

Esperanto - Persa Lerno – Libro

عطائی

۱۳۱۵

علی اصغر کوثری

M. H. SAHEB-ZAMANI, PH.D.

LA DUA LINGVO

ESPERANTO-PERSA LERNO-LIBRO

ATAI ELDONEJO

عطائی

ISBN 964-313-643-4

9789643136437

علی اصغر کوثری

Atai Eldonejo
email: info@ataipub.com
عطائی

El"La Dua Lingvo"

verkis: M.H. Sahebzamani, Ph.D. IRANO

ساده‌ترین، و منطقی‌ترین زبان جهان - :

Esperanto

en Ĵet-rigardo
at a glance

اسپرانتو در یک نگاه:

● الفبای اسپرانتو

A	B	C	Ĉ	D	E	F
آ	بُ	تسُ	چُ	دُ	اِ	فُ

G	Ĝ	H	Ĥ	I	J	Ĵ
گُ	جُ	هُ	خُ	ئی	یُ	ژُ

K	L	M	N	O	P	R
کُ	لُ	مُ	نُ	اُ	پُ	رُ

S	Ŝ	T	U	Ŭ	V	Z
سُ	شُ	تُ	ئو	W=وْ	وُ	زُ

● تلفظ و املای فارسی به خط اسپرانتو :

Ĝaŭ	جو	Kuĉe	کوچه
Aŭham	اوهام	Ĥijaban	خیابان
Ĵale	ژاله	Ĥosraŭ	خسرو
Naŭ-ruz	نوروز	Ĵanvije	ژانویه

C = «تس» ، مثل «عطسه»
I = «ئی» ، مثل «سینی» Sini
J = «ی» ، مثل «یار» Jar
A+Ŭ = «اَوْ» ، مثل «اوهام» Aŭham
V = «واو» ، مثل «آواز» Avaz

● اسپرانتو، حروف «نیمه‌صدا»(Ü, Ö, ـَـ) ندارد.
● اسپرانتو، «دیکته» ندارد، چون خط اسپرانتو، آوانگار (Phonetic) است : هر چه شنیده شود، همان نوشته می‌شود، و هر چه نوشته شود، همان خوانده می‌شود.
● دستور اسپرانتو ، ۱۶ قاعده دارد، و هیچ استثنا ندارد.
● آکسان (آوافشاره) ، همیشه ، روی هجای ماقبل آخرِ کلمات است : "akvo", "Libro", "Lokomotivo"
● واژه‌ها ، از ریشه‌ی کلمه، با افزودن آوند (√+A) ساخته می‌شوند.
● اسپرانتو، با ۳۰,۰۰۰ ریشه، و ۱۴۲ آوند، شامل ۴,۲۶۰,۰۰۰ واژه است.
● صدهاهزار بیت شعر - و خیام و حافظ - به اسپرانتو، سروده شده است.
● کتاب‌های مقدّس - و قرآن و نهج‌البلاغه - به اسپرانتو، ترجمه شده است.
● ده‌ها مجله، و هزاران کتاب، به اسپرانتو منتشر می‌شود.
● ۱۲ فرستنده‌ی رادیوئی - در آسیا، اروپا، و امریکای جنوبی - به اسپرانتو ، برنامه پخش می‌کنند.
● یونسکو، آموزش اسپرانتو را، به همه‌ی کشورها، توصیه کرده است.

همبستگی نماها :

i

Ĉ تعمیم : هر، همه
ـ نکره : ئی
K پرسش:چه،کدام؟
T اشاره : آن
Nen نفی : هیچ !

-a کیفیت : گونه
-e مکان : جا
-o شیئیت : چیز
-u شخصیت : کس
-al علیّت : چرا
-am زمان : گاه
-el ترتیب : شیوه
-es مالکیّت : مال
-om کمیّت : اندازه

آوندهای بنیادی

√ : A, E, I, J, N, O, IS, AS, OS, US, U

A پسوند صفت:

bela	bona	varma
زیبا	خوب	گرم

● حرف تعریف اسم : La
معرفه = La + : فیلم La Filmo
نکره = La - : فیلمی Filmo -

O پسوند اسم:

Hotelo	Muzeo	Teatro
هتل	موزه	تئاتر

MAL پیشوند ضدِّ ریشه:

mal-bela	mal-varma
زشت	سرد

J پسوند اسم و صفت در حالت جمع:

Muzeoj	Hoteloj	belaj	bonaj
موزه‌ها	هتل‌ها	زیباها	خوب‌ها

E پسوند قید:

bele	bone
به‌زیبایی	به‌خوبی

● فعل‌ها، یک صیغه دارند، و با شش پسوند ساخته می‌شوند: (ریشه = √)

مصدر	گذشته	حال	آینده	شرط	امر
-I	-IS	-AS	-OS	-US	-U
√est+i بودن	√est+is بود	√est+as هست	√est+os خواهد بود	√est+us اگر باشد	√est+u باش
helpi یاری‌کردن	helpis یاری‌کرد	helpas یاری‌می‌کند	helpos یاری‌خواهدکرد	helpus اگریاری‌کند	helpu یاری‌کن
manĝi خوردن	manĝis خورد	manĝas می‌خورد	manĝos خواهد خورد	manĝus اگر بخورد	manĝu بخور

● عدد:

1=Unu	6=Ses	Dek-unu (10+1) 11
2=Du	7=Sep	Dek-du (10+2) 12
3=Tri	8=Ok	Du-dek (2×10) 20
4=Kvar	9=Naŭ	Du-dek-unu(2×10+1)21
5=Kvin	10=Dek	Cent-unu (100+1) 101

200=Du-cent 1200=Mil-du-cent

N: (مفعول) = ضمیر با پسوند رائی

Mi من	helpas یاری می‌کنم vin شما را
Vi شما	helpas یاری می‌کنید min مرا
Li (مذکر) او	helpas یاری می‌کند nin ما را
Ŝi (مؤنث) او	helpas یاری می‌کند ilin آنها را
Ni ما / Ili آنها	... vin شما را
Ĝi / Ĝin آن / آن را (غیر انسان)	

اسم با پسوند رائی :

Muzeon	موزه‌ای را
Filmon	فیلمی را
Hotelon	هتلی را

پیوست کتاب «زبان دوم»، نوشته‌ی دکتر ناصرالدین صاحب‌الزمانی

نام کتاب : زبان دوم (ویراست ۲)

نویسنده : ناصر الدین صاحب زمانی ، محمد حسن

تاریخ انتشار : ۱۳۸۴ ه . خ چاپ : اول ناشر : عطایی

تعداد صفحات : ۴۳۲ + ۱۲۸

خلاصه ی مطلب : این کتاب نسخه ی به روز شده و بسیار کامل تری از کتاب معروف زبان دوم است که در سال ۱۳۵۵ منتشر گردید . کتاب شامل دو بخش فارسی و اسپرانتو است و در آن علاوه بر آموزش صدها منبع اسپرانتو نیز معرفی گردیده اند .

قیمت روی جلد : ۵۹۰۰ تومان قطع کتاب : ۱۷ در ۲۳

نحوه ی دسترسی : دی وی دی آثار دکتر صاحب الزمانی + خرید از عطایی+ وبلاگ آثار دکتر+ سی دی کنگره ی اول + ده ها وبلاگ و وب ساست

اسکن و پی دی اف کننده : دکتر صاحب الزمانی + علی اصغر کوثری

صفحات ۱۹۰و۱۹۱و۱۹۲ و ۱۹۳ و نیز شش صفحه ی ابتدایی و پایاتی سبز رنگ ، در فایل موجود در دی وی دی و فایل های دانلود شده از وب موجود نبود . بنابراین صفحات مذکور را از روی نسخه ی کاغذی اسکن نموده و به فایل پی دی اف اضافه نمودم . بنابراین نسخه ای که توسط وبلاگ کتاب شناسی عرضه می گردد اولین و تا به حال تنها نسخه ایست که کاملا منطبق با نسخه ی کاغذی کتاب است .

سپاس : دکتر صاحب الزمانی میزان اهمیت : درجه ۱ گروه : ۱ (کتاب های اسپرانتو)

پیگیری : نیاز ندارد . کامل است.

حقوق مولف : برداشت از دی وی دی آثار دکتر صاحب الزمانی + اجازه ی شفاهی

سخاوت مندی : انتشار نسخه ی دیجیتال این اثر ، اندکی پس از انتشار نسخه ی کاغذی آن ، در حالی که هنوز نسخه ی کاغذی کتاب برای فروش موجود است ، بیانگر سخاوت و طبع بلند صاحب اثر است .

خرید نسخه ی کاغذی : انتشارات عطایی + آی کتاب + انجمن و ....

روش های دیگر دانلود : وبلاگ آثار دکتر صاحب الزمانی + کتابناک + بیان + و .....

البته در همه ی موارد مذکور ، نسخه ی ناقص قابل دانلود است (فاقد صفحات ۱۹۰ تا ۱۹۳)

www.bibliografio.parsiblog.ir کنگاور- ص پ ۱۹۶-۶۷۴۱۷

همراه : ۰۹۱۸۳۳۸۶۵۹۰